


13


429313

Grabowski

EL PARLIASO DE POPOLOJ







El Parnaso de Popoloj

De l' sama aŭtoro.

	<i>ŝ</i>
<i>El Parnaso de Popoloj</i> , poemaro (Pola Esperantisto)	1,00
<i>Ŝi, la tria</i> , trad. el Sienkiewicz (eld. J. Günther)	0,50
<i>La juĝo de Oziris</i> , trad. el Sienkiewicz (J. Günther)	0,25
<i>Kio okazis foje en Sidono</i> , trad. el Sienkiewicz (J. Günther)	0,25
<i>Pekoj de l' infaneco</i> , trad. el Prus (J. Günther)	0,35
<i>Consilium facultatis</i> , trad. el Fredro (J. Günther)	0,40
<i>Libroj de profetoj</i> trad. el Lange (J. Günther)	0,25
<i>La tagiĝo</i> , kun muziknotoj (J. Günther)	0,10
<i>Mazepa</i> , trad. el Slowacki (Hachette et C-ie)	0,80
<i>Halka</i> , trad. el Wolski (Hachette et C-ie)	0,40
<i>Kondukanto de l' interparolado</i> <i>kaj korespondado kun Antologio</i> <i>internaciu</i> (Hachette et C-ie)	0,80
<i>Granda Vortaro Pola-Esperanta</i> (M. Arct)	1,60
<i>Granda Vortaro Esperanto-Pola</i> (M. Arct)	—
<i>Mezgranda Vortaro Pola-Esperanta</i> (M. Arct)	0,90
<i>Mezgranda Vortaro Esperanto-Pola</i> (M. Arct)	—

429 313

EL
PARNASO DE POPOLOJ

POEMARO

de

Antoni Grabowski



1913.

Ĉidono de „Pola Esperantisto”.

DARSODIO.


429 313




K. 3984/21




Anton Grabowski



POEMOJ ORIGINALIAJ.



LA TAGIĜO.



Agordu la brustojn, ho nia fratar',
Por nova, pli vigla jam kanto!
Ĝi sonu potence de montoj al mar',
Anoncu al ĉiu dormanto:
 Tagiĝo, tagiĝo radias en rond',
 La ombroj de nokto forkuras el mond'!

Post longa migrado sur dorna la voj'
Minacis nin ondoj de l' maro;
Sed venkis ni ilin kaj velas kun ĝoj'
Al verda haven' de l' homaro.
 Post longa batalo, maldolĉa turment',
 La stela standardo jam flirtas en vent'.

Se venus ankoraŭ ventegoj, batal',
Ni estas jam bone harditaj;
Esperon ne venkos la fajro, nek ŝtal',
Nek ies perfidoj subitaj.

Nenio en mondo elŝiros ĝin for,
Ĝi havas radikojn profunde en kor'.

Ni velas antaŭen kun kredo, fervor',
Benante la Majstron por verko,
Kaj lian anaron, de plej frua hor'
Fidelan al li, ĝis la ĉerko.

La mond' aliiĝos, la temp' pasos for,
Sed vivos eterne pri ili memor'.

La lingvo benata montriĝis al ni
Mirinda donaco ĉiela:
Per amo al hejmo, patrujo, naci',
Ni flamas en koro fidela.

Kaj same fidelaj al hejma altar',
Ni sentas nin filoj de l' tuta homar'.

En ĉiu mondparto, en ĉiu ter-zon',
En koroj de centoj da miloj,
Jam vibras por nia saluto reson',
Do kantas de l' tero ni filoj:

Tagiĝo, tagiĝo radias en rond',
La ombroj de nokto forkuras el mond'!

SALUTO EL VARSOVIO.

— | —(—)
— | —(—)

Samideanoj, akceptu vi
Korajn salutojn el Varsovi!

Akceptu ilin, tra l' tuta mond'
Disportu ĉien al nia rond'.

Diru, ke ankaŭ sur pola ter'
Batas la koroj por sankt-esper',

Ke ankaŭ tie, apud Vistul',
Renkonte brilas amik-okul',

Kaj etendiĝas fidela man',
Sonas: „Bonvenu, samidean!”

Kvankam la nokto ĉirkaŭas nin,
Ni kredas: Tago brilos en fin',

Leviĝos fine la ora sun',
Kie nur steloj flagretas nun.

Ektondros laŭte triumfa kant'
Pri fina venko de l' esperant';

Do mi nur preĝas: Ho, donu Di',
Ke ĝin ekaŭdu ankoraŭ mi!

LA REVENO DE L' FILO.

(Prologo al la Krakova Kongreso.) ¹⁾



Post foresto multejara
Venas filo mia kara;
El migrado ĉiulanda
Venas filo mia granda!

En kabano mankis pano,
Do elmigris li, infano;
Nun revenas beljunulo
Al hejmlando, al Vistulo!

Kiel volus mi, patrino
Premi lin al mia sino;
Doni volus mi festenon,
Por saluti la revenon.


Ve! ne mastras mi kabanon,
Nek liberan havas manon;
Mi, en mia propra domo,
Estas kvazaŭ fremda homo.

¹⁾ Tiu ĉi jubilea kongreso esperantista bedaŭrinde ne povis okazi en Varsovio, kie naskiĝis Esperanto.

Ĉar al vi, fratin' pli aĝa,
Post kamplimo hejmvilaĝa,
Brilas, laŭ destino dia,
Stel' alia, pli radia —

Do akceptu lin, fratino,
Per muziko kaj per vino!
Li ne vidu ĉe l' festeno,
Kiel premas min — ĉagreno.

AL LA SEMANTO.



Feliĉa la semanto estas,
Printempe kiu semis grenon
Kaj en aŭtuno ĝoje festas
De bonrikolto la solenon.

Feliĉa, kiu en la koro
Pri granda verko flame revis,
Kaj el la ĉarma revo-floro
Maturan frukton elricevis.

Arbeto, kiun, Majstro kara,
Vi plantis ĉe Vistul-rivero,

Elkreskis ĝis lazuro klara,
Etendas branĉojn ĉirkaŭ tero.

Sub ĝi kolektis tero-filojn
La jubile' de nova sento,
Per kiu frate ligas milojn
Neŭtrala lingva fundamento.

Krakovaj muroj ĝoje sonas,
Dum lernantaro multnacia
Dankeme sian Majstron kronas
Per la verdaj laŭrfolia.

En niaj koroj, granda homo,
Stariĝas viaj monumentoj;
La gloron de l' benata nomo
Ripetos ĉiuj la jarcentoj!

JUBILEA KANTATO.

(Por ĥoro kun orkestro, muziko de prof. Walewski.)

— — | — — | — (—) | (—) (—)

Feliĉa la semanto estas,
Printempe kiu semis grenon
Kaj en aŭtuno festas
De bonrikolt' solenon.
Feliĉa kies kor'
Pri granda verko revis,
Kaj el la revoflor'
La frukton elricevis.

Arbeto, kiun, Majstro kara,
Vi plantis ĉe Vistul-river',
Elkreskis ĝis lazuro klara,
Etendas branĉojn ĉirkaŭ ter'.
Sub ĝi kolektis milojn
La jubilea nova sent', (nova sent')
Kaj ligas terofilojn
Neŭtrala fundament'.

Krakovaj muroj ĝoje sonas,
Dum lernantaro multnacia
Dankeme Majstron kronas
Per verdo laŭrfolia.
En niaj koroj, granda hom',
Stariĝas monumentoj;
Benata via nom'
Ĝi vivos, vivos tra jarcentoj!

SUR UNU KORDO.

(Defendo de 1' rimo.)

— — | — — | — — | — —

Sur lir' dukorda, diris oni, ¹⁾
Ne ebla rima son', kaj jen
Pro tio devas takt-bastoni
Antikvajn ritmojn Lafonten'.

Do mi demandas ridetante,
Ĉu ne aperos ankaŭ sen
Ornama rim' estrin' de Dante, ²⁾
Vestite en ĥiton' aŭ ĥilen'. ³⁾

Dukorda liro? — Tial zumi
Kaj tinti adasiste 4) mem
Mi devas? Kordoĵn havas du mi,
Sed fingrojn kvin por kord-ekprem'!

Dukorda lir' ne igas fini
La kanton, se nur en lerneĵ' .
De l' granda majstro Paganini
Ni studis diligente plej.

Ŝiriĝis kord'!... Apollo punu
Liriston, se ne scias li
Ludadi plu, sur lasta unu 5)
En tri-kvin-sep-a pozici'!

Senrima kanto estas por mi
Flor' sekigita, sen odor',
Aŭtun-arbar' iĝanta dormi —
La muzikistoj flugis for.

Jen fluis riveret' antaŭ' mi,
Sed marĉon formas nun, kaj jam
Ne scias murmureti, ŝaŭmi;
Ĝin kovris ia ŝima skvam'.

Kun rimoj dolĉa kant', sen ili
Parol' senmelodia, ĉar

Kiel' ĝi povas fajfi, trili
Kun najtingal' en arbetar'?

De l' rim' potencon konas ĉiu,
Ĝi muĝu, fulmu, tondru tuj!
Ekfrapu kor', okul' radiu:
„Antaŭen filoj de l' patruj!“⁶⁾

Sur stel-standardo Majstro-bardo,
Skribante himnon, rimis ĝin;
Esper' sonoru al homar' do
Per rim' en teropartoj kvin!

— — —
• •

¹⁾ En la antaŭparolo al „Elektitaj fabloj el la Fontaine“ esperantigitaj de G. Vaillant (senrime).

²⁾ Fama soneto „Al mia estrino.“


³⁾ Antikvaj grekaj vestaĵoj.

⁴⁾ Adasisto, rimfaristo, trouzanta la dusufiksajn rimojn -adas, -adas, -iĝis, -iĝis, -ega, -ega k.t.p.

⁵⁾ En tiu ĉi poemo rimigas nur vortoj, apartenantaj al diversaj gramatikaj kategorioj, kion oni opiniis tute ne ebla.

⁶⁾ „Allons enfants de la patrie“ komenco de la fame konata franca revolucia kanto kaj nacia himno, la „Marseillaise“.

TRADUROJ EL DIVERSAJ LINGVOJ.



I.
Angla.

1.

SONORILOJ DE VESPERO.

(El Thomas Moore.)

*Those evening bells! those evening bells!
How many a tale their music tells!*



Sonoriloj de vespero!
Sonoriloj de vespero!
Kiom ili rakontadas
Pri juneco kaj espero!

Pri la domo de gepatroj,
Pri la dolĉa, kora ĝojo,
Kiam mi ilian sonon
Aŭdis je la lasta fojo!

Longe, longe jam forpasis
Tiuĵ de l' ĝojeco horoj!
Ekdorminte je eterne,
Jam ne batas multaj koroĵ...

En la tomboj ili loĝas
Post la ĝojo kaj sufero;
Ne por ili la muziko,
Sonoriloj de vespero!

Ankaŭ kiam mi ripozos
Je eterne en trankvilo,
Ne ekhaltos la batado
De l' vespera sonorilo,

Dum kun kanto novaj bardoj
Paŝos jam sur nia tero,
Kaj vin aŭdos, kaj vin laŭdos,
Sonoriloj de vespero! ¹⁾

¹⁾ Unuafoje presita en j. 1889 en № 2 de „La Esperanto-artisto.“

LA RENKONTO DE ŜIPOJ.

(El Thomas Moore.)

*When o'er the silent seas alone
For days and nights we 've cheerless gone.*

— | — | — | (—)

Kiam ni longe sur maroj vojiras,
Tagoj kaj noktoj eterne sin tiras,
Ho, kiel dolĉe, komprenas ŝipano,
Velon renkonti sur grand-oceano!

Ĉiu okulo radias,
„Ŝipo hoj!“ ĝoje ni krias;
Dume revenas respondoj:
„Ŝipo hoj!“ sonas sur ondoj.

Kaj malrapide ni venas proksime,
Ĉiuj pri hejmo parolas intime,
Sed nin disigas adiaŭ turmenta
Por revojiro sur maro silenta.



3.

LA LASTA ROZO.

(El Thomas Moore.)

*'T is the last rose of summer,
Left blooming alone.*

— — | — — | — — | — —

Jen floras sola, forlasita
La lasta rozo de l' somero,
Dum ĝia ĉarma gefrataro,
Velkinte, kuŝas jam sur tero.

Ne estas ia flor' parenca,
Nek roz-burĝono en proksimo,
Por interŝanĝi la ridetojn
Aŭ la sopirojn, laŭ kutimo.

Mi vin ne lasos, ho soleca,
Ĉagrene sur trunketo brili;
Ĉar la karuloj viaj dormas
Do iru, dormu vi kun ili!

Foliojn viajn mi afable
Disjetas sur bedeto jena:

Vi kuŝu apud senaroma,
Malviva kunular' ĝardena!

Mi tiel sekvu, kiam pasos
De l' amikeco flor' fidela,
Kaj el brilanta amo-ringo
Elfalos lasta ŝton' juvela.

Ĉar kiam velkis veraj koroj,
Sentemaj flugis for el rondo,
Ho! kiu volus tiam loĝi
Solece en malvarma mondo?

4.

SAGO KAJ KANTO.

(El Henry Longfellow.)

*I shot an arrow into the air,
It fell to earth, I knew not where.*



Mi pafis sagon en aeron,
Ĝi falis ien sur la teron;
Flugante tiel ĝi rapidis,
Ke mi la kuron eĉ ne vidis.

Mi spiris kanton en aeron,
Ĝi falis ien sur la teron;
Okuloj eĉ de bonvidanto
Ne sekvos flugon de la kanto.

Mi, longe poste, unu tagon,
En kverko trovis mian sagon;
La tutan kanton kun muziko
Konservis koro de amiko.

5.

LA PLUVA TAGO.

(El Henry Longfellow.)

*The day is cold, and dark, and dreary
It rains, and the wind is never weary.*

(v)—— | —— | —— | (——)

La tago malvarma, malgaja, sensuna;
Ne haltas la ventoj, nek pluvo aŭtuna;
Vinujo je l' muro putranta sin tenas,
Sed ĉiu ekblovo foliojn deprenas,
Kaj la tago — malvarma, sensuna.

Mia vivo malvarma, malgaja, sensuna!
Ne haltas la ventoj, nek pluvo aŭtuna;

Miaj pensoj sin tenas je tempoj pasintaj,
Sed falas en vento esperoj velkintaj,
Kaj la tagoj—malvarmaj, sensunaj.

Ekhaltu, ho koro malgaja, ne plendu!
Post nuboj la suno radias — atendu!
Ne sola vi tiel kun sorto batalas,
En vivon de ĉiu la pluvo ja falas,
Kelkaj tagoj — malvarmaj, sensunaj.

6.

EXCELSIOR¹⁾.

(El Henry Longfellow.)

*The shades of night were falling fast,
As through an Alpine village passed-*



La nokto rapide la ombrojn delasis,
Dum alpan vilaĝon junulo trapasis;
Li portis sur vojo la neĝa, glacia,
Standardon, kun stranga devizo ĉi-tia:
Excelsior!

¹⁾ Pli alten.

La frunto — malgaja, kaj lia okulo —
Jen glavo en suno, flamanta per brulo;
Kaj sonis kiele trumpeto arĝenta,
La vort' nekonata tra nokto silenta:
Excelsior!

Li vidis: en hejmoj feliĉaj, jen ĉarme
Bruladis la fajro, lumante kaj varme;
En supr' glaciaroj fantome sin tiris;
El lipoj junulaj ekĝemo eliris:
Excelsior!

„Ne provu la pason!“ avertis hom' griza',
„En supro minacas ventego surpriza;
Profunda torento fortrenas per ondo!“
Sed laŭte eksonis la klara respondo:
Excelsior!

„Ekhaltu!“ lin vokis knabino, „de l' laco,
Sur tiu ĉi brusto ripozu en paco!“
La larmoj ekbrilis en blua okulo,
Kaj tamen kun ĝemo rediris junulo:
Excelsior!

„Vin gardu je l' pina branĉet' sekigita!
Kaj antaŭ terura lavango subita!“

Lin laste por nokto salutis kampulo;
Kaj voĉo respondis el monta nebulo:
Excelsior!

Kun sia ĉielen levita rigardo
La piaj monaĥoj de Sankta Bernardo
En frua mateno la preĝojn murmuris,
Kaj krio skuanta aeron trakuris:
Excelsior!

Migranto, duone en neĝo fosita,
De l' hundo fidela li estis trovita;
Li tenis ankoraŭ en mano glacia
Standardon kun stranga devizo ĉi-tia:
Excelsior!

Kaj en duonlumo, la griza, malvarma,
Li kuŝis senviva, sed bela kaj ĉarma,
Kaj de malproksime, el klara ĉielo,
Defalis la voĉo, simile al stelo:
Excelsior!

7.

REGU ONDOJN!

(El James Thomson.)

*When Britain first, at Heaven's command,
Arose from out the azure main.*

(-)-(-) | -(-) | -(-) | -

Kiam' Brituj', laŝ Di-komand',
Leviĝis el lazura mar',
Jen estis leĝo de la land',
Kaj kantis garda anĝelar':
 Regu ondojn, Brita-ter',
 Britoj vivos en liber'!

Dum malfeliĉa la naci'
Fariĝas sklavo de tiran',
Por fremda timo kaj envi'
Libere floros britujan'.
 Regu ondojn, Brita-ter',
 Britoj vivos en liber'!

Post ĉiu bat' de malamik'
Nur pli majeste staros vi,

Simile kiel kverk-radik'
De vento-sku' fortiĝas pli.
 Regu ondojn, Brita-ter',
 Britoj vivos en liber'!

Se volos humiligi vin
Tiran' per ruzo aŭ per fort',
Ekflamos noble via sin'
Por via glori' kaj lia mort'.
 Regu ondojn, Brita-ter',
 Britoj vivos en liber'!

Ĉe vi prosperos vilaĝan',
Komerco brilos en urbar',
Al vi subiĝos ocean'
Kaj bordoj de l' regata mar'.
 Regu ondojn, Brita-ter',
 Britoj vivos en liber'!

La muzojn, anojn de l' liber',
Vi gaste flegos laŭ destin';
Insul' benata, bela ter',
Protektos multaj koroj vin!
 Regu ondojn, Brita ter',
 Britoj vivos en liber'!

LA SILENTAJ VOĈOJ.

(El Alfred Tennyson.)

*When the dumb Hour, clothed in black,
Brings the dreams about my bed.*

— — — | — — — | — — — | — — — | — (—)

Kiame muta horo, nigrulin',
Al mia lito venas kun sonĝaro,
Ne voku reen tiel ofte min,
Silentaj voĉoj de la mortintaro!
Al vala voj', malantaŭ mi restinta,
Kaj al la suna lumo foririnta;

Sed voku min, ho voĉoj de l' silento,
Antaŭen, al stelara firmamento,
Flagranta en altaĵoj super mi,
Antaŭen, supren! ĉiam pli!

II.

Bohema.

9.

LA KRONETO.

(El la Kralodvora Manuskripto.)

*Vêje vêtr'ieček z kniežeckých lesův
Bêže zmlitka ku potoku.*

— ∪ | — ∪ | — ∪

De l' arbaro princa
Blovas la venteto;
La knabino kuras
Al la rivereto.

Kiam per siteloj
Akvon ŝi ekprenas,
Sur ŝaŭmanta ondo
Florkroneto venas.

Bela la kroneto,
Dolĉa la odoro:
De la violetoj,
De la roza floro.

— „Diru, ho floretoj,
Kiu, en mateno,
Plantis vin en molan
Teron de l' ĝardeno?

Mia don' al tiu,
Ho kroneto flora,
Estus la brilanta
Mia ringo ora.

Diru, ho kroneto,
Kiu, en mateno,
Ŝiris la floretojn,
Ligis per fadeno?

Mia don' al tiu,
Ho kroneto kara,
Estus la plej bela
Mia pinglo hara.

Diru, ho kroneto,
Kiu, en vespero,
Ĵetis vin en klaran
Akvon de l' rivero?

Donus mi al tiu,
Donus mi doneton:

De la kapo mia
Rozan la kroneton.⁴

La knabino kaptas
La kroneton ĉarman, —
Falas, ha! en akvon
Falas ŝi malvarman.

10.

PRINTEMPA KANTO.

(El Jaroslav Vrchlický.)

*Skr'ivanek vylit' do mraku
A jasa.*

() — | () — | () —

Flirtis alaŭd' el sekalo,
Ĝojante;
El griza, nuba vualo
Al miroplena la valo
Ŝutas perlaron kante.

Kaj ĉiu tono arĝente
Sonoras.
Tero aŭskultas atente,
Burĝonojn divenas sente,
Per freŝ-argil' odoras.

III.
Bulgara.

11.

SALUTO AL BALKANOJ.

(El Penĉo Slavejkov.)

*Aĥ, kade je, ta kade je
Mojto serdce kieto?*

— | — | — | (—)

Kie vi, ho ensorĉita
Koro mia, estas?
Enuanta, suferanta
Kor' ĉe mi ne restas.

Ne ĉi tie estas mia
Koro, la malsana,
Sed ĝi estas tie supre,
Sur montar' Balkana.

Sed vi estas malproksime,
Balkanaro bela,

Vi patruja, sankta, kara
Hejmo subĉiela!

Kie ajn mi vage migrus,
Serĉas koro mia
Vin, mirinda, vin, gepatra
Loko familia!

Kie ajn en bela lando
Resti for mi devas,
Mi de l' koro por ĉi tio
Dankon ne ricevas.

Por mi restas same karaj,
En kampar', ĉe l' maro,
Vi balkanaj, vi mirindaj
Montoj kaj tombaro.

Korsalutas mi montaron
Sub la neĝvualoj,
Vin, kvietaj ebenajoj
Kaj profundaj valoj!

Korsaluton al ombrecaj
Densaj vi arbaroj!

Korsaluton, bonodoraj
Verdaj vi herbaroj!

Korsaluton al balkanaj
Akvoj la arĝentaj,
Al ŝaŭmantaj akvofaloj,
Kaj al vi, torentoj!

Mi salutas vin, dezertoj,
Rokoj efioplenaj,
Intermontoj vi malsekaj,
Kavoj malserenaj!

Kie ajn vi estas, ventoj,
Perflugile venu,
Kaj kun vi, al mia lando,
Korsalutojn prenu!

Ĉu mi sanas, aŭ malsanas
Malbenita horo;
Sole tie, sole tie
Estas mia koro!

IV.

Dana-Norvega.

12.

ELEKTO.

(El Björnstjerne Björnson.)

*Jeg vælger mig april!
I den det gamle faller.*

— — | — — | — (—)

Mi voĉas por April!
Malnovo tiam falas,
Novaj' pri rajt' batalas,
Fariĝas tial bruo;
Sed estas rekonstruo
Pli bona ol trankvil'.

Mi voĉas por April!
Ĝi skuas malkviete,
Dissolvas, kaj ridete
Senkatenigas fonton,
Fortigas la estonton
De la somera bril'!

LA NEVIDEBLA HÖRO.

(El „Brand“ de Henrik Ibsen.)

*Aldrig, aldrig blir du lig ham,
Thi i ködet er du skabt.*

— — | — — | — — | — — | (—)

Neniam, homo, vi similos Lin,
En korpo estas vi kreita;
Ĉu vi Lin sekvos, aŭ perfidos Lin,
Egale estas vi perdita.

Neniam, vermo, vi similos Lin,
De morto estas vi signita;
Ĉu vi Lin sekvos, aŭ perfidos Lin,
Egale estas vi juĝita.

Revul', neniam vi similos Lin,
Vi estas senheredigita;
Ofero via ne riĉigos Lin,
Por tero estas vi kreita!

V.
Finna.

14.

LA FUNEBRO DE PATRINO.

(El eposo „Kalevala“)

*Emo tuosta itkemähän,
Kyynevierus vieremähän.*



La patrino ploras, ploras,
Larmoj fluas el okuloj,
Ĝis el larmoj tri riveroj
En la landon for disfluas.

Kaj sur tiuj tri riveroj
Tri leviĝis insuletoj,
Kaj sur ĉiu insuleto
Ora monto supreniĝis,
Kaj sur ĉiu ora monto
Tri elkreskis betuletoj,
Kaj sur ĉiu betuleto
Tri kukoloj kantas plende.

Unu vokas: Amo! amo!
Dua vokas: Ho fianĉo!
Tria vokas: Sorto, sorto!

Kiu vokas: Amo, amo!
Tri monatojn ĉiam plendas
Al knabino la sen-ama,
Kiu kuŝas en la maro.

Kiu vokas: Ho fianĉo!
Ses monatojn ĉiam plendas
Al fianĉo la senĝoja,
Kiu ploras pri droninta
Sia bela fianĉino,
Kiu kuŝas en la maro.

Kiu vokas: Sorto! sorto!
Plendas dum la tuta vivo
Al patrino doloranta,
Kiu dum la tuta vivo
Verŝas larmojn senkonsole.

V.
Flandra-Holanda.

15.

LA FLANDRA LEONO.

(El H. J. van Peene.)

*Zij zullen hem niet temmen
Den fieren Vlaamschen Leeuw.*

— — | — — | — (—)

Neniam kvietigos
Leonon flandran vi;
Li ĝuos liberecon,
Nenion helpos kri'.

Neniam kvietigos,
Dum vivos ni, leon',
Dum havas li ungegojn
Kaj dentojn, laŭ bezon'.

R e k a n t a j o .

Neniam kvietigos,
Dum vivos ni, leon',

Dum havas li ungegojn
Kaj dentojn, laŭ bezon'.

La temp' forglutas urbojn
Kaj falas iam tron',
Sed ne pereos nia
Popolo kun leon'.

Almarŝas malamikoj,
Minacas mort-furi',
Ni ridas pri danĝeroj,
Leono apud ni.

Batalas li jarmilon
Por flandra kara sort',
Kaj restis li potenca
Kaj en juneca fort'.

Pensante, ke li svenis
Aliras vi kun mok',
Minace kaj terure
Leviĝas li el lok'.

Kaj se intencas oni
Per fals', perfid' en fin',
Surprize lin ataki,
Malliberigi lin,

Atentas li pri ĉiu
Suspekta via gest',
Hirtigas kolhararon
Kaj muĝas reĝa best'.

Sufiĉe da incitoj!
Jen venĝos potencul':
Al malamik' li saltas
Kun fajro en okul'.

Disŝiras li kaj rompas
En la batal-furi';
De sango makulite,
Triumfe muĝas li.

Neniam kvietiĝos,
Dum vivos ni, leon',
Dum havas li ungegojn
Kaj dentojn, laŭ bezon'.

VII.
Franca.

16.

RANO KAJ BOVO.

(El Jean de La Fontaine.)

*La grenouille vit un boeuf,
Qui lui semblait de belle taille.*

— | — | — | —
— | — | — | (—)

Sur herbej' sin paŝtis bovo,
Altekreska, diktaĵa.
Rano, eta kiel ovo,
Lin ekvidis, do, envia,
Sin larĝigis kaj plenblovis,
Streĉis, kiel ĝi nur povis,
Por bovon egali laŭ diko.

Ĝi diris al sia bapto: „Amiko,
Ĉu tio sufiĉas?“ — „Ne!“ — „Mankas peceto?“ —
— „Tre multe!“ — „Nun?“ — „Same!“ — „Jen, kiel mi devis!“
— „Vi ne proksimiĝas!“ — Do nia raneto
Sin tiel plenbovis, ke fine ĝi krevis.

17.

KORVO KAJ VULPO.

(El Jean de La Fontaine.)

*Maître Corbeau, sur un arbre perché,
Tenait en son bec un fromage.*



Sur arbo sidante, la korvo-sinjor',
Fromaĝon en beko li tenis;
La vulp', allogite per bona odor',
Kun tia parolo alvenis:
„Bontagon, sinjoro nobela!
Ho kiel vi estas gracia kaj bela!
Se via voĉet', en kompar',
Ne cedas al via plumar',
Vi estas Fenikso de arboldantoj!“

La korvo, ĝojega pro tiu admir',
Por montri belecon de l' voĉo en kantoj,
Malfermas la bekon: „Grak!“ falas akir',
Kaj vulpo, kaptante ĝin, diras: „Eksciu,
Simplul', ke flatist' vivas ĉiu

Je l' kosto de lin aŭskultanta person'.
Fromaĝon valoras ja ĉi-lecion!'
La korvo ekjuris en honto, konfuzo,
Ke poste neniu lin trompos per ruzo.

18.

CIKADO KAJ FORMIKO.

(El Jean de La Fontaine.)

*La cigale, ayant chanté
Tout l'été.*

— | — | — | — (—)

Kantis dum somer' sen fin'
Cikadin'.
Kiam frosta vento blovis,
Sen provizo ŝin ektrovis,
Sen malgranda eĉ pecet'
Da muŝeto aŭ vermet';
La malsato pells ŝin
Al najbara formikin'.

Kaj ŝi petis kun insisto:
„Donu grajnojn por ekzisto

Ĝis la nova jar-sezon'.
Mi vin pagos, laŭ ordon',
En Aŭgust', pro best-honor',
La procenton kun valor'".

Ke ne pekas formikino
Per pruntego, estas vere;
„Kion faris vi somere?“
Diris ŝi al pruntulino.

— „Tage, nokte al venantoj,
Ne mallaŭdu — kantis mi“.
— „Kantis? — gaja jen meti!“
Nun ekdancu post la kantoj!“

LA PAPILIO.

(El Alphonse de Lamartine.)

*Naitre avec le printemps, mourir avec les roses,
Sur l' aile du zéphyr nager dans un ciel pur.*

— — | — — | — || — — — | — — | — (—)

Naskiĝi kun printemp' kaj morti kun la rozo,
Naĝadi kun zefir' en la ĉielo pura;
Sur florburĝono sin balanci por ripozo,
Ebrie de l' arom', de lum', aer' lazura.

La junan polvon for de flugiletoj skui,
Al la ĉiel-arkaj' kun la bloveto flui,
Jen de la papili' la ensorĉita cel'.

Simile la dezir': neniam ekhaltante,
Sen plena kontentec' tuŝetas ĉion vante,
Pro la volupt' en fin' — revenas al ĉiel'.

LA TOMBO KAJ LA ROZO.

(El Victor Hugo.)

*La tombe dit à la rose:**— Des pleurs dont l'aube l'arrose*

— | — | — | — (—)

La tombo diris al la rozo:

„El rosaj larmoj, sen ripozo,

Vi kion faras, ama flor'?”

La roz' al tombo por rediro:

„Vi kion faras el akiro

Nutranta vin je ĉiu hor'?”

La roz': „En ombro, tomb' malvarma,

Mi faras el la roso larma

Aromon ambran, de miel'“.

La tombo: „Mi, ho flor' plendanta,

El ĉiu la anim' venanta

Anĝelon faras por ĉiel'!“

LA ROMPITA VAZO.

(El Sully Prudhomme.)

*Le vase, où meurt cette verveine,
D'un coup d'éventail fut fêlé.*

— — | — — | — — | — — | — (—)

La vazon, kie mortas la verben',
Per ventumilo ies man' ekfendis;
La bat' apenaŭ tuŝis ĝin, ĉar jen
Nenia bru' resone sin etendis.

Sed la fendeto, tiel delikata,
Kristalon ĉiutage pli mordante,
Sur sia vojo certa, nevidata,
Rondiris malrapide, sed konstante.

La freŝa akvo gutis for silente,
La suko de la flor' elĉerpis sin;
Neniu ĝin supozas ĉi-momente,
Rompita estas, do ne tuŝu ĝin!

Simile man' amata, iafoje,
La koron tuŝetante, ĝin ekfendas;

La koro poste krevas, kaj malĝoje
La flor' de l' amo pereante plendas.

Por mond-okuloj restas ĝi senvunda;
Sed ĉiam kreskas, kun mallaŭta plor',
Vundeto delikata kaj profunda,
Ne tuŝu ĝin — rompita estas kor'!

22.

AŬTUNA KANTO.

(El Paul Verlaine.)

*Les sanglots longs
Des violons
De l' automne.*

— — — | — (—)
— — | — (—)

Dum ĝeme-sona,
La violona
Aŭtuna spir',
Premiĝas koro •
De monotona
Sopir'.

Iĝante pala
Ĉe la metala
Horo-sonor',
De l' rememoro
Iras kun ploro
Mi for.

La vento blovas
Kaj for min ŝovas,
Kaj estas mi,
Kiel falinta
Kaj flaviĝinta
Foli'.

23.

DEMANDOJ.

El Jules Laforgue.)

— *L'espace?*
Mon coeur
Y meurt.

—(—)

— La spaco?
Kortim'
Sen lim',
Ne pacol

— Virino?
Jen sort':
La mort'
En sino!

— La revo?
Jes, ben',
Post plen-
Forlevo.

— Sed kion
Do fari,
Por ĉion
Ripari?

— Ĉi tion
Kaj ion,
Ĉi tie
Kaj ie.

VIII.
Germana.

24.

LA REĜO DE ELFOJ.

(El Wolfgang von Goethe.)

*Wer reitet so spät, durch Nacht und Wind?
Es ist der Vater mit seinem Kind.*



Kiu rajdas tra nokto, kun vento pro l' vet?
Tio estas la patro kun sia filet'.
La infanon li bone per brak' ĉirkaŭprenas,
De malvarmo gardante, ĉe l' brusto lin tenas.

„Kial kaŝas, filet', la vizaĝon vi time?“ —
„Ĉu ne vidas vi, patro, elfreĝon proksime?
La elfreĝon kun longa trenajo kaj kron?“
„Mia filo, ĝi estas nebula nur zon!“

„Infaneto amata, ho venu al mi!
La plej belajn ludetojn mi ludos kun vi;

Apud bordo jen brilas floretoj koloraj,
Kaj ĉe mia patrino vestaĵoj la oraj“.

„Ĉu vi tute ne aŭdas, ho mia patreto,
Kion al mi promesas elfreĝ' en sekreto?“

„Trankviliĝu, infano, kaj kreu al mi:
Murmuretas la vento en velka foli“.

„Venu, bela knabeto, tre bone vi fartos:
Miaj junaj filinoj karese vin vartos;
La filinoj, majstrinoj en danca rondform',
Balancante, kantante vin lulos al dorm“.

„Ĉu ne vidas vi tie, patret' mia kara,
De elfreĝo filinojn en loko malklara?“

„Mia filo, fileto, mi vidas precize:
La maljunaj salikoj prezentas sin grize“.

„Mi vin amas, belul', vin posedi deziras,
Do mi uzos perforton, ĉar mem vi ne iras!“

„Mia patro, li kaptas, li prenas min for!
Al mi faris elfreĝo doloron je l' kor!“ —

Frostetremas la patro, akcelas rapidoa,
En la brakoj li tenas ĝemantan la idon;
Li alvenas penegge al hejma la kort';
En la brakoj infanon pacigis la mort'.

LA ELFREGO.

(Laŭ ritmo de l'originalo, por la muziko de Schubert.)

*Wer reitet so spät durch Nacht und Wind?
Es ist der Vater mit seinem Kind.*

Kiu rajdas tra nokt'. kun vent' pro l' vet'?
Jen estas patro kun infanet';
Li havas knabon en zorga pen',
Lin tenas varme en ĉirkaŭpren'.

„Filet', vi kial ektemis pro tim'?"
„Patreto, jen! elfreĝ' en proksim'!
Elfreĝo kun trenaj' kaj kron'!"
„Filet', ĝi estas nebulzon'“.

„Ho venu do, infan' al mi!
Mi belajn ludojn ludos kun vi;
Ĉe l' bordo brilas kolora flor',
Mia panjo havas vestojn el or'!“

„Patret', ĉu vi aŭdas, ho mia patret',
Kion promesas elfreĝ' en sekret'!"
„Ne timu, filet', ne timu vi,
Murmuras vent' en velka foli'“.

„Knabeto bela, sekvu min!
La filinoj miaj belvartos vin:
La filinoj, lertaj en danca rond-form',
Kantante, dancante vin lulos al dorm'“.


„Patret', ĉu vi vidas, patret', mia kar'?
En lok' malhela jen, elfinar'!“
„Filet', filet', mi vidas precize:
Maljunaj salikoj ŝajnas jen grize“.

„Mi amas vin, ĉarmanta vi mia knabet',
Se mem vi ne iros, mi prenos sen pet'!“
„Patreto, patreto, li prenas min for!
Elfreĝo kaptas min, ho dolor'!“

La patro tremas, kun granda rapid'
Li rajdas, en brakoj veplendas la id'.
Alvenas li al hejma kort',
Infanon prenis jam for la mort'.

TROVITA.

(El Wolfgang von Goethe).

*Ich ging im Wald**So für mich hin.*

Mi foje arbaron
 Promene eniris,
 Kaj serĉi nenion
 En penso deziris.

Mi vidis, en ombro
 Jen staras floreto:
 Steleto lumanta
 Aŭ blu-okuleto.

Mi volis ĝin ŝiri,
 Sed plore ĝi diras:
 „Ĉu por ke mi velku,
 Vi tial min ŝiras?“

Do mi ĝin elfosis
 Kun radikareto,
 Kaj portis al mia
 Ĝarden' ĉe l' dometo.

En loko trankvila
Plantite karese,
Ĝi kreskas, burĝonas,
Kaj floras senĉese.

27.

RUGOBUŜA KNABINETO.

(El Heinrich Heine.)

*Mädchen mit dem roten Mündchen,
Mit den Aeuglein süß und klar.*

—() | —() | —() | —()

Ruĝobuŝa knabineto
Kun la dolĉa klar-okul'!
Nur pri vi, ho knabineto,
Ĉiam pensas, mi solul'.

Longa vintre la vespero,
Do mi volus, knabinet',
Kun vi ridi, kun vi sidi
En trankvila kameret',

Volus premi buŝon mian
Al la eta blanka man',
Plori larmon emocian
Sur vin, eta blanka man'!

SALUTO AL MARO.

(El Heinrich Heine.)

*Thalatta! Thalatta!**Sei mir gegrüsst du ewiges Meer!*

()— () | ()— () | ()— () | ()— () | *)

Thalatta! Thalatta!

Mi vin salutas, eterna mar'!

Mi vin salutas dekmilfoje,

El koro ĝojanta,

Kiel vin salutis

Dek mil grekaj koroj,

Fortaj en mizero,

Hejmon postulantaj,

En mondo ĝloraj, grekaj koroj.

Balancis sin ondoj,

Balancis kaj bruis;

La suno verŝis sur ilin rapide

La rozajn ludantajn lumojn;

*) En la versoj estas 2 ĝis 5 akcentitaj silaboj, kiujn apartigas 1 aŭ 2 neakcentitaj.

La timigitaj mevoj aroj
Flugadis for, laŭte kriante,
Frapis la hufoj, sonoris la ŝildoj,
Kaj for eksonis kiel venka kri':
Thalatta! Thalatta!

Mi vin salutas, eterna mar'!
Kiel lingvo hejmlanda vi bruas,
Kiel sonĝoj infanaj io briletas
Sur via vasta balanca ondar'.
Al mi rememoro rakontas denove,
Pri ĉiu amata bela ludilo,
Pri tiuj brilantaj donoj kristnaskaj,
Pri tiuj koralaj ruĝaj arbetoj,
Orfiŝoj, perloj kaj konkoj koloraj,
Kiujn vi kaŝas mistere
Malsupre en domo kristala.

Ho, kiel enuis mi en la fremdlando!
Kiel floro velkinta
En la kapsul' de botanikisto
Kuŝis la kor' en la brust'.
Mi sentas, kvazaŭ longan vintron
Malsana mi sidis en ĉambro malluma,
Kaj nun mi ĝis lasas subite
Kaj brile kontraŭ mi radias

La smaragda printempo, vekita de l' suno,
Kaj bruas la blankaj arboj florantaj,
Kaj la junaj floroj min rigardas
Per siaj okuloj, la bonodoraj;
Ĉio sonas, aromas, respiras kaj ridas,
Kaj en blua ĉielo kantas birdetoj —
Thalatta! Thalatta!

Vi brava kor' retiriĝa!
Kiel ofte, maldolĉe-ofte,
Vin premis de l' Nordo barbarinoj!
El grandaj okuloj venkantaj
Ili pafis brulantajn sagojn;
Per vortoj kurbe glatitaj
Minacis fendi mian bruston;
Per kojnoskribaj biletoj disrompis
Mizeran cerbon mian surdigitan —
Vane mi tenis kontraŭen la ŝildon,
La sagoj siblis, la batoj krakis,
Kaj de la nordaj barbarinoj
Mi estis premita ĝis la mar' —
Kaj libere spirante mi vin eksalutas,
Amata, savanta mar',
Thalatta! Thalatta!

AL LA VESPERA STELO.

(El „Tannhäuser“ de Richard Wagner.)

*Wie Todesahnung Dämm'rung deckt die Lande,
Umhüllt das Tal mit schwärzlichem Gewande*

— — | — — | — — | — — | — (—)
— — | — — | — — | — (—)

Funebre kovras la krepusko valon,
Etendis nokto nigran la vualon.
Deziras supren flugi la anim',
Sed tenas ĝin de nokt-teruroj tim'.

Aperas jen, vi stelo la plej kara!
De malproksimo fluas lumo klara,
Disigas ombrojn ĉarma la radi'
Amike montras la vojon al mi.

Ravite, ho vespera stel',
Mi vin salutas sur ĉiel';
Kaj de fidela mia kor'
Salutu ŝin en tiu hor',
Kiame flugos ŝi de l' tero,
Al anĝelar' en supra sfero.

EMBARASO.

(Kanteto.)

*Ich möchte dir wohl etwas sagen,
Doch weiss ich leider selbst nicht was.*

— — | — — | — — | — (—)

Al vi mi volus diri ion,
Sed kion, mem ne scias mi;
Kaj se vi min demandus tion,
Mi nur respondus tion ĉi:
 El tuta kor' mi amas vin,
 Nur sole vin, nur vin!

Se kanti kanton mi ekprovas
Al vi irantan, al la kor',
Mi sole unu vorton trovas
En la anim' je ĉiu hor':
 El tuta kor' mi amas vin,
 Nur sole vin, nur vin!

Mi volus skribi letereton,
Malkovrus mian koron ĝi;
Tro malfacile! nur vorteton
Mi skribas kaj ne scias pli:
 El tuta kor' mi amas vin,
 Nur sole vin, nur vin!

IX.

Greka antikva.

31.

PROMETEO KATENITA.

(El la dramo de Ajskhylos.)

*Ho dios ajthèr kàj takypteroj pnoàj,
Potamôn te pegàj pontion te kymàton*

— | — | — | — | — | —)
— | — | — | —

Etero dia kaj rapid-flugilaj blovoj!
Torento-fontoj kaj de l' ocean-ondegoj
Sennombraj briloj! vi, ĉiopatrino tero!
Kaj vi, vidanta ĉion, suna rond', rigardu:
Jen kion de l' diar' suferas mi, mem dio!
Rigardu, kian humiligon
Kaj turmentadon dum jarmiloj
Suferos mi! Elpensis jen
Por mi la nova estro de la dioj
Ĉi tiun senhonoran malliberon!
Ve, ve! mi ĝemas pro l' nuneco
Kaj pro l' sufer' estonta! Kiam ajn
Finiĝos miaj turmentoj?

Sed kion diras mi? Ĉu mi ne antaŭvidas
Plej malproksiman estontecon? Min surprizi
Sufer' ne povas ja. Mi devas destinaĵon
Toleri plej facile, konsciante tion,
Ke estas ĝi nerezistebla mond-nepreco.
Sed kiel ŝanĝos sorto tiun ĉi ekziston,
Ne diros mi, nek mi silentos, sed benaĵon
Mi donis al homar' kaj nun mi jugon portas.
En stip-bastonon kaŝis mi la fajrofonton
Ŝtelakiritan, kiu granda ben' al homoj
Kaj instruist' fariĝis ja pri ĉiuj artoj.
Pro tia peko mi suferas tian punon,
Forĝite per katenoj al aer'-altajoj.

Ho! ho!

Jen kies eĥo? Kies spiro min alblovas?
Ĉu estas dioj, homoj? aŭ ĉu ambaŭ kune
Alvenas al limrando mem de l' mondo,
Por vidi mian suferadon? aŭ pro kio?
Rigardu katenitan, malfeliĉan dion,
Min, Zeŭsan malamikon, for de kiu
Malame sin forturnas ĉiuj dioj,
En Zeŭsan or-kortegon enirantaj,
Ĉar tro mi aŭdis la homaron!
Ve, ve! mi ree kian bruon aŭdas?
De birda plumar'? Etero ekstremis
De zume ŝvingataj malpezajflugiloj!
Sed kio ajn venas, ĝi vekas teruron.

STROFO PRI AMO.

(El „Ifigéneja“ de Eŭripides.)

*Mákares hoj metrias theŭ
Metá te sofrosynas meté-
skion léktron Afrodítas.*

— ∪ | (∪)— ∪ | (∪)— ∪ | (∪)— (∪)

Feliĉulo el amo-font'
Trinkas modere, sorbas nur
El Afrodita pokalo.
Klara ĉielo alridas lin,
Ondoj-muĝadon ne aŭdas li.

Per duspecaj saĝoj de l' am'
Pafas Eros, di-orharul';
Feliĉigas tiu ĉi jet',
La alia estas malbeno.

Do fortununu duan de mi;
Min favoru Kipra diino!
Por mi estu kvieta volupt',
Nur la ĉasta flamo por mi!
Benu, ho Afrodito min,
Sed forestu via furio!

X.

Greka nova.

33.

LA BLONDULINO.

(El Solomos.)

*Tin idha tin Ksanthùla,
Tin idha pses argà.*

— — | — — | — (—)

Mi vidis ŝin hieraŭ
Malfrue: Blondulin'
Eniris barkon, kiu
El hejm' forportis ŝin.

Plenblovis blankajn velojn
De l' freŝa vento flu',
Kiel kolomb' etendas
Blank-flugiletojn du.

Salutis ŝi amikojn,
Salutis kun malĝoj',
Adiaŭ-redirante
Per tuk' je lasta foj'.

Kaj post la salutado
Mi restis tie ĉi,
Ĝis malproksimo ĉion
Forkaŝis jam al mi.

Mi post mallonga tempo
Ne sciis diri jam,
Ĉu brilas blanka velo
Aŭ mara ŝaŭmo-skvam'.

Post kiam velon, tukon,
Forkaŝis akvo-stri',
Ekploris la amikoj,
Ekploris ankaŭ mi.

Ne barko min plorigis,
Nek vel' plorigis min,
Mi ploris pro iranta
Fremdejon blondulin'.

Ne ploras mi pro barko,
Kun blanka vel' sur mar',
Mi ploras blondulinon
Kun ŝia blonda har''

XI.

Hispana.

34.

LA ARBO DE L' ESPERO.

(El Martinez de la Rosa.)

*Al pié nace de una cuna
El árbol de la esperanza*

— — — | — — | — — | — —

Elkreskas arbo de l' espero
Ĉe la lulilo de l' infano,
Laŭ vent-ekblovo balancate,
Rompebla kiel trema kano.

Per feliĉeco ĝin karesas
Zefiro dolĉa dum momento;
Tuj ĝin sekigas vent' el nordo
Aŭ suda ĝin bruligas vento.

Nur tre malofte maturiĝas
La frukto el floraro ĉarma;
Kiele frua migdal-floro
Pereas dum maten' malvarma.

Pli alten kiom ĝi leviĝas,
Des pli minacas ĝin danĝeroj;
Kiele cedro altekreska
Alvokas fulmojn el eteroj.

Ripozas aglo la fera
En ĝia verda pinto alte,
Dum la insektoj-perfiduloj
Malsupre mordas ĝin senhalte.

Profunden iras la radikoj,
For etendiĝas ĉiu branĉo—
Apenaŭ arbo donas ombbron,
Faligas ĝin de l' mort' ektranĉo.

XII.

Hungara.

35.

PATRIOTA KANTO.

(El Sándor Petöti.)

Devizo.

Szabadság szerelem,

E kettő kell nekem.

— — | — — | — — | — —

La amon kaj sendependecon,

Nur ilin kore mi rekonas;

Al mia amo — liberecon,

Mi amon al patruj' fordonas.

Tied vagyok, tied hazám,

E szív, e lélek.

— — | — — | — (— | — —)

Via estas, ho patrujo,

Mia kor', anim'!

Kiun amus mi en mondo,

Se ne vin sen lim'?

En preĝej' de mia sino
Vi altar', patruj',
Ĝin bezonu, la preĝejon
Mi faligos tuj!

Kaj por lasta fojo preĝos
La falanta sin':
Benu Dio la patrujon,
Benu Dio ĝin!

Sed mi diras al neniu
El amika rond',
Ke vi estas plejkarajo
Mia en la mond'.

Viajn paŝojn mi senĉese
Sekvas sur la ter',
Kaj ne kiel ombr' migranton
Nur dum belveter'.

Sed, se kreskas ombro, kiam
Venas la vesper',
Pli malĝojas mi pro nokto
Super patra ter'.

Iras mi al viaj anoj,
Kun pokal' en man'
Peti sorton, ke rebrilu
Vi per nova san'.

Trinkas mi el glas' ĝis lasta
La gutet' da vin',
Vin' maldolĉa—miaj larmoj
Falas ja en ĝin.

XIII.


Itala.

36.

LA INTERNA ZORGO.

(El Pietro Metastasio.)

*Se a ciascun l' interno affanno
Si leggesse in fronte scritto.*



Se zorgo interna skribite
Sur fruntoj legiĝus, kunfrato,
Tre ofte envio subite
For-cedus al kora kompato.

37.

MIA ESTRINO.

(El Dante Alighieri.)

*Tanto gentile e tanto onesta pare
La Donna mia quand' ella altrui saluta.*

— — | — — | — — | — — | — —

Aperas jen, modeste kaj ĝentile,
Estrino mia kun la gest' saluta;
Tremante ĉiu lango iĝas muta,
En bril' okuloj klinas sin humile.

Sentante laŭdojn, iras ŝi trankvile,
De l' honesteco envestite tuta,
Sur teron kvazaŭ ĉielalto kruta
Fluigis mirindajon perflugile.

Kaj ŝi afable donas por admiroj
Dolĉecon tian per okul' al koro,
Ke tiu nur ĝin konas, kiu provas;

De ŝiaj lipoj sin karese movas
Spireto ama, plena de favoro,
Ke diras al anim': „Al mi, sopiroj!“

KORA ENUO.

(Ario de Tomaso Giordani.)


*Caro mio ben,
Credi mi almen'*~~~~ | ~~~~~
~~~~ | ~~~~~Ho, karulin',  
Vi kredu ĝin:  
Sen vi, trezor',  
Enuas kor'.Por mi, fidela,  
En ĉiu hor',  
Ĉesu kruela  
Via rigor'.Ho, amatin',  
Vi kredu ĝin:  
Sen vi, trezor',  
Sopiras kor'!

\_\_\_\_\_

## LA MORTO DE JULIA.

(Ario de Luigi Denza.)

*L' ho veduta distesa sul suo letto,  
E in sembianza pareva un angioletto.*



Etendite sur la litajo hela,  
Ŝi similis al anĝelet' ĉiela.  
Ŝi, anĝelo, rompita de sufero,  
Min alvokis, flugonte for el tero.

Kaj ŝi plendis pri kora la doloro,  
Ke nur pacon deziras ŝia koro,  
Kaj sopiris, ke Dio sendu morton,  
Ĉar por vivo ŝi jam ne havas forton.

Do, tremante, aliris mi proksime,  
Metis buŝon al ŝia frunto time.  
La vizaĝon la morto glaciigis;  
Malbenita dolor'! min ne mortigis.

Ŝin detruis de l' amo la pasio;  
Malfeliĉa ne sciis ŝi pri tio;  
Nek divenis la kaŭzon hom' alia.  
Forportita ŝi estis, kara mia!

XIV.

Japanana.

40.

UTA-KANTOJ.

*Aŝibiki no*

*Jamadori no o no.*

— ∪ | — ∪ | — ∪ | (— ∪)

Kiel etendita  
Pava vosto—nokto fluas.  
Kiel longe mi enuas,  
Sopirante, dormiĝante,  
Sole, sur sternajo lita.

---

*Ŝika — ŝima — no*

*Jamato — gokoro -- vo.*

∪—∪ | — ∪ | — ∪ | (— ∪)

Al kio do similas vi,  
Anim' de Sunleviĝa-Tero?  
Similas vi, en vero,  
Al bonodor' de ĉerizflor'  
En sunleviĝa la radi'.



XV.

Kartvela.

41.

EDZIĜA KANTO.

(El Vaja Pŝavala.)

*Didebà ŝenda cata mkrobeŝo,  
Didebà ŝenda bunebis dzaŝo.*

— | — | — | — | —  
— | — | — | — | —(—)

Gloron al vi, reganto la ĉiela,  
Al forto de l' naturo sonu glor'!  
Gloron al vi, ho fianĉino bela,  
Kaj al fianĉo en feliĉa hor'!

El amo plektos mi por ambaŭ kronon,  
Belornamita estos ĝia rond':  
Mi malavare ligos ĉian bonon,  
Troviton ie en la vasta mond'.

Sincere dediĉita violfloro  
Por gefianĉoj estu kap-ornam'.  
Ĉar ame batas ankaŭ mia koro,  
Do ĝin flamigas via granda am'.

Karesa sent', liganta feliĉulojn,  
Allogas ĉies koron kaj okulojn.

---

XVI.

Kataluna.

42.

LA ĜARDENO DE HESPERIDOJ.

(El „Atlantido“ de Hiacinto Verdaguer.)

*Cervos gegants rumbejan ses banyes d'alt brancatge  
Que pren l'aucell per arbres d'excelsa magnitut.*



Giganta cervo skuas la korn-branĉaron sian,  
La birdojn logas ĝia alteco eminenta;  
Timigas mastodonto gazelon la gracian,  
Kaj mastodonton pelas mamuto korpulenta.

Sur vojo al ĝardeno, tra l' arbaret' odora,  
Spionas la bufalojn leono el insid';  
Kaj kiam triafoje leviĝas suno ora,  
Oazo lumbriila prezentas sin al vid'.

En mirto-arbetaĵoj karesas je tempioj  
Ventetoj saturitaj duone per miel',  
Kaj milde murmuretas fontanoj kaj folioj,  
Kaj semas juvelaron ardanta la ĉiel'.

Laŭvice altaj cedroj, malhelaj cinamonoj,  
Kliniĝas pro dolĉpezo de sia nova flor';  
Portikon verdan formas po du la arbokronoj,  
Tra fruktokradoj brilas tagiĝa rozkolor'.

Per mil kaskadoj falas torento ŝaŭme-onda  
En grotoj el kristalo, sur ŝtupoj el porfir';  
Malligas la harplektojn da nimfoj aro blonda  
En akvaj la turniĝoj, laŭlonge de l' flu-ir'.

En riverbordaj herboj, kiele pluv' da perloj,  
La paradiza birdo saltetas ĝojoplene;  
Aŭdiĝas gaja trilo de la timemaj merloj,  
Kaj sopirema turdo ekĝemis jen ĉagrene.


XVII.  
Latina.

43.

MONUMENTO.

(El Horatius.)

*Eregi monumentum aere perennius,  
Regalique situ pyramidum altius.*



Monumenton, ol bronz' kreis pli daŭran mi,  
Supron de l' piramid' alte superas ĝi.  
Nek pluvega malsek', nek plej impeta vent'  
Ĝin detruos en kur' longa de jaroj, nek  
Tempo, kiu sen halt' pasas senfine for.

Ne tutpreaos min mort', mia pli bona part'  
Vivos plu, kaj la glor' kreskos senĉese nur  
Tra jarcentoj ĝis temp', kiam la vestalin'  
Kun ĉefpastr' kapitol'-supron irados plu.

Diros oni ken jen, kie en Daŭno-land'  
Tra l' soifa kampar' bruas Aŭfid'-river',  
De l' humila deven' iĝis potenca mi.

Laŭ eola agord' liron italan ĉar  
El poetoj jen mi ludis unua, do  
Kun fier' laŭ merit', delfa per laŭro-kron',  
Melpomeno, al mi frunton ornamu vi!

---

44.

PEREEMO.

(El Seneca.)

*Omnia tempus edax depascitur, omnia carpit,  
Omnia sede movet, nil sinit esse diu.*

—( )—( )—( )— || —( )—( )—( )—  
—( )—( )—( )— || —( )—( )—( )—

Ĉion temp' manĝegema forglutas, ĉion forprenas,  
Ĉion formovas ĝi, ĉion detruas en fin'.

Malaperas riveroj, la maron bordoj sekigas,  
Malaltiĝas la mont', falas malsupren la pint'.

Kial mi diras nur tion? La bela ĉiel'-firmamento  
Iam subite eĉ ĝi—forbruliĝos de flam'.

Ĉion la morto atingos. Pereo—jen leĝo, ne puno;  
Venos do iam la temp', ke ne ekzistos la mond'.

---

45.

AMIKECO.

(El Ovidius.)

*Donec eris felix multos numerabis amicos;  
Tempora si fuerint nubila, solus eris.*

— | — | —(—) || (—) — | — | —(—)

Kiam vi estos feliĉa, vi multajn kalkulos amikojn;  
Nuba se venos la temp', sola vi restos, amik'!

46.

VIRINA KONSTANTECO.

(El Catullus.)

*Nulli se dicit mulier mea nubere malle  
Quam mihi, non si se Juppiter ipse petat.*

—(—)—(—)—(—) || (—)——(—)—(—)

Kiam promesas virino fariĝi nur via edzino,  
Eĉ se Zeŭs-tondrant' petus pri ŝia konsent',

Skribu, ĉar junulino parolas al sia amanto,  
Sur flu-akvo nur ĝin, aŭ rapideme sur vent'.

XVIII.

Litova.

47.

KIAM ESTIS MI JUNULO.

(Popola kanto.)

*Kad aŝ buvau jaun's bernelis,  
Kajp jovaras žaliukielis.*

— | — | — | —

Kiam estis mi junulo,  
Kiel verda la ĉero,  
Havis mi tri ĉevaletojn,  
Bonkurantojn, laŭ prefero.

Unu akcipitre-stria,  
Dua, kiel karb', nigrulo,  
Kaj la ĉevaleto tria  
Estis kiel neĝ', blankulo.

Sur striul' ĝis mondofino,  
Sur nigrulo al batalo,  
Kaj al mia amatino  
Rajdis mi sur blank-ĉevalo.



Mizerul' kun grizaj haroj,  
Nun soleca, sen ĉevalo,  
Ploras mi pri junaj jaroj:  
Amo, migro kaj batalo.

---

48.

### LA KORVO.

(Popola kanto.)

*Ĉionai leke juodas varnas,  
Snape laike baltq rankq.*

— | — | — | —

Nigra korvo preterflugis,  
Kiu portis en la beko  
Blankan manon kun ringeto.  
Do mi vokis al la birdo:  
— „Nigra korvo, vi el kie  
Portas tiun blankan manon  
Kun brilanta ringo ora?“  
— „Estis mi sur kampo, kie  
La batalo furiozas,  
Kie estas glav-bariloj,  
Kie lancoj fosas tombojn  
Kaj torente sango fluas.

Multaj filoj tie kuŝas,  
La patrinoj ploras ilin...“  
— „Ve! jen estas mia ringo!  
Mi ĝin donis al amato!  
Ne revenos li, karulo!  
Do vi fluu, miaj larmoj.“

---

XIX.

Luzica.

49.

AL LUZICUJO.

(El Jakob Bart-Ĉišinski.)

*Haj, za was, Serbja, bjez woddycha  
Chcu dželać spochi wo dnjo, w nocy.*



Ho Luzicujo, senripoze  
Laboros mi por via celo,  
Por vi, fiero mia sola,  
Vi, fortofonto, mia stelo!

Ne logas min brilanta oro,  
Nek pri honoroj mi ekrevos;  
Feliĉon vian mi penados,  
Dum mia brako plu sin levos.

Ĝis kiam fajr' en koro flamos,  
Kaj per flugil' al firmamento,  
For de malbona sorto tera,  
Spiriton levos nobla sento,—

Popolo serba, vian nomon  
Alskribos mi al popolaro;  
Por vi mi vivos, por vin savi  
De la doloro kaj eraro.

Mi vin glorigos, kaj se fine  
Mi falos arbo-folieto,  
Vi tiam sub luzican herbon  
Min metu por etern-kvieto.

---

XX.  
Pola.

50.

KONSILO.

(El Ignacy Krasicki.)

*Czyń każdy w swoim kółku,  
Co każe duch boży.*

— | — | — | —

Ĉiu en la hejma rondo  
Agu laŭ inspiro dia,  
Kaj en fino mem formiĝos  
La tutaj harmonia.

51.

LABORU.

(El Kazimierz Brodziński.)

*Nie patrzaj końca, ciągle rób!  
Ciebie, nie dzieło, czeka grób.*


— | — | — | —  
— | — | — || — | — | —

Laboru senĉese, ne zorgu pri fin!  
La tombo atendas ne verkon, sed vin.  
La verko ekzistos pli longe ol ni;  
La tempo ĉion finos, ĉar tempon havas ĝi.

## KOZAKO EN STEPO.

(El „Marja“ de Antoni Malczewski.)

*Ejl ty na szybkim koniu, gdzie pędzisz, kozacze?  
Czyś zaoczył zajqca, co na stepie skacze?*



1.

Hej, kozak' sur ĉevalo! vi kien rapidas?  
Ĉu leporon, saltantan sur stepo, vi vidas?  
Ĉu, ludiginte pensojn, en liber' senfina  
Vi kuras pro la veto kun vent' ukraina?  
Aŭ vin eble en kampo atendas, rajdanto,  
Amatino kun sia malgaja revkanto?  
Ĉar vi, ĉapon premante, bridon ne retenas.  
Kaj longa polva nubo sur vojo sin trenas.  
Per fervoro ardiĝas vizaĝa bruneco,  
Kiel vaglumo brilas sur ĝi la ĝojeco;  
Dum ĉevalo sovaĝa, obeante volon,  
Tranĉas bruantan venton, eltirinte kolon.

<sup>1)</sup> La sama ritmo estas ankaŭ en poemo N<sup>o</sup> 53.

Flanken! Nigramarano kun knarveturiloj,  
Ke ne frakasu vian salon stepo-filoj!  
Kaj vi, nigra birdeto, kiu salutante  
Rond-flugas, enrigardas, ion demandante,  
Rapidu la sekreton al kozak' babili, —  
Ke antaŭ fin' de l' rondo ne forkuru ili.

II.

Ili flugas — en suno subira, radia,  
Similaj al kuranto ĉielana ia.  
Kaj longe, malproksimen sonas huf-frapado,  
Ĉar en la vastaj kampoj regas silentado:  
Ne bruas nobelaro, gajec' kavalira,  
La spikojn sole fleksas la vento sopira;  
Nur el herbokovritaj tomboj ĝemo sonas,  
Kie glorajn dormantojn velkaj laŭroj kronas...  
Muzik' sovaĝa — vorta sovaĝec' pli granda,  
Por idaro konservas ĝin spirit' Pollanda;  
Se kampaj roz-arbetoj ilin nur honoras,  
Ho! kies kor' ne plendas? kies ne doloras?

III.

Kozak' jam preterflugis profundajn kavarojn,  
Kiuj kaŝas kutime lupojn aŭ Tatarojn;  
Alkuris sankt-figuron — sub tiu altaĵo,  
Kie delonge kuŝas vampir' en tombaĵo —

Klinis ĉapon, farinte kruc-signojn silente,  
Tra l' stepo kun ordonoj urĝaj fajfas vente.  
Brav-ĉevalo ne timas de sorĉoj teruron,  
Kraĉospiris, piedbatis — kaj daŭrigas kuron.  
Boh-river' sur granitoj arĝent-skarpojn trenas  
Kozak' fidela penson de l' estro divenas.  
Bruas la muelilo, malamik' en valo,  
Scias kozakan penson fidela ĉevalo, —  
Kaj tra pikantaj kardoj, tra herbejo-floroj,  
Pli lerte ne ŝoviĝas timemaj leporoj.  
Kiel sago sur alta selo ekklinite,  
Al sia ĉevaleto karese premite,  
Rajdas dezerto-reĝo tra l' senvoj' sen timo —  
Li, step', ĉeval', nokt' — unu sovaĝa animo.  
Ho! kiu lin malhelpos en diboĉo tia?  
Perdiĝis — nekaptebla en step', hejmo lia.

---



## SOPIRO AL PATRUJO.

(El „Pan Tadeusz“ de Adam Mickiewicz.)


*Litwo! Ojczyzna moja, ty jesteś jak zdrowie!  
Ile cię trzeba cenić, ten tylko się dowie.*

Litvo, patrujo mia! Simile al sano  
 Vian grandan valoron konas nur landano,  
 Vin perdinte. Belecon vian mi admiras,  
 Vidas ĝin kaj priskribas, ĉar je vi sopiras.  
 Dipatrino! Vi gardas Ĉenstoĥovon helan,  
 En Ostra-Brama lumas! Vi, kiu kastelan  
 Novogrodek defendas kaj pian urbanon, —  
 Kiel Vi al infano redonis la sanon,  
 (Kiam mi, de l' patrino al Vi oferite,  
 La malvivan palpebron eklevis subite  
 Kaj povis tuj al Via sanktejo ekiri,  
 Por redonita vivo Dion dankodiri) —  
 Tiel Vi nin mirakle portos hejman limon!...  
 Dume transportu mian sopiran animon  
 Al montetoj arbaraj, herbejoj verdantaj,  
 Larĝe apud lazura Njemen tiriĝantaj;  
 Al la kampoj, per greno diversa pentritaj,  
 De sekalo arĝentaj, de tritik' oritaj,  
 Kiujn la neĝe-blanka poligon' ornamas,  
 Kie per virga ruĝo timiano flamas,  
 Kaj ĉion zonas, kvazaŭ per verda rubando,  
 La kampa, kun maldensaj pirarboj, limrando.

## TRI BUDRISOJ.

(El Adam Mickiewicz.)

*Stary Budrys trzech synów, tęgich jak sam Litwinów,  
Na dziedziniec przyzywa i rzeczce.*



Budrys, forta kaj sana, maljunulo Litvana,  
Sur la korton alvokas tri filojn:  
„Iru tuj en la stalojn, selu bone ĉevalojn,  
Kaj akrigu la glavojn, jetilojn!

Kuras famo en rondo: Por tri flankoj de l' mondo  
Al ni Vilno trumpetos ordonojn:  
Olgerd falos Rusujon, Skirgel iros Polujon,  
Princo Kejstut atakos Teŭtonojn.

Fortaj, sanaj vi estas! iru, filoj, mi restas;  
Litvaj dioj konduku, vin benu!  
Por la vojo utila, bona vorto konsila:  
Tri vi estas, tri vojojn vi prenu.

Unu devas elkuri, kun Olgerdo veturi  
Kontraŭ Novgrod, post Ilmen kuŝanta;  
Tie vostoj zibelaj, la ornamoj tre belaj,  
En amasoj la rublo sonanta.

Dua devas elfali, sub princ' Kejstut batali:  
Pereadu krucistoj—hundfratoj!  
La sukcen' tie ora, drapo mire kolora,  
Brilantoj en pastraj ornattoj.

Tria post la Njemeno, en Skirgela la treno,  
Nur malriĉan akiron li trovos;  
Tie inda nur havo: bona ŝildo kaj glavo,  
Kaj Polinon kunpreni li povos.

Super ĉiuj virinoj, plej amindaj Polinoj!  
Gajaj, kiel la junaj katetoj;  
Nigra brovo, la vango — kvazaŭ lakto kaj sango,  
La okuloj — brilantaj steletoj.

El Poluj', mi junaĝa, batalanto kuraĝa,  
Antaŭ jaroj alportis edzinon...  
Jam ne batas la koro — kun malĝojo, doloro,  
Rememoras mi vian patrinon\*.

Kaj, doninte konsilojn, benis patro la filojn,  
La armitajn forportis ĉevaloj.  
Aŭtun', vintro sin trenas, filoj reen ne venas;  
Eble falis en sangaj bataloj..

Per la neĝo kovrita rajdas viro armita,  
Sub la burko objekto tre granda.  
„Filo! sub la mantelo, rusa mon' en sitelo?“  
— „Ne, patreto, filino Pollanda!“

Per la neĝo kovrita rajdas viro armita,  
Sub la burko akiro tre granda.  
„El Prusujo! sak' plena, kun la sablo sukkena?“  
— „Bofilino, patreto, Pollanda!“


Per la neĝo kovrita, tria viro armita,  
Ion grandan li kaŝas sub vesto:  
Budrys jam ne atendis, invitadi li sendis,  
Por la tria edziĝa la festo.

---

## SINJORINO TWARDOWSKA.

(El Adam Mickiewicz.)

*Jedzq, pijq, lulki palq*  
*Tańce, hulanka, swawola*



Oni manĝas, trinkas, bruas,  
 Fumo, danc', diboĉ' petola;  
 Tutan la drinkejon skuas:  
 Ha, ha, hi, hi, hejse, hola!

Twardowski<sup>1)</sup>, ĉe l' fino tabla  
 Kiel *baŝa* sin apogas,  
 Krias: He, diboĉ' diabla!  
 Ridigas, timigas, logas.

Jen soldat', kun brava vido,  
 Ĉiujn insultas kaj puŝas;  
 Sonis glav', orelon tuŝas,  
 El soldat' — jam leporido.

---

<sup>1)</sup> Twardovski, pola sorĉisto, kiel la germana Faust.

El vaz' tribunal'-patrono  
Manĝis sen parol' ĝis fundo;  
Twardowski sonis per mono...  
El patrono — korta hundo.

Al botist' je naza rando  
Li frapis, al kap' tubeton  
Metis, ŝmac'! da gdanska<sup>1)</sup> brando  
Pumpas plenon bareleton.

Dum li trinkis, en kaliko  
Ekfajfis, ekgrincis io;  
Funde... „Kia artifiko!  
Baptan', vi venas pro kio?“

Diablot' sur fund' en vino,  
Laŭ mallonga vest', germano,  
Gastojn, ĉapelet' en mano,  
Li salutas per ekklino,

Saltas planken el la loko,  
Kreskas al du-uln mezuro,  
Nazo — hoko, pied' de koko,  
Kaj la ungoj de vulturo.

---

<sup>1)</sup> Urbo Gdańsk, hodiaŭ germane Danzig, estis fama pro sia brando.

„Ah, Twardowski? salut', frato!“

Li iras rekte al celo.

„Jen bona via konato,

Mi estas Mefistofelo!

Vi kun mi sur Mont' Senhara <sup>1)</sup>

Faris pri anim' kontrakton;

Sur led' bova skribis akton

Via moŝt' kaj diablara.

Devis servi volon vian

Ni, ĝis du jaroj trakuros,

Tiam Romon vi veturos

Kaj ni kaptos kiel nian.

Sepa jar' trakuris teron

Post lim' de kontrakta diro;

Vi turmentas la inferon,

Eĉ ne pensas pri vojiro.

Sed la venĝo, malrapida,

Pelis vin en retojn; estas

*Rom'* drinkeja nom' insida,

Vian moŝton mi arestas!“

---

<sup>1)</sup> Pole „Łysa góra“, pli ĝuste Kalva monto, monto de sorĉistoj.



Twardowski al pord' ekpenis  
Post tia *dictum acerbum*<sup>1)</sup>;  
Je l' kontuŝ' diabl' retenis:  
„Kie do *nobile verbum*<sup>2)</sup>?”

Kion fari? Jam finite,  
Ne elpensos mi konsilon..  
Sed... Twardowski, jen subite,  
Donas novan malfacilon:

„Al kontrakt', Mefistofilo!  
Tie estas kondiĉaro:  
Kiam vi, post iu jaro,  
Venos kun anim'-prenilo,

Mi havos rajton, trifoje  
Al labor' vin jungi laste;  
Eĉ plej malfacilan ĝoje  
Vi plenumos, senprokraste.

Jen drinkeja emblemato:  
Ĉeval' pentrita sur tolo;  
Sur ĝin salti mia volo,  
Frapu hufoj per ekbato.

---

1) Maldolĉa dirajo. 2) Nobela honorvorto

El la sablo vipon faru,  
Mi ĝin uzos por alpelo;  
En arbareto preparu  
Konstruajon — por hotelo:

Konstruaj' el nuks-grajneroj,  
Alta ĝis supro Krempaka,  
Tegment' el judbarboj, faka,  
Kovrita per papaveroj.

Vidu jen najleton, feron:  
Tricol-longo, col-dikeco;  
Vi en ĉiun papaveron  
Batu tri de l' sama speco!\*

Saltas al labor' diablo,  
Ĉevalon nutras, preparas,  
Tordas vipon el la sablo,  
Kaj jam en preteco staras.

Pan Twardowski, sur kurulo,  
Provas eksaltojn, turnadon,  
Paŝon, troton, galopadon;  
Jen! — konstruo laŭ postulo.

„Nu! vi gajnis; sed, baptano,  
Dua provo ne finita;  
Jen en plado por vi bano,  
Bano — el akvo benita“.

Diablo ŝvitas, sufokiĝas,  
Kuntiriĝas ĝis duono, —  
Estr-ordono, sen pardono! —  
Ĝis la kolo li baniĝas,

Elsaltis kun jet-rapido,  
Skuiĝis, ternis pro sano:  
„Nun vi jam sub nia brido,  
Finita plej bola bano“.

Ankor' unu, tiam fino,  
Tuj rompiĝos fort' diabla,  
Jen Twardowska sinjorino,  
Mia edzinet' afabla!

Mi jaron ĉe belzebubo  
Por vi loĝos en infero,  
Kaj dume mia kerubo  
Kun vi, kiel edz', sur tero.

Ĵuru la amon, dediĉon,  
Ŝaton, obeon, adoron,  
Rompu eĉ unu kondiĉon, —  
Kontrakto<sup>o</sup> perdis valoron<sup>a</sup>.

Al li orelon atente,  
Al ŝi ekstrabon kuu viglo  
Turnis diabl' kaj momente  
Jam proksimiĝis al riglo.

Ĉar lin Twardowski tre tedas,  
De pord', fenestro puŝante,  
Tra ŝlosiltru' sin ekspedas,  
Ĝis nun forkuras konstante.

---

HIMNO DUM SUBIRO DE L' SUNO SUR MARO. X

(El Juljusz Słowacki.)

*Smutno mi, Božel Dla mnie na zachodzie  
Rozlałeś tęczę blasków promienistą.*

— — — | — — — | ( — — — | — — — )

Mi malĝojas, Sinjoro! Por mi okcidente  
Vi etendis arkajon kolore brilantan,  
Kaj estingas en akvo lazura silente  
Vian stelon flamantan.  
Kvankam maron, ĉielon Vi kovras per oro,  
Mi malĝojas, Sinjoro!

Kiel spikoj malplenaj, kun kapo levita  
Jen mi staras, malplena kaj sata de ĝuoj;  
Por la homoj sur mia vizaĝo medita:  
Trankvilec' de helbluoj.  
Sed por Vi mi malfermós profundon de l' koro:  
Mi malĝojas, Sinjoro!

Kiel plore patrinan foriron ekplendas  
Infaneto, mi preskaŭ larmigas pupilon,  
Rigardante, ke suno el ond' al mi sendas  
Sian lastan rebrilon.  
Kvankam morgaŭ ekbrilos ĉielruĝa koloro,  
Mi malĝojas, Sinjoro!

Jen hodiaŭ, vagante sur granda la maro,  
Post la bordo cent mejlojn kaj cent antaŭ bordo,  
Mi renkontis la flugon de cikoniario  
En la longa vicordo.  
Ĝin vidante sur pola kampar' en memoro,  
Mi malĝojas, Sinjoro!

Ĉar pri homa tombar' mi meditis multfoje,  
Ĉar ne scias mi preskaŭ pri hejma trankvilo,  
Ĉar mi kiel pilgrimo laciĝis envoje  
Ĉe fulmtondra ekbrilo,  
Ĉar ne konas mi lokon de mia last-horo,  
Mi malĝojas, Sinjoro!

Miajn ostojn la blankajn Vi vidos, ho Dio,  
Ne donitajn sub gardon al kapitelaro;  
Sed min premas la sento de homa envio  
Pro la tomb'... al cindraro.  
Pro l' eterna kuŝej' nekonata, sen gloro,  
Mi malĝojas, Sinjoro!

En Polujo preĝadas infano malgranda,  
Ke al hejm' revenigu min Dio kompate..  
Mia ŝipo ne velas al bordo hejmlanda,  
Tra la mondo jetate.  
Ĉar la preĝo infana, pro mi — sen valoro,  
Mi malĝojas, Sinjoro!

Cielarkon koloran de bril', kiun Viaj  
Traflugantaj Anĝeloj etendis gigante,  
En miljaro post mi, ie homoj aliaj  
Rigardados... mortante..  
Antaŭ ol kun vanteco paciĝos la koro  
Mi malĝojas, Sinjoro!

---



EN SVISUJO <sup>1)</sup>).

(El Juljusz Słowacki.)

*Odkąd zniknęła jak sen jaki złoty,  
Usycham z żalu, omdlewam z tęsknoty.*

— ( ) — — — | — — — | — — — | — — —

## I.

Post ŝia forflugo, post sonĝo la ora,  
Mi svenas sopire, sekiĝas dolora.  
Ne scias mi, kial anim' al ĉieloj  
Ne flugas el cindroj post ŝi, al anĝeloj?  
Pro kio ne flugas al mondo alia,  
Al ŝi, la savita, amata la mia?

---

<sup>1)</sup> Tiu ĉi poemo estas poezia konfeso, rekreanta realaĵon, de l' poeto travivitan, sed refanditan en perlon de poezio. — En Genevo la poeto ekkonis la polan familion de gesinjoroj Wodziński, en kies societo li faris ekskursojn, dum kiuj, meze de ĉarmaj sviasaj naturbildoj inter li kaj fraŭlino Marja Wodzińska komenciĝis ama idilio, interrompita, kiam gesinjoroj W. kun sia filino subite forlasis Svisujon. — En la poemo la potenca fantazio de l' poeto prezentas en belegaj bildoj kaj agordiĝoj unue, kion li vidis, revis kaj sentis per sia imageco dum tiuj feliĉegaj tagoj (II — XVII), kaj kiel „Post ŝia forflugo, post sonĝo la ora“ (XVII — XXI) funebre plendis lia dolorŝirata animo pro la perdo de la amatino, kiu la poeto imagas al si kvazaŭ mortintan.

## II.

En svisa montaro ekzistas kaskado,  
De l' Aar lazura la akvo-falado.  
Vi tien rigardu kun kap' turniĝanta!  
Vi vidas pluvarkon sur kavo ŝaŭmanta?  
Sur blankaj nebuloj sin tuta pendigas,  
Nenio ĝin miksas, nenio forigas;  
Nur iam ŝafido la blanka trairas  
Al rando de l' valo tra l' arko ĉiela,  
Mordeti je roza arbet' aŭ avela;  
Aŭ ia kolombo, ĉar akvon deziras,  
Fiera, iĝante al briloj simila,  
Brilarkon rapide traflugas, mem brila.  
Mi tie ŝin vidis! tuj amo min prenis;  
Ke ŝi el pluvarko, el ŝaŭmo elvenis,  
Mi kredi komencis, la kredo nun restis,  
Tiel luma de sunaj radioj ŝi estis!  
Tiel plena ŝi estis de lumo anĝela!  
Kaj ŝia lazura pupil' tiel hela!  
Okuloj leviĝis de pied' al plekt' hara:  
Por ili ŝi estis amata kaj kara;  
Kaj post la vidsento, ekami iganta,  
Ekiris la koro, animo sekvanta;  
Kaj tiel rapide ekiĝis amado,  
Ke volis mi flugi al ŝi tra l' kaskado.

Mi timis, ke flugos ŝi, pala vidaĵo,  
Antaŭ' ol animo kun krio vekigos,  
Al arko ĉiela, kaskad', profundajo,  
Ŝi falos, sin solvos kaj de mi forigos.  
Ektimis mi kiel en sonĝo magia,  
Ĉar jam mi ŝin amis, ŝi estis jam mia.  
Mi tiel renkontis ŝin solan sub hela  
Pordego kolora de l' arko ĉiela.  
Surblovis min ĉarme de l' amo ekblovo,  
Okulmallevinte, mi staris sen movo.

### III.

Mi poste ŝin sekvis tra monto kaj valo,  
Kaj apud lavanga la piedestalo,  
Kie neĝ', kiel plata naĝil' de giganta  
Delfeno, ĝis homaj piedoj aliras,  
Vaporon arĝenta naztruo elspiras,  
Kaj kuras Rodano el faŭko bluanta.  
En suna mateno jen tie, en fruo,  
Du ĉamojn ni iom timigis per bruo;  
Kiele de homa feliĉo konsciaj,  
Ekstaris la ambaŭ, senmovaj, radiaj,  
Kaj turnis okulojn kun fulmo-ekbriloj  
Al bluaj de mia amata pupiloj;  
Rigardis ŝin longe, en muta adoro,  
Sur sin kuŝiginte la kapojn el oro.  
Mi diris: vin ili ekamis en koro!

Por tio, el buŝo, modeste fermita,  
Unua ridet' al mi flugis vizita,  
Sed baldaŭ reflugis ĉi voj', por ripozo,  
Al sia nesteto, al perloj kaj rozo.  
Ĉar miaj okuloj observis vojaĝon,  
Rideto rozigis la blankan vizaĝon.  
Ho sciu: ne tiel ektuŝas je l' koro  
Ruĝiĝo de ĵus ekflorinta la floro,  
Nek ravas migranton, per sia karmino,  
De alpa montaro la neĝa Virgino,  
Kun vangoj rozitaj de sun-ilumino,  
Kiel tiu senpeka, senhonta, subita  
Ruĝiĝ' sur vizaĝo ridete naskita.

#### IV.

Feliĉaj kaj solaj, de nun en veturoj,  
Ni estis naĝantaj sur lago-lazuroj.  
Sub ni, mi ne scias, ĉu estis boato,  
Ĉar mi de spiritoj fariĝis jam frato  
Mi paŝis sur akvoj, ĉieliris flugile,  
Kaj ŝi min kondukis nun ĉien facile!  
Ŝi estis simila al blankaj la cignoj,  
De lago estrino, kun estraj insignoj;  
Ŝi naĝis flugante, boat' sur postsignoj,  
Helaj' post boato treniĝis safira,  
Kaj post la helajo, al ŝi, fiŝetaro

Sin supren jetadis el akva la klaro!  
Ni naĝis kun tia arego postira,  
Ridete en lando lazura sen fino;  
Ĉar estis ŝi kvazaŭ de akvoj diino:  
Ŝin trenis kolomboj, delfenoj profunde  
Kristalaj palacoj atendis ŝin funde,  
En nokto malhela de luno la kronoj,  
Kaj mi obeema al ĉiuj ordonoj.

V.

Ŝi eble ne estas anĝelo ĉiela,  
Mi tiel meditis dum horo-duono!  
La kulpon forlavis konfeso fidela.  
Aŭskultu! Jen antaŭ preĝejo la Tella,  
Unua elsaltis sur ŝtonon ŝi sole,  
Ke amas min, laŭte ŝi diris petole  
Kaj reen min sendis sur lagan la helon,  
Per blanka la brusto puŝinte boaton.  
Kaj mi — ĉu konscii mi povis la staton!  
Ĉu prenos anĝeloj min en la ĉielon?  
Ĉu tondre de l' lago forglutos min ondoj?  
Ĉu bruston krevigas ridetoj-respondoj?  
Ĉu kora degelas glaci' varmigite?  
Anim' ĉu ricevas flugilojn subite?  
Ĉu ora anĝelo animon eniras?  
Ĉu ĝoje ridetas la kor' aŭ sopiras?

Kunflugis subite potencoj korsentaj  
Kiel ar' da kolomboj, ektrinki kontentaj  
Gutetojn el bano por plumoj arĝentaj,  
Kaj pure disflugi en ĉielostraton.  
Sed jen—ŝi alvokis kun mi la boaton.  
Ŝin aŭdis, ekvidis boat', el lazuro  
Al ŝi tuj alnaĝis ĝi mem en la kuro.

## VI.

Ĉe muro el rokoj, arbara sub krono,  
Jen staras trankvile, en plen' de koloroj,  
La Tella kapel'. Tie estas sur ondo  
La sojl', kie buŝoj konfesis per sono,  
Ke longe ni ambaŭ nin amis per koroj.  
Sub tiu ĉi sojlo, sur akvo-speguloj,  
De pinoj balancaj, de rokoj makuloj  
Pentriĝas; ĉi tie, interparolante,  
En akvon fiksitajn okulojn ni tenis.  
Sub sojlo la akvo ruliĝas konstante,  
Per ond' moviĝema kaj tiel petola,  
Ke ĝi niajn ambaŭ portretojn ekprenis,  
Kaj ilin per manoj interproksimigis,  
Dum sole nin ligis esprimo parola.  
Ho ondo! freneza kaj tiel petola,  
Ke eĉ niajn buŝojn ĝi ankaŭ kunligis,  
Dum ja ni ligitaj per kor' estis sola.



La ond' moviĝema, radia la onao,  
Nin ĉirkaŭpreninte per unu lumrondo,  
Anĝelojn du kvazaŭ ĝi miksis, ŝancela.  
Ĉe l' penso—dolor' min turmentas kruela.  
Ho! ond' malfidela! — kaj tiel fidela!

## VII.

Min foje kondukis anĝelo radia  
Tra hela herbejo al groto glacia.  
Blankigis ŝin tie marmor'-ilumino,  
Kaj frosto sur frunto de l' hela reĝino  
Surkovris kamp-rozojn per perloj malvarmaj.  
Arkajo ploradis per larmo tre granda,  
Kaj falis helegaj la silfoj, la larmaj,  
Sur ŝin kiel blanka gutaro rubanda.  
Ĉar laŭta fariĝis murploro la ĝema,  
Ŝi tute sin kovris per vest' enviema,  
Kaj ĉion tuj perdis okulo sciema.  
Kaj ankaŭ la manojn ŝi metis krucitajn  
Sur la alabastrojn ne tute kovritajn.  
Dum tiel ŝi staris sen mov', en trankvilo,  
Kaj ĉirkaŭ ŝi ludis pluvarka mirbrilo,  
Subite komencis mi preĝi per pia:

Ave Maria!...

Kaj kiel blank-roza disvolvo folia  
Ruĝecon ekmontras sur brust' malfermita,



Jen tiel roziĝis la vango benita;  
Kaj flanken trnrinte la kapon, medita  
Ŝi metis la fingron kristalaj al muroj,  
Kiele la nomon amatan skribante,  
Aŭ kiel en penso pri ĉiellazuroj;  
Kaj fine ŝi diris, al mi turniĝante:  
Min eble por amo forprenos infero,  
Kaj en la inferan malvarmon gvidita  
En glacikristalojn mi estos premita,  
Jen, kiel la brila vezik' el aero!...  
Sed, se turmentiĝas tiele en vero  
Helajo, kreita de suna radio,  
Kaj tie premata de frosta glacio,  
Do ĝin liberigu sopiro la pia:  
Ave Maria!..

### VIII.

Ekiros ni kune sur neĝajn la kronojn!  
Ekiros ni kune al pinaj arbaroj,  
Ekiros ni, kie sonoras brutaroj!  
Kaj kie surmetas brilarkajn la zonojn  
La Jungfraŭ ĉe l' suna subira deklino;  
Kie cervo nebulon trakuras rapida,  
Funebro-flugila aglaro avida,  
Kie ombas la nubojn kurantajn sen fino;  
Mi tien ekiros kun vi, amatino!

Se ni ne revenos el altoj ĉi tiaj,  
La homoj ekpensos: spiritoj radiaj  
Forportis nin al la lazaro ĉiela,  
Kaj ni, ekkaptinte je ĉeno la stela,  
Ekflugis jen for kun stelaro plejada;  
Kaj falos malsupren post ni nur mirhela  
Torent', kiel brila larmaro kaskada.

IX.

Ho! eĉ plej feliĉaj sur ter' ne scietas,  
Kie siajn flugilojn spiritoj kunmetas,  
Kaj kiel cignaro eksidas en rondo.  
Ho! eĉ plej sciemaj ne diros en mondo,  
En kian ni tendon por viv' nin ekzilis,  
Kiom rozoj tra niaj fenestroj mirbrilis,  
Kiom arboj ĉerizaj al ni ombron jetis,  
Kiom birdoj sur ili la ovojn demetis,  
Kaj kiel en ĉiu nokt' luna, la pal',  
Malpacis kaskad' kun plor' najtingala.  
Kiom iris brutaroj sur herboj sonori,  
Ne eble eĉ sonĝe prezenti, esplori,  
Nek montri, nek fermi en vorto ajn ia!  
Herbejo, tend', arboj en val' estis tia,  
Ke blanka, gardanta anĝelo de l' loko,  
Etendis flugilojn de roko al roko,  
Kaj kovris la tutan sovaĝan remparon:  
La rozojn, nin, tendon kaj najtingalaron.

## X.

Sed estis jam tro da cipresaodoro,  
Kaj tro da flamanta en rozoj koloro;  
Kaj kapti nin volis surprize amado.  
Matene — memoras mi — apud kaskado  
Ni estis jen solaj, sen timo en koro,  
Kaj legis ni libron larmplenan, kun ploro.  
Sed flustris spirito al mi en orelon,  
De libr' mi turniĝu al ŝi per okulo!  
Kaj ŝi, aŭskultante, similis anĝelon;  
Subite per tia travida nebulo  
Malgaja vizaĝo roziĝis kolore,  
Ke, kiel fariĝis, mi ĝin ne komprenis,  
Sed rozan la buŝon mi kisis fervore  
Kaj sur miaj brakoj ŝin blankan mi tenis,  
Kun koro batanta, okul' brilanta.  
Subite kaskada plektajo lumanta  
Sin iel tramiksis kaj iel malligis,  
Sur nin jetis akvan inferon la vento,  
Malseka nebul' nin el floroj forigis,  
Ni solaj ne legis de tiu momento.

## XI.

De nun en ridetoj por mi malplifoj,  
Pli blanka, pli pala, mallaŭta, malĝoja,  
En ĉiam pli densajn ombraĵojn ŝi iris  
Kaj rozajn ĉe bordoj torentaj deŝiris.

Aŭ apud kaskada liut' agordita  
Ŝi kapon mallevis kaj kiel medita  
Aŭskultis; aŭ sole, en loko detlanka,  
Ŝi metis la manojn al kolo la blanka,  
Kiele pro tim' aŭ defend' en danĝero;  
Aŭ kiel trinkanta kolomb' ĉe rivero,  
Ĉielen ŝi flugis okulo per klara.  
Ŝi iris dormeme, per paŝo erara,  
Kaj pensis, viklecon perdinte hirundan,  
Pri la senkulpeco mediton profundan.

## XII.

Vidante ŝin tia, kaj por min defendi,  
Mi diris: Amata! vi devas, pro Dio,  
Ĉion kore pardoni al mi, kaj ne plendi;  
La kulpo de ĉio jen estas lilio:  
Hieraŭ en fonto vi lavis, sentime,  
Sur hela herbejo, vizaĝon kaj kolon,  
Kaj apud vi staris jen simple, proksime,  
Kiel serva knabino, tenanta la tolon,  
Lilio la blanka, kun hela la mano;  
Ĝi vian eliron atendis el bano.  
Vidante vin ambaŭ, la blankajn en paro,  
Mi pensis, ke sonĝas mi pri l' anĝelaro;  
Ektremis mi tial kaj tremis en tuto,  
Kaj mi folieton per tuŝ' de kubuto  
Ekmovis; ĉi tiu aliajn tuŝetis,  
Brueto fariĝis, el font' vi kuretis,

Kaj tiel rapidis vi for, timigita,  
Ke puŝis per brusto je l' eta florbranĉo,  
Kaj estis lilia trunketo rompita,  
Kaj falis la floro de via ektranĉo.  
Do mi ekmeditis en reva pensado  
Pri floro rompebla, vigleco la via.  
Hieraŭ matene do, sub la kaskado —  
Ne mi estis kulpa, sed floro lilia.

### XIII.

Ŝi flamis kiele fumilo de mirho, —  
Ke mem ŝi ne scias pri flamo, mi vidis;  
Profunda fariĝis okula safiro,  
Kaj blanka la ondo sur Brust' pli rapidis.  
De strange varmegaj tempioj influo  
Velkigis cejano-floretojn en fruo.  
Kaj kiel al sia patrino kor-pente,  
Ŝi plendis al aro de steloj silente.  
Kaj kiam subiras la luno arĝente,  
Kaj flustras la floroj pri amo, ekscite,  
Ŝi proprajn la pensojn aŭskultis medite.

### XIV.

Ĉu ie, amata, vi nun, malespere,  
Al diaj anĝeloj parolas malĝoje?  
Kaj ploras plendante kaj diras sincere,  
Ke estis fulmtondra venteg' iufoje,

Kaj groto malhela sub nokta vualo,  
En groto — kaskada kurten' el kristalo;  
Ke estis timeg', en mallumo, mistera,  
Kaj kune forgeso pri dia la puno;  
Kaj plendo, de puraj la nimfoj, subtera,  
Ke tie nin solajn forlasis la suno  
Kaj trovis kun fajra vizaĝ' en komuno,  
Kaj tiel nin vekis birdaro la kanta —  
Ĉu diras ĉi tion vi kiel plendanta?  
Ne diru ĝin al la anĝeloj! radia!  
Ĉar ĉiu brilanta larmeto la via  
Al unu el ili de flam' estos brulo.  
Ĉar mi, se mi ankaŭ anĝel' estus pura  
Kun frunt' radiantanta sur helo lazura,  
Kaj estus mi de l' senfinaj' posedulo,  
Kaj povus regadi en stela la sfero,  
Ne volus mi lumi per steloj ĉielaj,  
Sed flugi el ĉiuj bluaĵoj la helaj,  
Kaj havi nur solan vin, mian — sur tero!

## XV.

El grot' ne kuraĝis eliri la bela,  
Ĉar eble ŝi timis, ke sun' por okulo  
Montriĝos tro granda kaj estos tro hela,  
Aŭ ŝi kiel nigra aperos makulo.  
Sed pendis pordego la arko-ĉiela,  
Brilante sur pluve plorinta nebulo.



Ŝi iris — kaj rozoj ŝin igis ekmiri,  
Ke restis ja, kiel hieraŭ, brilplenaj.  
Ŝi, rozon ŝirinte, komencis admiri  
Kolorojn de arkoj ĉielaj matenaj,  
La vitre travidan ĉielan helbluon,  
Dronantan rondeton de lun' en lazuro,  
Kaj kvazaŭ ŝi mirus de vivo nov-fluon,  
Ŝi ion aŭskultis, ekiris en kuro,  
Ĝis ekrigardinte en lagokristalon,  
Sur sia vizaĝo ŝi vidis blankecon,  
Laciĝon, pli vivan de l' buŝo koralon,  
Sopiran rideton kaj la malgajecon.  
Ŝi tute sin kovris per sia harplekto,  
Ne levis okulojn en mia direkto.

## XVI.

Moment' estas antaŭ ol luno eliras:  
La najtingalar' eksilentas la kanta,  
Kaj pendas folioj sen mov' bruetanta,  
Herbeja fontaro mallaŭte pli spiras,  
Kiel ion anonci tuj volus la stelo,  
Pri io kvieta paroli ĉielo  
Kun floroj, folioj kaj ar' najtingala.  
Moment' estas kiam, kun arko arĝenta  
La ringo Diana eliras la pala:  
Ekĝemas la najtingalaro silenta,



Sur arboj folioj ekzumas en ĥoroj,  
Vitr-sonan ekĝemon la fontoj eldonas.  
En tia momento, ah! ploras du koroj!  
Se ion pardoni nur havas — pardonas,  
Se ion forgesi — forgesas memoroj.  
Kun mia modesta estrin' en ĉi-horoj  
Jam kune sur sojl' idilia ni sidis,  
Al ni jam anĝelajn aferojn konfidis.

## XVII.

Kiele alaŭda, ĉiela kant-trilo,  
El montoj aŭdiĝis ermita sonilo.  
Ni iru en ĉelon, ekdiris ŝi foje,  
Ermito nin eble absolvos, gajigos,  
Kaj manojn ligante, al am' kuraĝigos.  
Kaj en la dometon enkuris ŝi ĝoje  
Kaj fermis fenestro-kovrilojn el pino,  
Por sin al rigardo de floroj vuali.  
Kaj en la ornamo de mont-virgulino  
Al mi ŝi elkuris — mi emis ekfali!  
Neniam okulo de ŝi tiel hela,  
Nek estis la buŝ' tiel freŝa kaj bela!  
Sur kapo ŝi havis papilion nigran,  
Ĉar ĝi la blankajon ŝirmgardas de l' bruno,  
Kaj en la duon' tralumate de l' suno,  
Ĝi jetas sur frunton flugile la migran

Ombraĵon; kaj sube, la rozoj kaŝitaj  
Rigardis scieme tra gazon la nigran,  
Ankoraŭ tutfreŝaj, duone fermitaj.  
Ĉar flankon de l' kor' ili gardas konstante,  
Do tien kliniĝis papili' obstina;  
Disrompi flugilon mi estis inkлина,  
Ĝi sidis maldekstren al ŝultr' kliniĝante.

. . . . .  
Ĉu kredus timigan antaŭsenton ian  
Imago, pro sia feliĉo, fiera!  
El mont' ekrigardis mi valon la nian:  
La tend' al mi ŝajnis--ĉerketo mizera;  
Kaj same vidiĝis, el alto aera,  
La ĉerizarbaro -- malhela tombejo;  
Jen sentas kolomboj pri ni maltrankvilojn,  
Brutaroj meditas pri ni sur herbejo,  
Bluiĝis pli akvoj, malĝojas la tero,  
La morto najlfermis fenestro-kovrilojn!  
Kaj ĉie nur timo, malgaj', malespero.  
Jam kvazaŭ neniam plu reen venonte,  
Mi iris malgaje tra l' griza montlando: --  
La rokoj kaj lagoj nigriĝas renkonte,  
Sur blua glaci' jen aglara girlando;  
Kiel sango ruĝiĝas subira sunrando,  
Kaj jen ermitejo, per neĝo kovrita,  
Ĝin gardas da hundoj grandegaj par' brita,  
Krucet', de piroloj sidejo, sur ĉelo, --

Ĉel', libroj en polvo, la pastro ermita, —  
Nun ĉio similas al sonĝo vidita.  
Memoras mi nur: sun-subiro radie  
Orumis vizaĝon de Kristo per helo,  
Al ŝi sur la fingron, malvarman glacie,  
Mi metis la ringon....

. . . . .

### XVIII.

Arbaro kaj valo! herbejo, torento!  
Ho ve! ne demandu pri ŝi tiel plore!  
Min larmoj malhelpas paroli ĉi-hore,  
Kaj min meditigas parola momento,  
Kaj montras helbluan rigardon vidsento,  
De ŝi, komencanta kompati min kore,  
Kaj buŝon — ĝi volus min kisi fervore.  
Mi tremas kaj ree ĉirkaŭas min bruŝo.  
Do kien mi iros? kaj kien okulo  
Kun larmoj sin kaŝos, kaj mi, la solulo?  
Por ŝian portreton desegni, mi staras,  
Aŭ skribas sur sablo la signojn de l' nomo,  
Aŭ inter cipresoj kaj rozoj, eraras  
Mi, kiel trezoron perdinta la homo,  
Kiu plore sidiĝas, post perd' de prudento,  
Ĉe urnoj, starantaj sur tomb'-monumento,  
Ke tomboj parolu pri ŝi en silento.

## XIX.

Sub miaj fenestroj ekzistas fontano,  
Ĝeterne ĝemanta per plora murmuro,  
Kaj arb', kie sonas la harp-akompano  
De najtingalar'; kaj fenestro en muro,  
Tra kiu dum nokto rigardas Diano  
Kaj logas la frunton malgaja poluro.  
Kaj tiel min vekas en larma la bano  
La arbo, la luno kaj tiu fontano.  
Mi tiam rigardas tra l' vitra kristalo,  
Aŭskultas mi plorojn ĉirkaŭe en valo:  
Jen fluas fontan', najtingaloj plorĝemas,  
Pri ŝi parolante. Mi kore ektemas  
Kaj preĝas pri frua la mort', malespere.  
Mi velkas, sed ve! mi ne mortas envere!  
Kaj ĉiam fontanoj, vekante min, ĝemas.

## XX.

La pens', revenante pasinton sen fino,  
Ne scias en kia prezenti ŝin formo.  
Ĉu, kiam ŝi venis min kisi en dormo,  
Etendis flugilojn kiel' kolombino?  
Ĉu kiam kuradis ŝi for, la timema?  
Ĉu kiam kun mi, sur folion la saman  
De libro, okulon ŝi fiksis la aman,  
Pri miaj rigardoj restante gardema?

Ĉu kiam, de sia korteg' ĉirkaŭita,  
Ŝi iris kiele reĝin' ensorcita?  
Ĉu dum la kvieta ekdorm' sub acero?  
Ĉu kiam ŝi pelas? sin kaŝas humora?  
En luna lum' — blanka? aŭ dum la vespero  
De roza Alp-neĝo — mem rozokolora?

## XXI.

El kie eklumos unuaj la steloj,  
Mi iros ĝis al la mallumaj rok-randoj;  
Rigardos mi cigojn en flug' sur ĉielo  
Kaj flugos kun ili al samaj la landoj.  
Ĉar ĉie, post maro, ĉi tie, aŭ ie,  
Kien iras sendite la pens' en mizero,  
Ĉiam sekvas la sama malĝojo min ĉie,  
Kaj estas kaj restos malbone sur tero.  
Mi tial nur pensas pri unu afero:  
Por mia malĝojo pri loko favora,  
Ke tie neniu flugilo spirita  
Ekpuŝu je mia kor' saŝge vundita;  
Pri loko, ĝis kiu la luno aliros,  
Naĝante sur ond' kun brueto la ora:  
Anim' ĉe l' mistera tuŝet', eksopiros,  
Ke ĝi revekiĝos en mi, kaj eliros.

## PATRO DE PESTULOJ EN EL-ARISH.

(El Juljusz Słowacki.)

*Trzy razy księżyc odmienił się złoty,  
Jak na tym piasku rozbiłem namioty.*

— — | — — | — — | — — | — (—)

Trifoje ora luno aliĝis,  
De kiam mi sur sablo metis tendojn.  
Edzino mia nutris infaneton,  
Krom infanet' tri filoj, tri filinoj,  
Tut-familio, nun enteriĝita,  
Kun mi alvenis. Naŭ' da dromaderoj  
Matene iris sur la sabl-altajojn,  
Nutriĝi per kalama herb' ĉemara;  
Vespere ĉiuj sin kuŝigis ronde,  
Jen kie fajro longe jam ne brulas.  
En kruĉoj akvon portis la filinoj,  
La fajron miaj filoj bruligadis;  
Edzino, kun filet' ĉe brust', kuiris.  
Nun ĉio estas, kie tombo jena  
Al radianta suno reridetas;  
Sub kupolet' de l' Ŝeĥo kuŝas ĉio.  
Kaj mi revenas sola! — ho, doloro! —



Vivinte tri kvardekojn da jarcentoj,  
De kiam en la tolan mian korton  
Dum kvaranten' eniris pest-anĝelo.

Ho! kiu povas koni la doloron,  
Kiela nun en mia kor' fermiĝas!  
Libanon mi revenas, mian hejmon;  
En mia kort' demandas oranĝujo:  
Ho, maljunulo! kie restis idoj?  
Kaj min demandas floroj de filinoj:  
Ho, maljunul'! filinoj estas kie?  
Kaj la nubetoj bluaj sur Libano  
Demandos min pri filoj, pri edzino,  
Pri mia infanar', enterigita  
Jen sub terura monument' de l' Ŝeĥo.  
Kaj tiel ĉiuj eĥoj min demandas,  
Kaj ĉiuj homoj pri reven' en sano  
Demandos min. Do kion mi respondos?

Mi venis kaj sur sabl' etendis tendon.  
Kameloj miaj sen bruet' kuŝiĝis;  
Infano, kiel anĝelet' pentrita,  
Paserojn nutris; la birdetoj manĝis,  
Venante preskaŭ al manet' infana.  
Ĉu vidas vi en valo rivereton?  
Plej juna la knabin' de ĝi revenis,



Kun kruĉ' sur kapo, rekte kiel kano,  
Al fajro venis ŝi kaj per la akvo,  
Ridante, ŝi aspergis iom fratojn.  
Plej aĝa filo, kun okul' flamanta,  
Leviĝis, kruĉon kaptis en la manojn,  
Kaj diris: Dio pagu vin por akvo!  
Mi trinkos kiel hund', en brusto fajron  
Mi sentas! Li el kruĉ' eltrinkis akvon  
Kaj falis tuj, kiele palm' rompita.  
Alkuris mi lin savi — tro malfrue —  
Fratinoj volis kisi lin malvivan;  
Mi, kun freneza krio: „Ne kuraĝu!“  
Kadavron kaptis, jetis al gardistoj,  
Ke prenu ĝin sur ferajn la portilojn  
Kaj enterigu ĝin ĉe la pestuloj.  
De post la dolorplena nokt' mi devis  
Ĉi tie resti novajn kvardek tagojn.

La saman nokton Hafne kaj Amina,  
Kuŝante apud ŝi en lito, mortis.  
Mallaŭte tiel agoniis ambaŭ,  
Ke, kvankam post la morto de la filo,  
Al dorm' okuloj miaj ne fermiĝis,  
Mi eĉ ne aŭdis, kiel mortis ambaŭ,  
Kaj eĉ patrino propra ne ekaŭdis,  
Dum tiu nokto ankaŭ ne dorminte.

Matene ilin ambaŭ, ferobluajn,  
Filinojn miajn, peste-mortigitajn,  
El tend' mi per gardistoj eltrenigis.  
Kaj ili nin forlasis! — senrevene!  
Kaj dece, junulinoj al gepatroj  
Per siaj haroj teron ekbalais.

Vi vidas sunon en ĉiel' lazura?  
Post la palmaro ĉiam ĝi leviĝas,  
Subiras ĉiam post la sabla monto.  
Sennuba estas ĉiam la ĉielo;  
Sed tiam ŝajnis al mi, iakaŭze,  
Ke sun' al ora suno ne egalas,  
Kaj jam alia estas ol hieraŭ;  
Ke ĝi similas al vampiro-suno.  
Kaj la ĉielo, kiu vidis morton  
De miaj idoj, miaj tri infanoj,  
Al mi ekŝajnis nebulara, densa  
De ter-vaporoj kaj purpuro suna,  
Ke mi ne sciis, ĉu alflugos preĝo  
Al Dio, kiu kovris sin per nuboj.

Dek tagoj tiel pasis malrapide.  
Restintaj idoj vivis — ĉiuj kvar.  
Edzino mia iom trankviliĝis,  
Eĉ infaneto mia plej malgranda,

Ĝi vivis kaj ne velkis kiel floro.  
Kaj fine mi ekspiris pli facile,  
Ĉar mi ne kredis, ke preninte tri,  
Infanojn ĉiujn prenos al mi Dio!

Ho! tio estis hor' infera! kiam  
Mi, sur vizaĝo de plej juna filo,  
Ekvidis morton! Kiel mi lin gardis!  
Signet' unua sur vizaĝ' aperis;  
Neniu vidus ĝin — mi, patr', ekvidis.  
Simila fariĝadis li al tiu  
Kadavro mia unue-naskita:  
Li iĝis hela, pala, poste ruĝa,  
Kaj sur vizaĝ' aperis fer-makuloj  
Do laŭte mi ekkriis: „Mort' en tendo!“  
Kaj lin kaptinte kun la pesto-signoj  
Mi portis lin en stepon al kameloj,  
Ke tie lin la morto reste mordu,  
Kaj ke ne vidu tion... la patrino.

Ĉe la mortant' maldormis ni proksime,  
Mi kun kameloj, ĉiuj genuante;  
Mi tordis manojn kaj mi vokis laŭte:  
Ne mortu li! aŭ estu ne naskita!  
Kaj super palmoj, senkompat'-vizaĝe  
Leviĝis pala lun', dum fil' mortadis,  
Kaj ĝi rigardis! — Tion ne forgesos

Mi, kiel povis luno lin rigardi?  
Mortinton en la patra ĉirkaŭbrako  
Mi volis tuj cindrigi en fajrujo;  
Sed kiam ekbruletis la vestaĵo,  
Mi kaptis lin kaj jetis al gardistoj,  
Kaj du tombistoj nigraj lin forportis.  
Li kuŝu apud frato kaj fratinoj!  
Post tiu morto kaj doloro oni  
Al mi destinis novajn tagojn kvardek.

Sub rond' de suno, ruĝa kiel sango,  
Kaj sub la tendo peste infektita,  
Ni vivis, vorton eĉ ne parolante,  
Kaj morton ni al morto mem simulis.  
Ni eble Dion trompos en ĉielo,  
La pest-idolo eble renversiĝos...  
Revenis! la anĝelo-mortigisto!  
Sed trovis min sen larmoj kaj sen koro,  
Por freŝaj la doloroj jam sensentan,  
Dirantan jam: do Dio prenu ĉion!  
Por la sufer' de l' tria fil' mi havis  
Sen larm' palpebrojn kaj el ŝtono koron;  
Dolor' jam estis pano ĉiutaga.  
Rigardis morton mi de l' filo meza —  
Lin familia rondo malpiej amis,  
Post morto malplej estis li plorata —  
Kaj tial Dio mem lin rekompencis

Per lia mort' kvieta kaj malvarma,  
Sen iu ajn doloro, sen deliro.  
Post mort' li kiel ŝtono rigidiĝis,  
Kaj li aspektis tiel terurege,  
Li kvazaŭ nian ploron ne dezirus,  
Sed volus fiksi nur vizaĝon sian  
En koroj sen kompat', — terur'-aspekton  
Eterne lasi en memor' gepatra,  
Kun la vizaĝ' vokanta: — malbenitaj!

Li mortis. Nun mi pensis malespere:  
Se la restintojn Dio ne indulgos,  
Se mort-anĝelon sendos Li pro ili,  
Ideton prenos — kaj edzinon mian —  
Min, malfeliĉan, ankaŭ vokos Dio —  
Filin'! — Pri ŝi mi pensi ne kuraĝis!  
Pri ŝi nenian timon mi eksentis.  
Ŝi estis tiel juna, tiel bela!  
Kaj gaja, kiam ŝi al mi la kapon  
Per siaj blankaj manoj malvarmigis,  
Aŭ, silkan teksfadenon preparinte,  
Sur herbo ĉirkaŭ cedro ŝi kuradis  
Kaj teksis, araneo laborema!  
Jen tiun zonon mian, brilkoloran,  
Ŝi faris — kaj okulojn miajn kovris  
Ŝi tiel per plektaĵoj de la blondaj  
Harligoj siaj, ke mi ŝin rigardis,

Tra miaj larmoj, kiel rozon, sunon.  
Ŝi estis la mastrin' de mia domo!  
Ŝi, kiel hela protektant'-anĝelo,  
La infaneton gardis en lulilo,  
Kaj kuris tien, kie plor' aŭdiĝis.  
Sort-batojn niajn ŝi priploris ĉiujn,  
Kaj ĉiujn larmojn prenis ŝi sur harojn.  
Dek tagoj pasis, dek tre longaj noktoj,  
Ke mort' jam povis flugi for al steloj;  
Dek tagoj pasis, noktoj dek aliaj,  
Al mi espero jam komencis lumi...  
Patrino ĉesis plori pro infanoj,  
Kaj ni kalkulis jam matenojn tridek.  
En fin', perdinte forton kaj memoron,  
Mi nokte min kuŝigis kaj ekdormis.  
Dum sonĝ', vinditajn en malpezajn nubojn  
Ekvidis mi mortintajn du filinojn.  
Tenante sin per manoj, venis ambaŭ,  
Kaj, salutinte min per tomb-silento,  
Brilante per okuloj mutaj, iris  
Viziti la dormantojn en la tendo.  
Mallaŭte ili iris, malrapide  
Kliniĝis ĉe patrino lit', idet'-lulilo,  
Kaj poste sur plej junan knabinecon  
Kuŝigis siajn ferobluajn manojn!  
Kun krio mi vekigis, la mortintajn  
Infanojn malbenante, „Hatfe mia!“  
Mi vokas. Venis ŝi, birdet', mallaŭte,



Kaj ĉirkaŭprenis min per la manetoj;  
Do konvinkiĝis mi, ke Hatfe vivas,  
Ĉar batis ŝia kor' ĉe mia koro.  
Sed morgaŭ fulme trafis min sortbato.  
Filin'!!!— Sed kial koron dolorigi?  
Kaj ŝin de mi kruela mort' elŝiris!  
Kaj ĉi filin' sur miaj brakoj mortis!  
Momento estis plej terura, kiam  
Doloroj mortigantaj ŝin turmentis.  
Ŝi vokis: „Savu min! ho savu,” patro!  
Ŝi havis tiam la buŝeton ruĝa,  
Kiele juna rozo ekfloranta.  
Kaj tiel mortis tiu knabineto,  
Ke mia patra kor' kvaron'-ŝiriĝis.  
Anĝele bela estis ŝi post morto!

Pro mi, malfeliĉulo, venis plori  
Gardistoj, — forprenante tiun korpon,  
Per hoko senatente ĝin alkroĉis;  
La hok' sur blankan, rondan bruston falis,  
Ĉi tie — kiel mi, ne mortu ili! —  
Jen ĉe okuloj miaj ĝin disŝiris.  
Al ili tion, Dio, vi memoros!  
Mi prenis ŝin kaj portis mem al tombo.

Kun manoj krucigitaj sur la brusto  
Tri tagojn sidis la patrin' senmove,



En tend-angulo, tute flaviĝinte.  
Idet' fariĝis pala kaj plorema,  
Ĉar la patrina mamu sekiĝadis.  
Plorado nur aŭdiĝis en lulilo.  
Sinjor', infanojn vi en tomb' ne havas!  
Al vi alie ŝajnas la dezerto,  
Orbrila eble, hela kaj ĝojeca?  
Por mi ĝi estas ebenaj' infera!  
Tra tiu sabla ebenajo oni  
Kadavrojn trenis de infanoj miaj!  
Kaj sur monteto, kien batas maro,  
Por vi la maro bruas — por mi muĝas.  
Kaj kiam vent' al bordoj ĝin ne ĵetas,  
Por vi murmuris mar' — por mi ĝi ploras.  
En la vespera horo, ĉiutage,  
Mi aŭdis la kantantan muezenon:  
Li, kvazaŭ kompatante mian sorton,  
Per voĉo pli malgaja nun anoncis,  
Kriante el la sabla konusego  
Al malfeliĉa patr' — grandecon Dian.  
Ho! estu do al mi laŭdata Allaĥ!  
Per bru' de l' flam', vilaĝojn bruliganta,  
Per terotrem', la renversanta urbojn,  
Per pest', infanojn miajn ekstermanta,  
Kaj el patrina sin' — prenanta filojn.  
Ho! Allaĥ! Akbar Allaĥ! estas granda!

Vizaĝo ĉiu homa nun komencis  
Eviti min plej eble malproksime.  
Ĉe mia tend', teksita de filinoj,  
Tofaĵoj pro la roso nun nigriĝis,  
Ŝiriĝis, kaj, streĉite nur iome,  
Similis al putraĵ' el homaj ĉerkoj.  
La pest' videbla estis sur la tendo.  
Aŭskultu! eĉ da paseretoj aroj,  
Ĉi tien kunflugintaj ĉe l' tagiĝo,  
Panerojn manĝi, bani sin en sablo,  
De kiam miaj idoj malpliĝis,  
Pro l' manĝo tute ĉesis kunflugadi.  
Ĉu ilin fortimigis tol' ŝirita  
Ĉe mia tendo? ĉu vizaĝo mia?  
Eĉ unu pasereto ne alflugis,  
Mi tion ĉi rimarkis — kaj malĝojis.

Post la filin' tri tagojn — Dio mia!  
La mar' vespere jam komencis muĝi;  
Kaŝiĝis malserena suno-rondo,  
Kaj nigraj nuboj kovris la ĉielon.  
Alvenis nokt' terura, memoriĝa,  
Malluma, kaj de ruĝaj fulmoj — hela.  
Eĉ nun mi sentas, vidas kaj mi aŭdas,  
Mi aŭdas, kiel pluvoj vipas tendon:  
Ĝi distiriĝas kaj obtuze bruas,  
Sin super mi balancas en mallumo,

Kaj de la fulmoj tute helruĝiĝas,  
Simile al vampira tombo flama.  
Mi kvazaŭ aŭdis, krom fulmbato-krakoj,  
Malantaŭ tend' infanojn, la malvivajn,  
Kaj ili ĉiuj ĝemis terurige —  
Do streĉis mi vidsenton kaj orelon,  
Kaj kun timego mi meditis, kiel  
En tomb' infanoj statas dum ĉi nokto?  
Subite... Kial morto, la perfida,  
Mallaŭte tiel sub la tendon venis?  
La fulmoj batis krake — kaj subite  
Ekploris en lulil' infan' mallaŭte —  
Sed plor' esprimon havis teruregan,  
Ĉar tuj — patrin' kaj mi — ni ambaŭ kune,  
Ekkuris al vermeto la mizera.  
Infana ĝemo, kvankam tre mallaŭta,  
Laŭtega tiel al ni ambaŭ ŝajnis,  
Ŝiranta tiel kaj malĝoja tiel,  
Venanta el profunda internajo!  
Prudenta tiel! tiel malbenita!!!  
Ke ni ekkuris ambaŭ, fulmtrafite,  
Kaj sen espero jam, kaj sen konscio!

Kaj nin ne trompis antaŭsent' funebra!  
Ĝin pest' mortigis, kiel la aliajn,  
Ĝi iris kuŝi ĉe gefrat'-kadavroj,  
Plej kara ido mia! — kaj la lasta!!!

Ĝin prenis nigra morto senkomplete.  
Ĝi nek revenos, nek al mi plenkreskos!  
Nek mia domo iam ĝin revidos!  
Neniam ĝi revenos! — Malespero!!

Alvenis dua nokt', stelare brila.  
Ni estis kun patrin' en tend' — sur tablo  
Jen kuŝis antaŭ ni infan' malviva,  
Terura pro la senmovec' de l' morto.  
Mi tiam, rigardante ĝin, eksentis,  
Ke, se ĝi povus tiel resti ĉiam  
Kun ni, tra ĉiuj jaroj — eĉ nur tiel —  
Duon' da malesper' el kor' foriĝus.  
Kaj ĝin ne portis jam la pest-gardistoj,  
Nek mi al Ŝeĥa kapeleto, kie  
Kadavra pord' al ni malfermiĝadis,  
Sed la patrino mem ĝin portis tien.

Mi restis kun edzin' en tend' malplena.  
Cu vi komprenos? — nin anstataŭ ligi,  
Dolor' al ambaŭ disŝirinte sinojn,  
Venenon ian gutis en la korojn,  
Nun eble Dio mem purigos ilin.  
Malĝojo nia al malam' similis  
Kaj nigra, granda inter ni ekstaris.  
Do disigitaj estis ni kaj solaj,  
Kaj ni eĉ vorton ne interparolis;

Car kia povis esti parolado  
En tend' malplena inter ni, geedzoj  
Kaj la gepatroj de infanoj tiuj? —  
Dum la varmego ruĝe sun' leviĝis,  
Subiris tie, kie nun ĝi lumas,  
Simile al fajrera torĉ' brulanta.  
Kaj tiel pasis temp' al ni, senidaj,  
Kaj tendon granda mallaŭtec' plenigis.  
Trakuris eble mus' en luna brilo,  
Sed ĝem' aŭ bru' alia ne aŭdiĝis...  
Kaj tiel kvardek tagojn ni pasig's.  
De l' kvaranteno kuracistoj venis,  
Malĝojajn la vizaĝojn ekrigardis,  
Kaj vidis mi, ke ili eĉ ekmiris,  
Ĉar mi al ter' kliniĝis kaj griziĝis;  
Kaj pro maldorm', ĉagren', edzino mia  
Similis al sukcen' aŭ flava vakso.  
Ŝi havis sur la kap' harkronon grizan,  
La vangoj flamis brikkolore ruĝe,  
Okuloj brilis, kvazaŭ estus ŝi  
El mallumej' veninta al sunlumo.  
La kuracist' artikojn ekbatigis,  
En kiuj pest' unuajn formas krustojn.  
Mi estis sana. Homoj, ĉu vi kredos?  
Mi, kiu kisis ĉiujn sep kadavrojn,  
El tiu kvaranten' eliris sana!  
Edzino, eĉ duonon ne tuŝinta,

Ekbatis sian bruston kaj paliĝis,  
Kaj ŝanceliĝis, kaj kun ĝemo falis.  
Sur brakojn prenis mi virinan korpon,  
En tendon portis — kaj, jetinte ŝarĝon,  
Mi falis apud ŝi, senvive kvazaŭ,  
Kaj revekiĝis mi — por tagoj kvardek...

Mortante, la patrin' al mi konfesis,  
Ke volis ŝi el tomb' ideta havi  
Por rememoro ŝtonon, aŭ floretan,  
Hareton el orbukloj sur la kapo;  
Kaj tiu memorajo post infano —  
Jen la bildet'! ĝin tenis la manetoj,  
Kaj tiuj orharetoj, sanktaj nune,  
El kap' etula en tombet' prenitaj —  
(Ĉar la patrin' mizera havis forton  
Elfosi la ideton dum meznokto;  
Ŝi trovis ĝin ankoraŭ ne putrintan,  
Kaj kisis ŝi koralan la buŝeton,  
Kaj ree en kadavrajn vindaĵojn metis...)  
Ĉi tiuj memorajoj kaj la kiso,  
Ŝtelitaj el jaluza ter' de l' Ŝeĥo,  
Mortigis la patrinon kaj edzinon.

Kaj ree malfermiĝis sabla sino;  
Patrinon de mortuloj, la mortintan,  
Mi enterigis, kaj en tolkavernon



Revenis mi, kaŝiĝi kiel monstro.  
Nek mi la sunon sur ĉiel'-arkajo,  
Nek min la homoj vidis en la stepo.  
Mi, maljunul', infane naiviĝis,  
Kaj mi vizaĝon vivan ne memoris,  
Nur tiujn blujajn kaj terurajn vangojn,  
Ĉe mi de l' pesta morto forprenitajn!  
Dum hela tago kaj malluma nokto  
Kun mi en tiu tendo estis ili.  
Kun ili mi parolis kaj pripensis  
Interparolojn kun la tombanaro;  
Kaj strange ofte trafis mi okaze  
La ĝustan voĉon de infanoj miaj.  
Dum noktoj vekis min, el song' freneza,  
Terura la hurlado de hienoj  
Ĉe tomboj... kaj aŭskultis mi ploradon  
De la kadavr'-manĝuloj pro kadavroj.  
Mi similiĝis al serpent' dum frosto,  
Kaj mi pasigis tagojn kaj semajnojn  
Sen rememor', doloroj kaj deliroj,  
Kiele ŝton' malmola kaj malvarma.  
Kaj foje! — Dio jen pri mi ekzorgis! —  
Mallaŭte iu enrigardas tendon —  
Ho! — Ĝi ne estis jam vizaĝo homa,  
Sed kapo de kamel' maljuna mia.  
Ĝi min rigardis — tiel kompateme,  
Ke mi ekploris laŭinfane, laŭte.




Malĝoje mi travivis kvardek tagojn;  
Min liberigi venis fine homoj.  
Maldolĉa ho! liber', forir'-momento!  
Mi al malluma tend' jam kutimiĝis;  
Kun sento de malĝoj', dolor', teruro,  
Elŝiros mi palisojn, ŝnurojn, kiujn —  
Eterna Dio! — en ĉi tiun sablon  
Mi fiksas kun infanoj miaj kune.  
Ho! helpu ilin ŝiri, al solulo!  
Al vi, per sia bru' funebra, eble  
Pli da dolor' rakontos la tolajoj;  
Ĉar ili vidis ĉion! ĉion scias!  
Kaj nun similas al turment'-figuroj!  
Rigardu ilin, tuŝu kaj ne timu  
La peston, kiu per ektuŝ' ferblua...  
Vi, filo, ja ne estas mia filo...  
Sed ne! — forkuru! Ĉar ĉi tiu tolo  
Terura ŝajni devas al fremduloj.  
La mort' pro pesto? ho! jen mort' kruela!  
La proprajn fratojn oni ne rekonas,  
La fajro brogas vin, la brusto flamas...  
Mi tiel vidis miajn ok mortintojn!  
Kaj ĉiutage morton rigardante,  
Mi tie ĉi pasigis tri monatojn.  
Hodiaŭ — jen vojaĝaj naŭ kameloj  
Kun ok malplenaj seloj tie staras!  
Al mi nenio restis nun — krom Dio,  
Kaj tie miaj tomboj — apud vojo!

## AL LA VIRINO.

(El Zygmunt Krasiński.)

*Choć serca znęcisz skrawych ocz kryształem,  
Lub je podeptasz czezej myśli suchością.*



Se korojn vi logos per okul-kristalo,  
Turmentos per vanta de pensoj sekeco,  
Ne estos vi tiam de viv' idealo,  
Ne estos ankoraŭ virina beleco.

Modesto sen scio, de buŝo karmino,  
Hodiaŭ malmultan nur havas valoron.  
Ne esti — vi devas elkreski virgino,  
Travivi en mondo la tutan doloron!

Inspiroj, turmentoj, de larmoj multeco,  
Ekbrilos radie per sankta dieco,  
Kaj lumos eterne vizaĝo la pala;

Kaj kiam elplektos, sur frunto marmora,  
La kronon de forto la vivo dolora,  
Vi estos beleco! virin' ideala!

## ANĜELET' AŬ DIABLETO.

(El Antoni Odyniec.)

*Kto to powie, kto odgadnie?  
W głębi ocznych zwierciadełek.*

— | — | — | —

Kiu diros, kiu vidas?  
En okula speguleto  
De knabino, kio sidas:  
Anĝelet' aŭ diableto?  
Sidas tie, sur la rando,  
Senflugila belknabeto;  
Ĉiu vidas — sed demando:  
Anĝelet' aŭ diableto?  
Foje li, el sub palpebro,  
Brilas per ĉiellumeto,  
Ke vi jurus tuj en febro:  
Jen seraf', ne diableto!  
Sed tuj pikas vin petole  
Ekrigardo per pinglete,  
Ke vi krius kontraŭvole:  
He, satan', ne diableto!  
Mondo penos je eterne  
Pri la solvo de l' nodeto:  
En fraŭlin-okul' interne —  
Anĝelet' aŭ diableto?

## SVATITA JUNULINO.

(El Bohdan Zaleski.)

*Czyż ja nie w polu, jak kalina,  
Czyż ja nie sama tu jedyna?*

(~)~ | ~ | -(~ | ~)

En kampo, kiel viburneto,  
Ĉu mi ne estas knabineto?  
Kial en printempo mia  
Devas velki flor' lilia?  
Ho, sorto mia!

Ĉu mi ne estas patr-idino,  
Ĉu mi ne estas solfilino?  
Mian ĝojon prenis oni,  
Volas min el hejmo doni!  
Ho sorto mia!

Se mi eliras el kabano,  
Mi vagas kiel orf-infano.  
Amikino min ekvidas,  
Kvazaŭ time for rapidas.  
Ho, sorto mia!


62.<sup>1)</sup>

KIEL ROMPITA VENTE ARBETO.

(El Włodzimierz Wolski.)

*Jako od burzy krzew połamany*

*Tak się duszyczka stargała.*



Kiel rompita vente arbeto  
Estas animo la mia!  
Kie vi estas, roza kroneto,  
Kie vi floro lilia?

Ĉion forprenis Janko, karulo,  
Kion fordoni mi povis.  
Ĉie lin serĉas mia okulo,  
Sed lin nenie retrovis.

Kie vi estas, falko aera,  
Kie vi, mia brilanta suno?  
Mi, kiel kampa flor' en aŭtuno,  
Sen vi pereas mizera.

---

<sup>1)</sup> Poemoj № 62—65 estas arioj el opero „Halka“, kun muziko de Stanisław Moniuszko.

SUPREN FLUGI VOLUS MI. x

(El Włodzimierz Wolski.)

*Gdyby rannym słonkiem wzlecieć mi skowronkiem,  
Gdyby jaskółeczką bujać mi po niebie!*

— | — | — || — | — | —

Supren flugi volus mi kun alaŭdeto,  
Flirti en aero, kiel hirundeto,  
Naĝi kun fiŝeto en torento klara,  
Al vi, Janko kara!

Ĉar mi nek fiŝeto sur Vistula fundo,  
Nek mi alaŭdeto estas, nek hirundo,  
Nur al mi kantetas vento la montara:  
Venos Janko kara!

Se mi super fonto, kiel stel' radia,  
Min speguli povus en animo via!  
Kiel vaga lumo, kiu flamas pale,  
Se al vi ekbrilus mia larm' kristale!

Ĉar mi nek steleto, en la font', brilanta,  
Nek mi estas kampa lumo la vaganta,  
Fluas do sur roso mia plend' sen fino:  
Ve, al vi, knabino!

## KIAL EN HORO SOLECA.

(El Włodzimierz Wolski.)

*Czemuż mnie w chwilach samotnych owych,  
Gdy serce tęskni, gdy dusza wre —*

— | — | — | — | — ( )  
— | — | — | — | — ( )

Kial en horo soleca tia,  
Kiam sopiris mi en montar',  
Ekbrilis ĉarma vizaĝo via,  
Ekbrilis blonda harligo via,  
Buŝo korala, ridet' radia,  
Pupiloj bluaj sub okulhar'?

Kial animo, kvazaŭ rivero  
De l' vent', subite ekscitis sin?..  
Sur vin, orfino, sola sur tero,  
Sur vin, orfino, falis mizero,  
Eterne sekvas vin malespero,  
Kaj via plendo doloras min!



## BRUAS PINOJ SUR DEKLIVO.

( El Włodzimierz Wolski.)

*Szumią jodły na gór szczycie**Szumią sobie w dal.*

--( | --( | --( | --(

Bruas pinoj sur deklivo,  
 Bruas plende for;  
 Por junul' malgaja vivo,  
 Se doloras kor'.

Ne ofendis min alia,  
 Sole vi, amata mia,  
 Oj Halino, junulino,  
 Sol-amata, vi!

Dum ni estis ida paro,  
 Mi, por Halinet',  
 Serĉis super abismaro  
 Birdojn en nestet'.

Venis mi kun bonodora  
 Flor' el monta mur',  
 El foiro kun kolora  
 Koraleta ŝnur'.

Ne ofendis min alia,  
Sole vi, amata mia,  
Oj Halino, sol-knabino,  
Kulpa estas vi!

Kiel abiet' montara  
Ĉarme kreskis vi —  
Ah! post vi, knabino kara,  
Fajren saltus mi!

Jaroj fluas kun rapido  
De torent', sen fin' —  
Venis bela sinjorido,  
Vi malŝatis min.

Ne ofendis min alia,  
Sole vi, amata mia!  
Oj Halino, junulino,  
Sol-amata, vi!

---

66.

LA DESTINO.

(El Narcyza Źmichowska.)

*Słońce jasne ma promienie,  
Ptak ma piękny głos.*

— | — | — ( | — )

Suno hele al ni brilas,  
Birdo ravas nin;  
Suno lumas, birdo trilas,  
Ĉiu laŝ destin'.

Via koro por amado,  
Frunto por kronet',  
Buŝo via por kisado,  
Por kares' manet'.

Tio estas volo Dia,  
Ne malhelpu ĝin!  
Amu, kisu, kara mia,  
Kaj karesu min!

67.

ENSORĈITA RONDO.

(El Narcyza Ŵmichowska.)

*Wezmę űwiecę i latarnię  
I gűwnię z komina.*

— | — | — | (— ) .

Li:

Kun kandelo kaj lanterno  
Kaj brulűtupo pina  
Serĉos mi, ĉu estas ie  
Honestec' knabina.

Ŝi:

Serĉos mi kun luno, steloj,  
Kaj la sun' lumanta,  
Eble trovos mi junulon  
Kun koret' amanta.

Li:

Mi, serĉinte la knabinon,  
Scias en ĉi-horo:  
Por eltrovi plej honestan —  
Sonu per la oro!

Ŝi:

Lumiginte, rigardinte,  
Nun mi diros vere,  
Ke junulo ĉiu amas,  
Sed — sin mem sincere.

Li:

Mi jam trovis plej honestan,  
Karan, la serĉitan,  
Belan, dolĉan, en butiko —  
Pupon la pentritan.

Ŝi:

Mi jam trovis unu solan,  
Estas tiu kara:  
Brava, juna militulo  
Sur portret' centjara.

Li:

Ekrigardu pup' pentrita  
Ame per okulo,  
Eble el portret' ĉevalen  
Saltos militulo.

Ŝi:

Militul' pentrita saltu  
Sur ĉevalon flame!  
Eble en pentrita pupo  
Kor' ekfrapos ame!

---

## EN LA VALO NEĜA VENTO.

(El Piotr Dalman.)

*Na dolinie zawierucha  
Mokrym śniegiem dmie,*

— | — | — ( | — )

En la valo neĝa vento  
Blovas ĉiam pli;  
Fajro sur kameno mia  
Krakas ĉirkaŭ mi.

Ĉe l' kamen' el pipo ringe  
Fumon lasas mi...  
Ĉiuj rememoroj miaj  
Flugas for kun ĝi.

Kie estas la esperoj,  
La junec' el or'?  
Kiel vento la blovanta  
Ili flugis for!

Vent' sen celo, mi sen celo,  
Kun vi, fumo, tri...  
Tri sen celo en la mondo  
Kune flugu ni!

---

FABLETOJ POR INFANOJ. x

(El Stanisław Jachowicz.)

*Staŝ na sukni zrobit plameŝ,  
Placze i przeprasza mameŝ.*



Staĉjo veston makuletis,  
Ploris kaj pardonon petis.  
Panjo la okazon trovas,  
Por diri: „La veston purigi ni povas;  
Sed la tuta vivo via  
Restu sen makulo ia,  
Ĉar vi kredu ĝin, karulo,  
Ne puriĝos la makulo.“

---

*Nie rusz, Andziu, tego kwiatka,  
Róża kole, rzekła matka.* x

„Rozon vi ne tuŝu, Anjo,  
Dornoj pikas!“ diris panjo;  
Sed Anneto ne obeis,  
Pikis sin kaj poste veis.


---



## LA VIBURNO.

(El Teofil Lenartowicz.)

*Rosta kalina z liŝciem ŝerokiem,  
Nad modrym w gaju rosta potokiem.*



Kreskis viburno, la foliara,  
Super lazura torento klara.  
Roson, pluveton ĝi trinkis gaje,  
En suno varma sin banis maje.  
Kaj en julio, sur la branĉetoj,  
Ekbrilis ruĝe la koraletoj.

Viburn' knabine bele sin vestis,  
Kaj akvo — ĝia spegulo estis.  
La vento kombis ligojn de l' haro,  
Okulojn lavis rosa gutaro.

Ĉe la viburno, tie proksime,  
Janko ŝalmetojn faris kutime.  
Lia muziko flugis kun vento  
Apud viburno, super torento.

Liaj kantetoj, malĝojo-plene,  
Fluis sur roso ĉiumatene;  
Do lin atendis la foliara  
Viburno, kiel knabino kara.

Kaj en aŭtuno, kiam tombeto  
Jankon sub nigra kovris kruceto,  
Viburno — amis lin evidente —  
Ĉar foliaron disblovis vente,  
En akvon ĵetis koralojn foje,  
Tutan belecon perdis malĝoje.

---

71.

VANA PLENDO.

(El Adam Asnyk.)

*Daremne žale, próžny trud,  
Bezsilne ztorzeczenia!*

— — — | — — | — — | (—)

Jen vana plendo kaj sopir',  
Senforta la malbeno!  
Pasintajn formojn sorĉa dir'  
Ne kaŭzos al reveno!

Mond' ne redonos, en regres',  
Vidajojn de l' revado;  
Eĉ fajro, glav', ne estas ĉes'  
Al pensoj en kurado!

Kun vivo iri devas ni  
Kaj novan vivon doni;  
Sed ne per velka laŭrfoli'  
Obstine kapojn kroni.

Ne fluos reen viva ond'!  
Senfrukta peno ĉia;  
Koler' senforta, ĉar la mond'  
Sur vojo iros sia!

---

## ĈIELARKA FABELO.

(El Adam Asnyk.)

*Od kolebki biegła za mną  
Czarodziejska baśń tęczowa.*

— | — | — | —  
( — | — | — )

De lulilo min postiris  
Ĉielarka mirfabelo,  
Kaj ĝi flustris melodie  
Sorĉ-parolojn al orelo.

Naskis ĝin en fruvespero  
Vartistinoj-babilado,  
Kaj kun mi ĝi poste dormis  
Kaj min kisis dum sonĝado.

Ĉiam kune vekigante,  
Ni elkreskis el luliloj,  
Kaj ĝi min en strangan mondon  
Ien portis sur flugiloj —

Super la purpuraj maroj,  
Super la arĝent'-riveroj,  
Sur la ĉielarka ponto  
En transmondon de misteroj.

Malfermiĝis laŭ jurvorto  
Rok-pordeg' el diamantoj,  
Kaj mi paŝis en sorĉlondon  
De fantomoj kaj gigantoj.

Kaj post mi pordegon fermis  
Aŭ feino aŭ diino,  
Do mi iris en la landon  
Vagi ĝis la vivofino.

En la stranga lando, kie  
Ĉio vivas kaj parolas,  
Kie ĉiu ŝtono spiras  
Kaj fariĝi homo volas —

Iris mi tra helbrilanta  
Arbareto orfolia,  
Kie floras en la ombro  
La filika flor' magia.

Iris mi tra l' arbareto,  
Kie arboj kantojn bruas,  
Kie de l' junec' eterna  
La kristala fonto fluas.

Kaj salutis min envoje  
La okuloj de florrondoj  
Per rigardo forturnita  
Al senlima spac' de mondoj.

Kaj salutis homavoĉe  
Min birdaro kolorplena  
Kaj montradis pluan vojon  
Ĉe l' abismo malsemena.

Kaj obeis mi aŭguron,  
Trinkis mi el viva fonto,  
Tra sovaĝa la dezerto  
Iris mi sen tim' al monto.

Vane siblis la rampaĵoj  
Kaj fantomoj min teruris;  
Mirhelaĵon rigardante,  
Mi antaŭen ĉiam kuris.

Post trairo de l' dezerto  
Kaj de l' akvo ŝaŭm-ondanta,  
Mi ekstaris apud monto  
Vertikale leviĝanta.

Supre brilis la kristala  
Kastel' de gigant' kruela,  
Kies sorĉan povon spertas  
Virgulino la plej bela.

Antaŭ la kastelo drakoj...  
Ruĝajn fajlojn larĝ-distiras  
Kaj per oraj fajroflamoj  
Ĝis la nuboj supren spiras.

Hirtigante bronzajn skvamojn,  
Ili gardas sorĉ-trezoron,  
La plej belan virgulinon,  
De kristal'-kastelo gloron.

Tamen malgraŭ vigla gardo  
Mi ekvidis ŝin sur monto,  
Ŝin, pro kiu mi alvenis  
Doni vivon kun volonto.



Havis ŝi sur frunto stelon,  
Sub piedoj rikoltilon  
De lun', kaj anĝel'-vizaĝon,  
En okuloj lazurbrilon.

Tuj rigardo ŝia vekis  
Mian amon en la koro,  
Kaj al ŝi nun supren-celi  
Mi komencis kun fervoro.

Do mi tuj, ĉe l' glata muro,  
Per plektaj' de konvolvuloj  
Super senfundaj' ekpendis,  
Ŝin serĉante per okuloj.

Kaj mi grimpis ĉiam supren,  
Jam proksime ŝin admiris,  
Kaj al rava reĝidino  
Ambaŭ manojn mi eltiris.

Tuj mi kaptos ŝin en brakojn...  
Ve! hederoj sin disŝiras —  
Kaj mi falis en abismon,  
Kaj pereas kaj sopiras!...

Kvankam kora sang' forfluas,  
El abismo, la malhela,  
Vokas mi: „Ho kavaliroj!  
Kuru, kuru post la bela!“

Grimpu supren! ĉiam supren!  
Vin sur nigrajn rokojn svingu,  
Ke alvenu feliĉulo  
Kaj posede ŝin atingu!

Se li ne atingos — falos,  
Ne vantiĝos vivo lia,  
Ĉar plej bona vivoparto  
Estas postkurado tia.

Vidi eĉ de malproksime  
Sorĉ-kastelon el kristalo,  
Indas iri sango-page  
Al la land' de l' idealo.


Se denove komenciĝi  
Povus mia vivokuro,  
Duafoje mi postkurus  
Belulinon en lazuro.

---

## AL LA VIRINO.

(El Marja Konopnicka.)

*Czy wiesz ty piękna i ty uśmiechniona,  
Której usteczka rozchyła pustota.*



Ĉu vi scias, vi bela kaj vi ridetanta,  
Kies buŝon disigas gajeco petola,  
Kion signifas tiu sankta vort' „mi amas“,  
Kiu flugas el brusto kiel ora sago,  
Kaj simile al reĝa purpura kurteno  
Apartigas vin, kiu emocie flamas  
Kaj pro feliĉorevoj estas kor-tremanta,  
For de ĉiuj la homoj sur ter' en ĉi tago,  
Ke vi brakojn malfermu—nur al unu sola?

\* \* \*

Ĉu vi scias pri tio, papilio, floro,  
Vi kantema birdeto de printemp<sup>1</sup>-mateno,  
Ke tiu sama horo, kiam buŝo via  
Diras la vorton, estas de mirakloj horo?  
Ke tiam hellumiĝas tuta mondo dia,

Ke ĉiu viva fonto ekŝprucas arĝente,  
Ke de printempa rozo ruĝiĝas burĝono,  
Ke mirindaj vidajoj sonĝaj ĉi-momente  
Enkorpiĝas sub via blank-mano tremanta?  
Ke, kiel sun' en prismo, en viaj pupiloj  
La vivo rebriligas milojn da mirbriloj  
Kaj fleksiĝas radio ĝia brilanta?...  
Ke, al viaj piedoj, nokt' el sia krono  
Arĝentajn rosoperlojn ŝutas el ĉieloj?  
Ke, pro via kortuŝo, eĉ tremas la steloj?

\* \* \*

Ĉu vi scias pri tio, ke la vort' „mi amas“  
De plej puraj altaroj vin faras pastrino?  
Ke tiu sento, kiu virgece ekflamas  
Kaj ardas sur vizaĝa blankeco lilia,  
Kaj diamant'-fajrere brilas en okulo,  
Ne estas nur feliĉo, sed ora pesilo,  
Kiu tutmondan movon daŭrigas sen fino;  
La unua fajrero de l' grandega brulo,  
Kiu mondon per sia ĉirkaŭprenas brilo,  
En ĉeno de l' kreado la unua ero?  
Ĉu vi scias, ke kiam krepuska mistero  
Elsinigis la junajn formojn de la tero,  
Staranta en ĥaoso, en nudeco sia,  
Unua vorto, kiun Dio el etero  
Eldiris tiam, estis: „mi vin amas, tero!”

\* \* \*

Aŭskultu do! „Mi amas“ tute ne parolas;  
Mi, kiel karesata reĝino en domo,  
Tra l' viv' sur florsternata vojo iri volas;  
En viaj kisoj volas mi sveni ebria;  
Al mi ĉiumatene lumu ora suno;  
Ĉiuvespere, kiel lampo diamanta,  
Ekbrulu, super mia kap', argenta luno;  
Mi volas, ke vi aŭdu min dum tago tuta,  
Kaj renkontu per via rideto saluta,  
Kaj kantu al mi kiel najtingalo kanta;  
Mi volas, ke min nutru ŝvit-laboro via;  
Mi volas, ke vi kiel ombro, eĥo mia,  
Ĉiam por mi responda, vivu mallibere.

\* \* \*

Ne, — „mi vin amas“, tio signifas laŭvere:  
Kun vi mi levos ŝarĝon, vivo ĝia nomo!  
Mi estos via lumo, ornamo en domo,  
Mi portas al vi sanon, pacon kaj trankvilon!  
„Mi amas“ tio diras: idealo via,  
Kaj ĉiu via celo estas same mia;  
Ni kune laboradu, ke tago radia

Al ter' pli frue sendu sian brilon!  
Kaj mi volas, ke via vojo estu mia,  
Via deziru estu de mi la deziro,  
Ke estu vi de mia konscienc' inspiro,  
Kaj min konduku — al spirito dia.

Kurante ĉirkaŭprene, unu ĉe alia,  
Du spiritoj en regnon de la eterneco,  
Ni briligu en mondo, la malhela nia,

Stelaran vojon de la estonteco.

Mi volas vian scion ankaŭ ekposedi,  
Kiel juron konservi ĉiun vian vorton,  
Kun vi mi volas revii, sopiri kaj kredi

La nerompeblan, la spiritan forton.

„Mi amas“, tio diras: mi volas partigi  
Kun vi maldolĉan panon de peno, doloro;  
Al malĝoja — okulojn mi volas gajigi,

Esti la ŝildo de via honoro.

Sur via brust' mi estos blanka rozofloro,  
Ardanta per mistera flameto radia;  
Mi volas esti kiel rubin'-sigelilo,

Sur senparola kara buŝo via.

Forgesite, mi volas vivi en trankvilo  
En ia mond-angulo, sed al vi komuna...  
Kaj al nia ideto, super la lulilo,

Kanti kantetojn en nokto senluna.

\* \* \*

„Mi amas!“ tio diras: spirito libera!  
Mi ne volas flugilojn ligi viajn helajn,  
Nek forĝi vin al zorgo malvasta, mizera,  
Vin, kiu kvazaŭ aglo kutimis al kuroj,  
Supren, laŭ pensoflugo, en altojn ĉielajn,

Por plekti neston tie en lazuroj.



Mi ne volas vin ŝarĝi kiel fer-kateno,  
Nek ligi vin kun tero kiel peza ĉeno;  
Mi volas nur koniĝi al vi, ho amata,

Kiel spirito parenca kaj frata.

„Mi amas!“ tio diras: jen mia deziro,  
Esti juro de l' vero, de l' bono kaj belo,  
Esti via anima infano amata,

Esti revado via pri ĉielo.

Esti al via domo la blanka hedero,  
Esti al via frunto ŝirmo de sunbruloj.  
Mi volas esti via brako, penso, spiro,

Via amiko — kaj via edzino.

\* \* \*


Se ne batas en via brusto, ho virino,  
Kor' kapabla por amo de tia alteco,  
Ne diru: „mi vin amas“ al iu sur tero;  
Ĉar tiu, kiu ligos kun vi sian sorton,  
Malgaje rigardante vin per song-okuloj,  
Ke li vivas, neniam li diros la vorton;  
Li, spirito premata de sia sklaveco,  
Nenion faros por la posteuloj.



## SUR LA JUNGFRAU.

(El Marja Konopnicka.)

*Już się ranek rozbiela  
Na dzień wielki wesela...*



Jam blankiĝas mateno  
Por la ĝoja soleno...  
Sonas vikle signaloj,  
Jam vekigās la valoj:  
— Kiam estos, kiam estos Junedzino vestita?

Bruas supro granita;  
La Junedzo, vekita,  
Matenruĝon elsendas,  
Karan vorton atendas:  
— Kiam estos, kiam estos Junedzino vestita?

Iras ar' amikina  
Al la hejmo estrina,  
Iras kun la rozfloro  
Al renkont' de l' aŭroro:  
— Ho ankoraŭ, ho ankoraŭ Junedzino ne pretat!

La Junedzo sin zonas,  
Mondo kantas kaj sonas;  
Venas jun-amikaro,  
Grakas roka aglaro:

— Kiam estos, kiam estos Junedzino vestita?

— Ĝis nun ombroj ne cedas,  
Nokto forton posedas;  
Dormas akvoj en maro,  
Ĝis nun dormas homaro:

— Ho ankoraŭ, ho ankoraŭ Junedzino ne pretata!

La Popoloj-Lazaroj  
Sonĝas apud altaroj  
Pri la tago radia,  
Reviviĝo la sia:

— Kiam estos, kiam estos Junedzino vestita?

La Junedzo atendas,  
Du riverojn li sendas;  
li iras en landon  
Kaj ripetas demandon:

— Kiam estos, kiam estos Junedzino vestita?

Diru, ondoj, resone:  
Ŝi jam pretata duone;

Jam sur frunto granita  
Fajra krono plektita,  
— Nur ne estas, nur ne estas festa robo finita.

La torentoj refluas,  
Fermas pordon, krak-bruas;  
Knaras pordoj el ŝtono,  
Surde ĝemas resonado:  
— Ho ankoraŭ, ho ankoraŭ Junedzino ne preta!

Vent-orgeno jam bruas,  
La Junedzo enuas,  
La Monah', en talaro,  
Ringojn tenas por paro:  
— Kiam estos, kiam estos Junedzino vestita?

Tra ventegoj, silentoj,  
Balanciĝas la gentoj;  
Pasas tempo senlima,  
Muĝas tondr' malproksima:  
— Kiam estos, kiam estos Junedzino vestita?

En abismoj, vekite,  
La popoloj ekscite:  
— Malfermadu! — laŭtkrias —  
Tag' ekstere radias!  
— Devas esti, devas esti Junedzino jam preta!

Junedzino nubiĝas,  
Per vualo kovriĝas:  
— Ho, malbono ne cedas,  
Ĝis nun forton posedas:  
— Ho ankoraŭ, ho ankoraŭ Junedzino ne preta!

— Kiam tagon de l' juĝo  
Korn' anoncos kun muĝo,  
Kiam kradoj diskrevos,  
Fundoj lumon ricevos,  
Kiam levos sin valo,  
Pintoj krakos dum falo,  
Juĝa tondro ekbruos,  
Duon-mondon detruos,  
— Tiam estos, tiam estos Junedzino vestita!

---

## STAĤ.

(El Marja Konopnicka.)

*A jak poszedł król na wojnę  
Graty jemu surmy zbrojne.*

— | — | — | —

Kiam iris reĝ' militon,  
Ludis trumpetar' eksciton,  
Ludis trumpetar' el oro  
Por la venko, por fervoro!

Kiam iris Staĥ batalon,  
Bruis fontoj vek-signalon,  
Bruis de la spikoj spiro  
Por malbona sort', sopiro...

Kugloj tranĉas la aeron,  
Per kadavroj sternas teron;  
Reĝoj brave jen batalas:  
Vilaĝanoj dense falas!

Flirtas vente reĝa flago,  
Knaras ie kruco voja...  
Staĥon vundis morta sago,  
Reĝo hejm-revenas ĝoja.

Reĝon en pordego ora  
Eksalutis bril' aŭrora;  
Sonoriloj eksonoris,  
La venkinton laŭte gloris.

Kiam Staĥon tero prenis,  
En la kampo vent' orgenis,  
Plende kantis la tremoloj,  
Sonoretis — kampanoloj.

---

DE KIAM ESTOS VI EDZINO. X

(El Kazimierz Tetmajer)

*A kiedy będziesz moją żoną,  
Umitowaną, poślubioną.*



De kiam estos vi edzino,  
Amata mia laŭ destino,  
Por ni malfermos sin ĝardeno,  
Brilplena, luma ter-edeno.

Por ni aromon spiros floroj,  
Vinberaj fluos bonodoroj,  
Kaj de cejanoj kaj rozaro  
Kisata estos via haro.

Ni iros sole, enmedite,  
De sunradia or' pentrite,  
Kaj inter arboj, senparole,  
Promenos ni kviete, sole.



Al ni branĉetoj verdaj pendos,  
Narcisoj supren sin etendos,  
Kaj de falanta flor' tilia  
Kovriĝos kara kapo via.

Mi vin per blankaj rozoj kronos,  
Per miozotoj blue zonos,  
Ornamos per filik' magia,  
Kaj mondon faros pli radia.

Do kiam estos vi edzino,  
Amata mia laŭ destino,  
Por ni al tiu mirĝardeno  
Malfermos pardon amopleno.

---

## Libroj de profetoj.


(El Antoni Lange.)

77.

### I. UNUECO

Aŭ libro de Mozes.

*Oto przemówił Bóg w płomiennym krzaku:  
Mojżesz, słuchaj, mów synom Adama!*



Jen Dio ekparolis en flama arbusto:  
Aŭskultu, Mozes, diru al filoj de Adam!  
Mi estas via sola Dio — mi Jehova!  
Kreinto de ĉielo — de steloj — de maroj —  
De popoloj — arbaroj — ŝafidoj — leonoj,  
Kaj ĉion mi kunigis en mondo — unika!

Aŝskultu! kunligite en ĉeno unika,  
Animo universa floras en arbusto,  
Nutras liliojn — donas idojn al leonoj —  
El Sinai profetas al filoj de Adam,  
Muĝas en tondroj — skuas profundon de maroj:  
Unuigis animon kaj korpon Jehova!

Unu estas la Spaco — unu Di' Jehova —  
Kaj en Spaco kaj Dio — la Tempo unika!  
Unu sola Potenco ruliĝas tra maroj,  
Kaj unu suko ŝprucas en ĉiu arbusto —  
Kaj unu sango fluas en filoj de Adam —  
Per unu amo ardas patrinoj — leonoj!

Rampajoj — kaj ĉielaj birdoj — kaj leonoj  
El vermoj eligitaj estis de Jehova,  
Same kiel plej alta el vermaro — Adam.  
Supre starante, estis li spirit' unika,  
Kiu divenis Dion en flama arbusto —  
En purpuro de l' suno — en lazur' de maroj.

Kaj ĉiuj de la Tempo kaj de l' Spaco maroj,  
De l' animo inspiroj, de l' korpo leonoj —  
De l' Historio floroj sur Natur-arbusto,  
Kiel atomoj de la esto de Jehova,  
El de Eteroj granda unuec' unika  
Falis en mirigitajn okulojn de Adam.

Aŭskultu, mirigitaj vi filoj de Adam,  
Amu animon de la eteroj kaj maroj.  
Atentu kiel en la unuec' unika  
En Edeno kunvivis ŝafidoj, leonoj:  
Ĉi unuecon krei ordonas Jehova  
Kaj tion al vi diras en flama arbusto.

En la flama arbusto — al filoj de Adam  
Tiel diris Jehova! — Silentis la maroj —  
Kaj silentis leonoj. — Parolis Unika.

---

RIMARKO. „La libroj de profetoj“ estas verkitaj en la artoplena formo de t. n. sestinoj. Ĉiu sestino konsistas el ses sesversaj strofoj kaj el unu triversa. — La versaj finvortoj de la unua strofo ripetiĝas en la sekvantaj laŭ ĉiam nova ordigo, bazita sur la konstanta principo, ke en ĉiu sekvanta strofo la sesa, lasta finvorto de la antaŭiranta strofo, fariĝas ĝia unua, la unua — ĝia dua, la kvina — ĝia tria, la dua — kvara, la kvara — kvina, kaj fine la tria — ĝia sesa. Tio kaŭzas, ke en la lasta duonstrofo la finvortoj reaperas en la sama ordo, kiel en la unua. Anstataŭigante la finvortojn per literoj ni ricevas la sekvantan skemon:

- |                    |                |
|--------------------|----------------|
| 1) a b c d e f     | 2) f a e b d c |
| 3) c t d a b e     | 4) e c b f a d |
| 5) d e a c f b     | 6) b d f e c a |
| 7) a h   c d   e f |                |

## II. MULTECO

Aŭ libro de Brahma.

*Dolejcie Somy do ognia, bramini,  
Niech światu zagrzmi wielki hymn Rig-Wedy.*

Alverŝu al la fajro Soma'n, ho bramanoj,  
Al mond' eksonu granda himno de Rig-Veda.  
Mondo, plena de dioj, senmorta lotuso,  
Estas en mov' eterna — kiel ond' de Ganga.  
El Indra estas Agni — Indra el Varuna;  
La dio naskas dion — ĉie estas dioj!

Kaj ĉio estas dio — ĉie estas dioj.  
Enkorpiĝojn de Agni adoru, bramanoj,  
Enkorpiĝojn de Viŝnu, Indra kaj Varuna!  
Bovinaroj kaj nuboj, kantoj de Rig-Veda,  
Gazeloj kaj knabinoj, la ondoj de Ganga,  
Jen ĉio estas dio — pan', soma', lotuso.

Miliardajn polvojn enhavas lotuso,  
Miliardojn da dioj naskas ĉiam dioj.  
En la Surja-radioj, vento, ond' de Ganga,  
En larm', tra kiu vidas mondon la bramanoj,  
En arbaroj bruantaj kantojn de Rig-Veda,  
Estas spiro de dioj — spiro de Varuna.

Antaŭtago de l' esto — kaj de l' di' Varuna,  
Estis spirit' dormanta en Sensci'-lotuso,  
Ĝis li vekigis — kvazaŭ himnon de Rig-Veda  
Li aŭdus — kaj eliris tuj el li la dioj,  
Miliardoj da dioj — devasoj, bramanoj,  
Elefantoj, montsuproj — palmoj — ond' de Ganga!

Brulu al ni, ho Agni! Fluu, ond' de Ganga!  
Lumu, ho Indra! Lumu lazur' de Varuna!  
Bhagavat! vian supron iras la bramanoj,  
Por akiri la floron de forges'-lotuso,  
Kaj limon de korpiĝoj! Ĉie estas dioj —  
En tomboj, vivoj, sonas kantoj de Rig-Veda.

Al mond' eksonu granda himno de Rig-Veda.  
Fluas movo de l' esto — kiel ond' de Ganga,  
Milionoj da trioj naskiĝas. La dioj  
Iras en nuboj kaj en sunoj de Varuna,  
Sed ree profundigis en Sensci'-lotuso;  
Limon de transformiĝoj trovos — la bramanoj.

Aum! kantu bramanoj — himnon de Rig-Veda!  
Jen ekfloras lotuso — fluas ond' de Ganga —  
Adoron al Varuna! — Ĉie estas dioj!

---



## III. BATALADO

Aŭ libro de Zarathustra.

*Onego czasu w serce Zoroastra  
Z nieba Iranu spłyneło honover.*

En tiu tempo al la kor' de Zarathustra  
El Irana ĉielo defluis honover<sup>1)</sup>,  
Kaj li ekvidis veron per spirit' radia  
Kaj vokis: Arjoj, estos venkita Ahriman,  
Ĉar leviĝis la luma di' Ahura-Mazda,  
Kaj en la suno iras — venkont' de krepuskoj.

Eterne kun la lumo batalas krepuskoj: —  
Divoj<sup>2)</sup> ĉiam ribelas kontraŭ Zarathustra,  
Krepuskon ĉiam venkas di' Ahura-Mazda  
Kaj teren sendas — kiel la sian honover,  
Virojn, kiuj batalas kontraŭ di' Ahriman,  
Per belo, bono, kiel pafarko radia.

Pelvanoj<sup>3)</sup> de la lumo, en krono radia,  
Kuraĝege atakas murojn de krepuskoj  
Kaj en rubojn faligas regnon de Ahriman;  
Dum tondre sonas suna himn' de Zarathustra,  
Plivastiĝas ilia kono de honover,  
Kiun sendis sur teron di' Ahura-Mazda.

---

1) *Honover*—vorto de malkaŝo, rivelajo. 2) *Divoj*—malbonaj spiritoj, demonoj. 3) *Pelvan*—heroo.



Sunojn kaj florojn donis di' Ahura-Mazda.  
Lia don': ĉio bona, brilanta, radia —  
La kanto — kaj la amo — de scio honover!  
De Ahriman kreitaj: veneno, krepuskoj,  
Dolor' — kaj dubo en la kor' de Zarathustra —  
Militoj de popoloj — verko de Ahriman.

Terura estas iam forto de Ahriman —  
Malfortiĝas la luma di' Ahura-Mazda,  
Kaj vane vokas Iran: venu Zarathustra,  
Kiu dispelos per la rigardo radia  
Nubon de Ahrimanaj densegaj krepuskoj —  
De krepuskoj, en kiuj pereas honover!

Sed denove eksonos laŭte la honover,  
Pro timego ekstremos regno de Ahriman,  
Kiel nuboj en suno — diskuros krepuskoj!  
Kaj denove vekigos di' Ahura-Mazda  
Kun sia suna ŝildo — kun glavo radia!  
Ekbrulos en Irano fajr' de Zarathustra.

Kanto de Zarathustra — jen granda honover —  
En la sonĝo radia! — Jen falos Ahriman,  
Venkos Ahura-Mazda — pereos krepuskoj!

---

## IV. AMO

Aŭ libro de Jezus.

*A gdy zabłysta betlehemska gwiazda,  
Wiatr powiał świeży od góry Oliwnej.*

Kaj kiam ekradiis betlehema stelo,  
Freŝa vento ekblovis de monto Oliva,  
El ĉielo aŭdiĝis la voĉo: Hozanna!  
Hozanna al popoloj! Jen naskiĝis Jezus!  
Dio, kiu alvenas kun bona novaĵo —  
Pri savo el la larmoj, amo al malgrandaj.

Benataj la animoj estas ĉe malgrandaj,  
Ĉar la ilia estas betlehema stelo!  
Ĉar por ili alvenis kun bona novaĵo  
Kaj la amon anoncis sur monto Oliva —  
Filo de senmakula virgulino, Jezus!  
Al la popoloj regnon dian kaj hozanna!

El ĉielo defluis amo, ho hozanna!  
Amo por la spirite malriĉaj, malgrandaj,  
Amo por la malĝojaj. Amo estis Jezus,  
Kaj amo estis lia betlehema stelo.  
Kiu estas plorantaj sur monto Oliva —  
Pro amo ili kredu je bona novaĵo!

Benataj estas, kiuj kredas je l' novaĵo,  
Kiu en koroj bluas kiele hozanna,  
Kiu spiras aromon de branĉo Oliva,  
Kiu portas favoron, amon al malgrandaj —  
Brilas al la premataj — per pardono-stelo!  
Hozanna al popoloj! Ĉar naskiĝis Jezus.

Sur la tero judeja jen naskiĝis Jezus,  
En la urbo Nazaret aŭdiĝis novaĵo!  
Magojn al li kondukis betlehema stelo,  
Kaj la paŝtistoj vokis al li: ho hozanna!  
Kaj sekvis lian vojon aroj da malgrandaj  
De la Jordanaj ondoj ĝis monto Oliva.

Kaj li instruis homojn sur monto Oliva,  
Kvankam antaŭe sciis la Golgoton — Jezus!  
Al premataj — silentaj — kaj al la malgrandaj  
Dia ŝafido iris kun bona novaĵo.  
Hozanna al vi sonu, ho Kristo, hozanna —  
Super kruco radias via sava stelo!

Ekradiis la stelo — sur monto Oliva.  
Je eterne hozanna — venis teren Jezus —  
Kun la bona novaĵo — amo por malgrandaj.

---

## V. NEPRECO

Aŭ libro de Mahomet.

*Jeden jest Allach, jeden jego prorok,  
Więc, gdy okryty skórami wielbłąda.*

Nur unu Allaĥ, unu nur lia Profeto.  
Do kiam li, kovrite per fel' de kamelo,  
Sola meditis inter araba dezerto,  
Tiam al li ekvokis Allaĥ el ĉieloj:  
Iru, mia profeto, diru al popoloj,  
Ke plej alta el leĝoj estas la Nepreco!

Jen super ĉio regas senŝanĝa Nepreco:  
Mizera almuzulo, plej alta profeto,  
Reĝo, potenca estro de multaj popoloj,  
Ne havas pli da povo ol hund' aŭ kamelo,  
Kontraŭ potenco, kiu fluas el ĉieloj  
Al grandaj urboj kaj al araba dezerto.

Sur maro — en arbaro — aŭ en la dezerto  
Vi ne forkuros sorton, kiun la Nepreco  
Per eterna verdikto sendas el ĉieloj.  
Nek sen ĝia ordono naskiĝos profeto,  
Nek vi ploros la pardon de via kamelo,  
Nek por interbataloj leviĝos popoloj.

La steloj — la brutaroj — same la popoloj,  
Kiuĵ velas sur maroj — aŭ en la dezerto  
Kuraĝe migras dorse sur sia kamelo,  
Devas subiĝi al la senceda Nepreco —  
Kaj de neniu reĝo — neniu profeto —  
Ŝanĝita estos alta verdikt' de ĉieloj!

Nevenkebla jen estas volo de ĉieloj!  
Do humiliĝi devas antaŭ ĝi popoloj:  
El ĝi nur la senmorta naskiĝas profeto!  
Ĉiun larmon — kaj ĉiun palmon en dezerto,  
Kiel kalkul'-ciferojn, — tiel la Nepreco  
Konas — kaj prikalkulas paŝojn de kamelo.

Do vi, migrante sur la dorso de kamelo,  
Ne atentu, ĉu vento muĝas el ĉieloj;  
Ĉar kiam ĝin ordonas senceda Nepreco,  
Unu haron ne perdos vi inter popoloj,  
Nek pereos sur maro, nek inter dezerto!  
Tiel parolis Allaĥ — aŭskultis Profeto.

Do leviĝis Profeto — en fel' de kamelo,  
El sovaĝa dezerto - - laŭ voĉ' el ĉieloj —  
Iris li al popoloj — anonci Neprecon.

---

## VI. LIBERIGŔO

Aŭ libro de Budda.

*Wŝród ludu Sakjów żył królewicz Budda  
W zamku rozkoszy. Mistyczne Agama.*

Inter Sakja popolo vivis princo Budda  
En kastel' de volupto. Mistika Agama<sup>1)</sup>  
Puŝis lian animon al dezertaj ĝungloj<sup>2)</sup>.  
Pri mizer' li ne havis plendon de konscio,  
Sed sentis eternecon de form-disvolviĝo,  
De ĉiusuferado, kies lim' — Nirvana.

Ĉiujn mizerojn al li konigis Nirvana;  
Do forlasis kastelon sian reĝan Budda,  
Sciante pri eterna sufer'-disvolviĝo,  
Kaj liberiga el la suferoj Agama.  
Jes, fonto de mizeroj estas senkonscio!  
Do lasinte kastelon — li iris al ĝungloj.

Li sufokis de l' esto volon kaj en ĝungloj  
Serĉis ekkonon. Tie en li pri Nirvana  
Kaj antaŭaj korpiĝoj vekigis konscio.  
Sub ombro de figujo ekmeditis Budda,  
Kiam sur lin defluis la sankta Agama,  
Kiel la liberiga ĉiam disvolviĝo.

<sup>1)</sup> *Agama* — celado, malkaŝo, ekkono, religio. <sup>2)</sup> *Ĝungloj* — arbaraj dezertoj.



La estojn puŝas supren plua disvolviĝo.  
Suno — la tera globo — la dezertaj ĝungloj,  
Kaj la homaj spiritoj kaj dia Agama  
Tra jarcentoj sur supron iras de Nirvana,  
Kiu rompas neprecon. Veron vidis Budda,  
Ke liberigas el la avidoj — konscio.

Plej alta kredo estas de vero konscio,  
Plej alta ver' — eterna spirit'-disvolviĝo,  
Plej alta el spiritoj sur ter' — estis Budda!  
Sufoku korp-avidojn! En la verdaj ĝungloj  
Meditu kiel Budda. — Kaj tie Nirvana  
En vi lumigu vian la Buddi-Agama!).

Veron en via koro veku la Agama.  
Kaj pri la universa mizero konscio  
Nasku en ĝi kompaton grandan. Vin Nirvana  
Perfektigu. Transforma via disvolviĝo  
Ekhaltu. Iru en la dezerton de ĝungloj  
Kaj fariĝu el via meditado Budda.

Fariĝos fine Budda! — Fariĝos Agama —  
En spiritoj kaj ĝungloj — aperos konscio,  
Ke esto — disvolviĝo, — ke limo — Nirvana.

---


1) *Buddi-Agama*, celado al Budda, religio de Budda



## VI ESTAS KIEL AŬRORO.

(El Józef Jankowski.)

*Ty jesteś piękna, jak zorza,  
A tak boląca, jak rana.*



Vi estas kiel aŭroro,  
Sed kiel vundo dolora;  
Por vi ekfloras mirinde  
De revoj lando kolora.

Mi metis vin en animon,  
Kiele rozon, aŭroron;  
Aŭroro sange ekflamis,  
La rozo vundas la koron.

Kaj vokas ĉiu guteto  
De mia sango la kora:  
Vi estas kiel aŭroro,  
Sed kiel vundo dolora.



## KANTO PRI VENTO.

(El Leo Belmont.)

*O, gdybym miał wiatru potęgę i tchnienie,  
Wnet życia ja zmienilbym tło.*

— — | — — | — ( — | — — )

Se havus mi forton kaj spiron de vento,  
De viv' aliĝus fason',  
Mi estus semanto de ama la sento,  
Ŝiranto de ĉia malbon'.

Per polvo friponojn blindigus mi kure,  
Falegus malver'-bastion!  
Mi kverkojn fierajn fleksadus terure,  
Karesus je roza la kron'.


Mi plorus poeton, sur tomb', kun betulo,  
Mi vipus la maron sen lac';  
Sur vojo ŝtonegojn mi skuus fortulo,  
Ke muĝus la nokt' per minac'.

La poplon maljunan al dormo lulante,  
Ridetus mi kun akaci';  
Fluginte en kampon, sonorus mi kante,  
Ho! forton de l' vento al mi!

## PROMETEO.

(El Zygmunt Różycki.)

*Jam Prometeusz, przykuty do skaty,  
Powrozem losów spętany boleśnie.*



Mi, Prometeo, forĝita al roko,  
Per ŝnur' de sortoj ligita dolore  
Al ĝlita muro de ĝlaci'-amasoj,  
Ruliĝas kaj ŝiriĝas en turmentoj!  
Rokrandoj vundas la streĉitajn brakojn,  
Kiuĵ perforte volas liberiĝi.  
Ŝiriĝas mi! Fortikaj ŝultroj tremas,  
Brust' spiras lafon de volvitaj flamoj,  
Anim' premiĝas, kor' pulsas sopirel  
Ŝiriĝas mi, ruliĝas! Kaj jen, supre,  
Arĝente brilas laktvoja turniĝo;  
Stelar'-orgioj freneze fajreras,  
De lunfantomoj fluas la orajoj,  
Ĉirkaŭsprucante per lumplenaj rondoj!  
Streĉigas mi! Ho povu mi disrompi  
De propra malgrandeco la katenojn,  
De sort' mokanta disŝiri la ringojn,

Leviĝi supren per agla flugado,  
Plektiĝi en harligon de kometoj,  
Per brust' ekbati ŝildojn de lazuroj,  
Elŝiri de ĉielo la misteron,  
Kaŝitan en ondantaj, blankaj nuboj,  
En spiroj de tagiĝo, en purpuro  
De sunsubiroj printempaj, kvietaj;  
Poste ekflugi ankoraŭ pli alten,  
Per korfajrer' ekbati sunan ŝildon,  
Kapti la torĉon de flamaj torentoj,  
Kapti la fulmon — kun fulmo stariĝi,  
Kiel demono sur plej alta supro,  
Malsupren ĵeti ĝin — ĝi tondru, knaru,  
Muĝante kuru tra tero-plataĵoj,  
En splitojn rompu trajtojn de l' mondo,  
Kaj ĝi forviŝu la kruston de l' tero;  
Per uragano-vipoj, fulmo-fajro,  
Batu homaron, furioz-ebrian,  
Batu homaron, en koto putrantan,  
Kiu estingas korojn en pek-marĉoj,  
Kaj la spiritojn makulas per falso.

Ruliĝas mi! Streĉita ŝultr' laciĝas,  
Proteste tremas kor', ribele krias,  
Ke malesper', malbon', mallum' ĉirkaŭe,  
Ke estingiĝis lucerno de l' vero,  
Ke ĉio estas fumo, iluzio,  
Anstataŭ vort', miraklofara ago!

Ŝiriĝas mi, ruliĝas! Sed jen kio?  
Mi aŭdas ian ploron malproksime,  
En kiu vibras ĉiuj kordoj koraj;  
Mi aŭdas ĝemon kaj adiaŭ-psalmojn,  
Kiu nomiĝas „Neniam“ — „Eterne“.  
Mi vidas milojn da frenez-vizaĝoj,  
Da koroj, kiujn konsumas sopiro  
Al lando de la eterna fratiĝo,  
Al hela bordo de liber' konstanta,  
Kiu al ĉiuj malfermos sezamojn  
De l' vivo-ĝojo kaj de l' morto-ĝojo.

Streĉiĝas mi, ruliĝas! Donu spiron!  
Iom da povo por unu momento!  
El supr' ĉiela mi ne jetos fulmojn,  
Nek volas mi per fajroflamoj spiri,  
Sed iri volas en valojn! en valojn!  
Kapti homaron per la flamaj brakoj,  
Premi ĝin forte al brusto sanganta,  
Kaj per titana svingo de sufero  
Ĵeti vizaĝen al suno!

---

86.

AVERTO.

(El Józef Kotarbiński.)

*Mniemasz, że stoisz wysoko,  
Gdy inni ludzie zbyt nisko?*

— — | — — | — — | — —

Vi pensas, ke pli alta staro  
Vin levas super aliulojn?  
Sur svarmon de la formikaro  
Ekturni volu la okulojn!

Jen iras da formikoj strio...  
Egala nia vojo tera  
Do ne ŝajniĝu duondio,  
Dum vermo estas vi mizera.

---

87.

FRATA PARO.

(Kanteto.)

*Węgier, polak, dwa bratanki  
I do szabli i do szklanki.*

— — | — — | — — | — —

Pol', hungaro: frata paro,  
Dum batalo, drink-regalo.  
Vigla kapo, brava koro,  
Benu ilin di'-sinjoro!

## LA KOZAKO.

(Popola kanto.)

*Tam na górze jawór stoi,  
Jawór zielenieński.*

— | — | — | (—)

Sur monteto tie staras  
Verda la acero;  
Mortas juna la kozako  
Sur la fremda tero:

— Mortas mi, en fremda lando  
Venas mia fino,  
Do alvoku la patrinon,  
Mia amatino!

Kaj alvenis la patrino,  
Venis patrineto,  
Turnis palan la vizaĝon  
Kontraŭ la fileto:



— Ho fileto, mia kara,  
Devis vi perej,  
Ĉar ne volis vi konsilojn  
De l' patrin' obej.

— Mi vin petas, patrineto,  
Bele enterigu:  
Oni batu sonorilojn,  
Kaj orgen-ludigu;


Sed ne gvidu min al tombo  
Pastroj, nek diakoj,  
Nur en teron ukrainaj  
Metu min kozakoj.

---

## EBENIGU VI.

(Popola kanto)

*Porównaj Boże  
Góry, doliny!*



Ebenigu vi  
Montojn, valojn, Di',  
Ke estu tut-ebene!  
Gvidu, ho Sinjor',  
Lin al mia kor',  
Dimanĉe frumatene!

Malgraŭ la dimanĉ'  
Pelu, ho fianĉ',  
Ĉevalon vian voje;  
Estas mia kor'  
Plena de dolor',  
Kaj plendas mi malĝoje.

HO VIBURNETO ĈE L' TORENTO. X

(Popola kanto.)

*Czego kalino w dole stoisz?  
Czy ty się letniej suszy boisz?*

— — — | — — — | — — — | — — —

— Ho viburneto ĉe l' torento,  
Ĉu vin timigas seka vento?

— Se mi ne timus pri sek-vento,  
Mi ja ne starus ĉe l' torento.  
Sur la monteto mi stariĝus,  
Al la acero egaligus.

— Vi disvolviĝu, viburneto!  
— Kaj vi pripensu, knabineto!  
— Jam pripensado mia pasis:  
Patrinon, patron mi forlasis.

---

91.

## MACJEK.

(Popola kanto.)

*Idzie Maciek bez wieś z bijakiem za pasem,  
Pośpiewuje sobie tym-dy-rym-dy czasem.*

— | — | — || — | — | —  
— | — | —

Kun batil' ĉe zono iras Macjek voje,  
Iam li ekkantas „tim-di-rim-di“ ĝoje.  
Se iu baras straton,  
Ricevas kapobaton.  
Oj da, dana!

Ve! jen malsaniĝis Macjek nia kara,  
En drinkej' ne estis dum vespero kvara;  
Jam al ni ne kantetas,  
Bieron ne aĉetas.  
Oj da, dana!

Mortis Macjek, mortis, venis lia horo;  
Pacon la eternan donu Di'-sinjoro!  
Li estis brava viro  
Ĝis lasta sia spiro.  
Oj da, dana!

Nia Macjek kuŝas sur kverka tabulo.  
Se muziko ludus, saltus li, mortulo;  
Mazuro, animforte,  
Moviĝas, eĉ postmorte.  
Oj da, dana!

---

## DONU MIN AL JANKO.

(Popola kanto.)

*Matus, moja matus, dajze mnie za Jaska,  
Spodobaty mi sie kólecčka u paska.*

— | — | — || — | — | —

Donu min al Janko, mia patrineto!  
Plaçis al mi liaj ringoj ĉe l' zoneto,  
Plaçis al mi ringoj, kaj liphar' tordata,  
Do min edzinigu, patrinet' amata!  
Oj dana! oj dana!

Diru al mi, kion diri nun vi volas,  
Ĉar mi ĝin ne scios, se vi ne parolas.  
Oj dana! oj dana!

Ho edziĝu, kara, vi bonfartos, frato:  
Havos vi amadon, plendos pri malsato.  
Oj dana! oj dana!

## FAJRELIGU HUFUMETOJ.

(Popola kanto.)

*Podkóweczki, dajcie ognia,  
Bo dziewczyna tego godna.*

— ) | — ) | — ) | — )

Fajr-eligu hufumetoj!  
Indas tion knabinetoj.  
Se ne indus eĉ knabino,  
Kalkan-frapu ni sen fino:  
Ĝis, ĝis, ĝis, ĝis maten'.

Frapu vigle per botetoj!  
Ŝtalaj estas hufumetoj,  
Ke eliĝu fajreretoj!  
Frapu vigle per botetoj  
Ĝis, ĝis, ĝis, ĝis maten'.



XXI.

## Pola-kaŝuba.

94.

DEDIĈO AL KRASZEWSKI.

(El Jarosz Derdowski.)

*We nqm drogę otworzele  
Bez cerpliwą proczę.*

— | — | — | (—)

Vi malfermis al ni vojon  
Per laboro cela;  
Vi eklumis kiel suno  
Inter nokt' malhela.

Tra tricol-tabuloj nune  
Vidas ni mirinde,  
Kvankam laŭ kalumniuloj  
Ni naskiĝas blinde.

Ĉar vin polaj balt-maranoj  
Laŭmerite amas,  
Mian tre modestan verkon  
Via nom' ornamas.

Prenu de kantist' kaŝuba  
Simplan la rimaron,  
Kiun meti mi kuraĝas  
Sur patruj'-altaron.

Jen malnova rakontado  
Pri la vivo, moro;  
Kion mi kolektis hejme,  
Prenu ĝin, Sinjoro!

Dum Vistulo de Krakovo  
Nian maron fluos,  
Polan kredon, polan lingvon  
Tempo ne detruos.

Jen, el kor-profundo nia,  
La konfes' popola:  
Dum ni vivas, ne pereos  
Kaŝubejo pola!

---

XXII.


Portugala.

95.

KOMENCO DE LUZIADOJ.

(El Luiz Camões.)

*As Armas. e os Barões assinalados,  
Que da occidental praia Lusitana.*



Batalojn kantas mi de l' heroaro,  
Kiu de l' hejma bordo luzitana  
Tra l' ne ankoraŭ ŝipirita maro  
Ĝis trans insulo velis Taprobana<sup>1)</sup>,  
Kaj da danĝeroj en militofaro  
Pli venkis, ol permesas fort' homana,  
Ĝis kiam, inter malproksimaj gentoj,  
Stariĝis novaj regno-fundamentoj<sup>2)</sup>.

---

<sup>1)</sup> Cejlono. <sup>2)</sup> Portugalaj kolonioj en orienta Hindujo.

Kaj kantos mi de reĝoj glor-memoron,  
Kiuj potencon de la imperio  
Disvastigante, sanktan kruco-gloron  
Firmigis en Afriko kaj Azio,  
Per heroajoj, kies altvaloron  
Laŭrkronis senmortec' en historio.  
Rakontos ĉion mi en kanto-partoj,  
Se vi min helpos, ho geni' de l' artoj.

Ĉesu de l' saĝa Greko kaj Trojano  
Ŝipirojn laŭdi, kiujn ili faris,  
Kaj kiel Aleksandro kaj Trajano  
Por venkaj militiroj sin preparis;  
Mi kantos vin, ho glora Luzitano,  
Ĉe kiu Mars', Neptuno serve staris.  
Silentu do, antikva Muzo kanta,  
Eksonos glor', pli alten leviĝanta!

---

## KAMELO KAJ PULO.

(Fablo.)

*Em uma longa jornada  
Em camelo mui carregado.*

— | — | — | —

Dum tre longa tag' somera  
La kamelo, tro ŝarĝite,  
Foje vokis, lacigite:  
— „Ho, la ŝarĝo malmodera!“

Aŭdis ĝin fraŭlino pulo,  
Kaj respondis fiersente:  
— „Trankviliĝu, mi momente  
Liberigos vin, karulo,  
De l' pezaĵo tro premanta;

Jen mi saltas for el selo!“  
Tiam diris la kamelo:  
— „Dankon, moŝto elefanta!“

---

XXIII.

Provenca.

97.

MIA KORO.

(El „La Miougrano“ de Théodor Aubanel.)

*Ah! se moun cor avié d'alo,  
Sus toun côu, sus toun espalo.*

— | — | — ( — | — )

Se estus mia kor' flugila,  
Al via kolo, blanke-brila,  
Ĝi flugus kiel flam',

Kaj en orelon, karulino,  
Al vi rakontus ĝi sen fino  
Mirajojn pri la am'.

Se estus mia kor' flugila,  
Al via buŝ', koral'-simila,  
Ĝi flugus, kanari',

Per kisoj vin karesus kante,  
Sur via buŝo, silentante,  
Ekdormus fine ĝi.

Kor' senflugila estas mia!  
Ĝin premas vintro la glacia;  
Do vi varmigu ĝin!

En manojn prenu ĝin favore,  
Rigardu: safideto plore,  
Karese kaŝas sin!



XXIV.

Rumana.

98.

RODIKA.

(El Basile Alecsandri.)

*Purtând cofi'a cu apa rece  
Pe ai sei umeri albi, rotunjori.*

— — | — — || — — | — ( )  
— — | — — || — — | — ( )

Portante kruĉon kun akvo freŝa,  
Sur blanka ŝultro, kun flor' en har',  
Juna Rodika paŝas jen gaje  
Al soifanta la semantar'.

Rapide ĉiuj saltas renkonte,  
Vokas: „Rodika, ho karulin',  
Ĉar vi alportis la plenan kruĉon,  
Viaj deziroj plenumu sin!

Kiam aŭtune vi edziniĝos,  
Paŝu sur floroj en hejm-trankvil':  
En via domo tabl' estu plena,  
La brusto iĝu idet'-lulil'!“

Ili, trinkinte akvon el kruĉo,  
Ŝin ĉirkaŭsemas bene per gren'.  
Rodika ridas kaj forkurante,  
Grenon el haroj forskuas jen.

XXV.


## Rusa.

99.

FINITA LABORO.

(El Aleksandr Puŝkin.)

*Mig vajdželennyj nastat. Akonĉen moj trud mnogoletnij.  
Ĉtoĵ njepanijatnaja grustj tajno trjevojit mjenja?*



Venis moment' dezirita. Laboro multjara finiĝis.  
Kial per stranga malĝoj' maltrankviliĝas la kor'?


Ĉu mi, la verkon fininte, nun staras dungat' malnecesa,  
Jam pagita por ĝi? fremda al nova labor'?

Aŭ mi domaĝas laboron, silentan kunulon de l' nokto,  
Anon de l' hejma diar', anon de l' ora Aŭror'?

PRINCIPOJ.

(El Aleksej Tolstoj.)

*Kol lubitj, tak bjez razsudku,  
Kol grazitj, tak nje na ŝutku*



Se ekami, per potenco;  
Se minaci, en intenco;  
Se insulti, en varmegoj;  
Se ekbati, per fortego.

Se disputi, kun sincero;  
Se stariĝi, pro afero;  
Se pardoni, per animo;  
Se festeni, jam sen limo!

---

101.

AMA SENTO.

(Popola kanto.)

*Bytj moĝet, ĉto my razajdjomsja,  
I ĉto nas razluĉit sudjbà.*

— | — | —(—)

La sorto nin eble disigos,  
Se estas la volo de Di';  
Vin eble eĉ tio ridigos,  
Ke kara mi estis al vi.

Sed kiam min ami vi ĉesos,  
Alia fortiros vin sent',  
Neniam mi vin ekforĝesos,  
Por tiu feliĉa moment'.

Foriĝos de mi mia forto,  
Kaj igos sopiro al vi  
Suferi la batojn de l' sorto,  
Estingos spiriton en mi.

Sed kiam eĉ vivi mi ĉesos,  
Ĉirkaŭos min tomba silent',  
Neniam mi vin ekforgesos  
Por tiu feliĉa moment'.

Kaj tiam vi min rememoros,  
Vizitos la tombon de mi,  
Kaj jam tro malfrue vi ploros  
Kaj velkos kaj iros post mi.

Se Dio ĉielon permesos,  
Aŭ punos infera turment',  
Neniam mi vin ekforgesos  
Por tiu feliĉa moment'!

---

XXVI.

Serba-Kroata.


102.

MORTO DE PATRINO DE JUGOVIĆOJ.

(Heroa popolkanto.)

*Mili Bože čuda velikoga!*

*Kad se sleže na Kosovu vojska.*



Kara Dio de l' miraklo granda!  
Kiam sur Kosov' armeo falis,  
Kaj en la armeo naŭ Jugidoj,  
Deka vi, maljuna Jug-Bogdano,  
Dion petis Jugidoj-patrino,  
Ke al ŝi li donu falk-okulojn  
Kaj de cignoj la blankajn flugilojn,  
Ke forflugu ŝi al kamp' Kosova  
Kaj ekvidu siajn naŭ Jugidojn  
Kaj maljunan dekan Jug-Bogdanon.  
Ŝian preĝon Dio elafskultis:  
Kaj al ŝi li donis falk-okulojn

Kaj de cignoj la blankajnflugilojn.  
Flugas ŝi al kampo de Kosovo,  
Trovas ŝi malvivajn naŭ Jugidojn,  
Dekan la maljunan Jug-Bogdanon;  
Super ili naŭ batalajn lancojn,  
Kaj naŭ falkojn sur ĉi tiuj lancoj,  
Ĉirkaŭ lancoj naŭ bonajn ĉevalojn,  
Apud ili naŭ kruel-leonojn.  
Kaj ekhennis naŭ bonaj ĉevaloj,  
Kaj ekmuĝis naŭ kruel-leonoj,  
Kaj ekkriis laŭte naŭ ĉasfalkoj;  
Sed patrino estis hardokora,  
Ke de l' kor' eĉ larmon ŝi ne ploris.

Sed ŝi prenis naŭ kruel-leonojn.  
Kaj ŝi prenis same naŭ ĉasfalkojn  
Kaj revenis al kortego blanka.  
Jen de malproksime bofilinoj  
Ŝin ekvidis kaj renkonten iris.  
Kaj ekĝemis plore naŭ vidvinoj,  
Kaj eploris naŭ malgrandaj orfoj,  
Kaj ekhennis naŭ bonaj ĉevaloj,  
Kaj ekmuĝis naŭ kruel-leonoj,  
Kaj ekkriis laŭte naŭ ĉasfalkoj,  
Sed patrino estis hardokora,  
Ke de l' kor' eĉ larmon ŝi ne ploris.



Kiam estis nokte mezonokto  
Kaj ekhenis blankĉeval' Damjana,  
La patrin' demandis Damjaninon:  
„Bofilino, ho Damjanedzino,  
Kial henas blankĉeval' Damjana?  
Ĉu malsatas li tritikon blankan,  
Aŭ soifas li akvon el Zveĉan?“  
Kaj rediris la Damjanedzino:  
„Bopatrino, ho patrin' Damjana,  
Ne malsatas li tritikon blankan,  
Nek soifas li akvon el Zveĉan,  
Sed lin Damjan kutimigis manĝi  
Ĝis meznokt' avenon delikatan,  
Post meznokt' vojaĝi sur la strato;  
Do funebras li sinjoron sian,  
Ke ne portas lin sur sia dorso.  
Sed eĉ nun patrino hardokora  
De la koro larmon ne ellasis.

Kiam en mateno tag' heliĝis,  
Jen alflugas du korvoj, la nigraj,  
Sangaj estas ĝis al ŝultr' flugiloj,  
Kaj la bekojn kovras blanka ŝaŭmo.  
Ili portas manon de heroo,  
Kaj sur mano estas ringo ora;  
Ili jetas ĝin al bust' patrina.  
Prenas manon Jugidoj-patrino

Kaj ŝi turnas kaj returnas ĝin.  
Kaj ŝi vokas la Damjanedzinon:  
„Bofilino, ho Damjanedzino,  
Ĉu rekonas vi ĉi tiun manon?“  
Ekparolas Damjana edzino:  
„Bopatrino, Damjana patrino,  
Tio estas man' de nia Damjan,  
Ĉar, patrino, mi rekonas ringon;  
Edziniĝis mi per tiu ringo.  
Prenas manon patrino Damjana  
Kaj ŝi turnas kaj returnas ĝin,  
Kaj ŝi murmuretas al la mano:  
„Mia mano, verda mia pomo,  
Kie kreskis vi kaj kien falis?  
Vi elkreskis jen ĉe mia brusto,  
Kaj vi falis sur Kosovan kampon\*.  
Jen ŝi diris, animon elspiris.

---

## LA KVAR FONTOJ.

(El Petar Preradović.)

*Usred polja Kosova**Ĉetir vrela izviro.*

— | — | — | —

Meze de Kosova kampo  
 Fontoj kvar el tero ŝprucas:  
 Blanka lakt' el unu fluas,  
 Ruĝa vino el la dua,  
 Tria estas sange-ruĝa,  
 Klaran akvon donas kvara.  
 Jen migrant' ĉe fontoj haltas  
 Kaj demandas li unuan:  
 — „Kial fluas vi per lakto?“  
 — Por idaron vian nutri!  
 Kaj demandas li la duan:  
 — „Kial vino vin ruĝigas?“  
 — Por fortigi vian koron!  
 Kaj demandas li la trian:  
 — „Kial vi per sango ŝprucas?“  
 — Por flamigi vin al venĝo!  
 Li demandas fonton kvaran:  
 — „Kial akvon vi fluigas?“  
 — Por forlavi vian honton!

---

XXVII.

## Slovaka.

104.

KONSOLO.

(El Svetozar Hurban Vajansky.)

*Miloval som dievča,  
Malo sivé oči.*

— | — | —

Griz-okulojn havis  
Mia amatino;  
Ŝi preferis iĝi  
De ĉasist' edzino.

Ploris mi maldolĉe,  
Ploris senkonsole,  
Ke la griz-okuloj  
Trompis min petole.

Tamen, ĉar malbona  
Estas ŝi edzino,  
En kantet' konsolon  
Trovas mi en fino.

Dum edzin' pekema  
Edzon kor-turmentas,  
Pro kanteto mia  
Vi amuzon sentas.

---


XXVIII.  
Slovena.

105.

KOMENCO DE SERENADO.

(El Francisko Preŝeren.)

*Luna sije,  
Kladvo bije.*



Jen sonoro:  
Nokta horo —  
Sur ĉielo  
Brilas lun'.


Nova sento,  
Kor-turmento,  
Min ne igas  
Dormi nun.

---

## TRI AMATINOJ.

(Popola kanto.)

*Jaz 'mam pa ljubce tri,  
Vse tri bogate.*



El amatinoj tri,  
Ĉiu gracia,  
Arĝenton havas ŝi,  
Oron alia.

Ringeton havas ŝi,  
Perlojn alia,  
Korsajon sur tali'  
Portas la tria.

Plej junan prenis mi  
Ĉiam prefere,  
Ĉar amas tiu ĉi  
Min plej sincere.

XXIX.  
Sveda.

107.

ONDOJ.

(El K. A. Nikander.)

*Mitt lif är en vag,  
Som röres en tid.*



La vivo, la mia,  
Jen ondo en movo,  
Dum forte ĝin skuas  
De ventoj ekblovo.

Sed jen kvietiĝis  
La maro momente;  
La ondo ĉe l' bordo  
Ekdormas silente.

Ĝi kuŝas trankvile,  
Sin kvazaŭ ne movas,  
Kaj tamen ĝi vibras  
Kaj tie sin trovas.

La ondo, guteto  
En maro de l' mondo,  
Ĝi ankaŭ rebrilas  
Per ora sunrondo.



XXX.


## Ukraina.

108.

LA SORTO.

(El Taras Ŝevĉenko.)

*Je na svitji dola,  
A ĥito jeji znaje?*



Ekzistas la sorto —  
Sed kiu ĝin konas?  
Ekzistas libero —  
Ĝin kiu disponas?

En mond' estas homoj,  
Disjetas moneron,  
Kaj ŝajne regante,  
Ne konas liberon,  
Nek sorton, nek forton...

## HOMOJ NOMAS MIN FELIĈA.

(Popola kanto.)

*Kajutj lude ŝĉom ŝĉastyva  
Ja z toho smijusja.*

— | — | — | (—)

Homoj nomas min feliĉa,  
Mi pro tio ridas,  
Ĉar kaŝitan mian ploron  
Ili ja ne vidas.

Malfeliĉa de naskiĝo  
Restos mi ĝis morto.  
Kial naskis vi, patrino,  
Min por tia sorto!

---

110.

EL HEJM' FORDONIS MIN PATRINETO.

(Popola kanto.)

*Oddaĵa mene moja matinka  
Ta na ĉujju storononjku.*

— — | — — || — — | — (—)  
— — | — — | —

El hejm' fordonis min patrineto  
Al fremdaj homoj, en fremda land';  
Kaj ŝi proponis, kaj ŝi ordonis,  
Sep jarojn resti for,  
Sep jarojn resti for!

F I N O.

# ENHAVO.

## Poemoj originalaj.

|                                | Paĝ. |
|--------------------------------|------|
| La tagiĝo . . . . .            | 3    |
| Saluto el Varsovio . . . . .   | 5    |
| La reveno de 1' filo . . . . . | 6    |
| Al la Semanto . . . . .        | 7    |
| Jubilea kantato . . . . .      | 9    |
| Sur unu kordo . . . . .        | 10   |

## Tradukoj el diversaj lingvoj.

### *I. Angla.*

|                                              |    |
|----------------------------------------------|----|
| 1. Sonoriloj de vespero (El Moore) . . . . . | 15 |
| 2. La renkonto de ŝipoj (El Moore) . . . . . | 17 |
| 3. La lasta rozo (El Moore) . . . . .        | 18 |
| 4. Sago kaj kanto (El Longfellow) . . . . .  | 19 |
| 5. La pluva tago (El Longfellow) . . . . .   | 20 |
| 6. Excelsior (El Longfellow) . . . . .       | 21 |
| 7. Regu ondojn (El Thomson) . . . . .        | 24 |
| 8. La silentaj voĉoj (El Tennyson) . . . . . | 26 |

### *II. Bohema.*

|                                                     |    |
|-----------------------------------------------------|----|
| 9. La kroneto (El Kralodvora Manuskripto) . . . . . | 27 |
| 10. Printempa kanto (El Vrchlicky) . . . . .        | 29 |

|                             |                                       |    |
|-----------------------------|---------------------------------------|----|
| <i>III. Bulgara.</i>        |                                       |    |
| 11.                         | Saluto al Balkanoj (El Slavejkov)     | 30 |
| <i>IV. Dana-Norvega.</i>    |                                       |    |
| 12.                         | Elekto (El Björnson)                  | 33 |
| 13.                         | La nevidebla fioro (El Ibsen)         | 34 |
| <i>V. Finna.</i>            |                                       |    |
| 14.                         | La funebro de patrino (El „Kalevala“) | 35 |
| <i>VI. Flandra-Holanda.</i> |                                       |    |
| 15.                         | La Flandra leono (El Peene)           | 37 |
| <i>VII. Franca.</i>         |                                       |    |
| 16.                         | Rano kaj bovo (El La Fontaine)        | 40 |
| 17.                         | Korvo kaj vulpo (El La Fontaine)      | 41 |
| 18.                         | Cikado kaj formiko (El La Fontaine)   | 42 |
| 19.                         | La papilio (El Lamartine)             | 44 |
| 20.                         | La tombo kaj la rozo (El V. Hugo)     | 45 |
| 21.                         | La rompita vazo (El S. Prudhomme)     | 46 |
| 22.                         | Aŭtuna kanto (El Verlaine)            | 47 |
| 23.                         | Demandoj (El Laforgue)                | 48 |
| <i>VIII. Germana.</i>       |                                       |    |
| 24.                         | La reĝo de elfoj (El Goethe)          | 50 |
| 25.                         | La elfreĝo (El Goethe)                | 52 |
| 26.                         | Trovita (El Goethe)                   | 54 |
| 27.                         | Ruĝobuŝa knabineto (El Heine)         | 55 |
| 28.                         | Saluto al maro (El Heine)             | 56 |
| 29.                         | Al la vespera stelo (El Wagner)       | 59 |
| 30.                         | Embaraso (Kanteto)                    | 60 |
| <i>IX. Greka antikva.</i>   |                                       |    |
| 31.                         | Prometeo katenita (El Ajsĥilos)       | 61 |
| 32.                         | Strofo pri amo (El Eŭripides)         | 63 |
| <i>X. Greka nova.</i>       |                                       |    |
| 33.                         | La blondulino (El Solomos)            | 64 |
| <i>XI. Hispana.</i>         |                                       |    |
| 34.                         | La arbo de l' espero (El Rosa)        | 66 |
| <i>XII. Hungara.</i>        |                                       |    |
| 35.                         | Patriota kanto (El Petöfi)            | 68 |
| <i>XIII. Itala.</i>         |                                       |    |
| 36.                         | La interna zorgo (El Metastasio)      | 70 |
| 37.                         | Mia estrino (El Dante)                | 71 |
| 38.                         | Kora enuo (Ario de Giordani)          | 72 |
| 39.                         | La morto de Julia (Ario de Danza)     | 73 |

|                                                       |     |
|-------------------------------------------------------|-----|
| <i>XIV. Japana.</i>                                   |     |
| 40. Uta-Kantoj . . . . .                              | 74  |
| <i>XV. Kartvela.</i>                                  |     |
| 41. Edziĝa kanto (El Psavala) . . . . .               | 75  |
| <i>XVI. Kataluna.</i>                                 |     |
| 42. La ĝardeno de Hesperidoj (El Verdaguer) . . . . . | 76  |
| <i>XVII. Latina.</i>                                  |     |
| 43. Monumento (El Horatius) . . . . .                 | 78  |
| 44. Pereemo (El Seneca) . . . . .                     | 79  |
| 45. Amikeco (El Ovidius) . . . . .                    | 80  |
| 46. Virina konstanteco (El Catullus) . . . . .        | 80  |
| <i>XVIII. Litova.</i>                                 |     |
| 47. Kiam estis mi junulo (Popola kanto) . . . . .     | 81  |
| 48. La korvo (Popola kanto) . . . . .                 | 82  |
| <i>XIX. Luzica.</i>                                   |     |
| 49. Al Luzicujo (El Ĉiŝinski) . . . . .               | 83  |
| <i>XX. Pola.</i>                                      |     |
| 50. Konsilo (El Krasicki) . . . . .                   | 85  |
| 51. Laboru (El Brodziński) . . . . .                  | 85  |
| 52. Kozako en stepo (El Malczewski) . . . . .         | 86  |
| 53. Sapiro al patrujo (El Mickiewicz) . . . . .       | 89  |
| 54. Tri Budrisoj (El Mickiewicz) . . . . .            | 90  |
| 55. Sinjorino Twardowska (El Mickiewicz) . . . . .    | 93  |
| 56. Himno (El Słowacki) . . . . .                     | 100 |
| 57. En Svisujo (El Słowacki) . . . . .                | 103 |
| 58. Patro de pestuloj (El Słowacki) . . . . .         | 122 |
| 59. Al la virino (El Krasiński) . . . . .             | 139 |
| 60. Anĝelet' aŭ diableto (El Odyniec) . . . . .       | 140 |
| 61. Svatita junulino (El Zaleski) . . . . .           | 141 |
| 62. Kiel rompita vente arbeto (El Wolski) . . . . .   | 142 |
| 63. Supren flugi volus mi (El Wolski) . . . . .       | 143 |
| 64. Kial en horo soleca (El Wolski) . . . . .         | 144 |
| 65. Bruas pinoj sur deklivo (El Wolski) . . . . .     | 145 |
| 66. La destino (El Żmichowska) . . . . .              | 147 |
| 67. Ensorcita rondo (El Żmichowska) . . . . .         | 148 |
| 68. En la valo (El Dalman) . . . . .                  | 150 |
| 69. Fabletoj por infanoj (El Jachowicz) . . . . .     | 151 |
| 70. La viburno (El Lenartowicz) . . . . .             | 152 |
| 71. Vana plendo (El Asnyk) . . . . .                  | 154 |
| 72. Ĉielarka fabelo (El Asnyk) . . . . .              | 155 |
| 73. Al la virino (El Konopnicka) . . . . .            | 161 |
| 74. Sur la Jungfrau (El Konopnicka) . . . . .         | 166 |
| 75. Staĥ (El Konopnicka) . . . . .                    | 170 |



30

04893/24117

|                                                     |     |
|-----------------------------------------------------|-----|
| 76. De kiam estos vi edzino (El Tetmajer) . . . . . | 172 |
| 77—82. Libroj de profetoj (El Lange) . . . . .      | 174 |
| 83. Vi estas kiel aŭroro (El Jankowski) . . . . .   | 187 |
| 84. Kanto pri vento (El Belmont) . . . . .          | 188 |
| 85. Prometeo (El Różycki) . . . . .                 | 189 |
| 86. Avertio (El Kotarbiński) . . . . .              | 192 |
| 87. Frata paro (Kanteto) . . . . .                  | 192 |
| 88. La kozako (Popola kanto) . . . . .              | 193 |
| 89. Ebenigu vi (Popola kanto) . . . . .             | 195 |
| 90. Ho viĝurneto (Popola kanto) . . . . .           | 196 |
| 91. Macjek (Popola kanto) . . . . .                 | 197 |
| 92. Donu min al Janko (Popola kanto) . . . . .      | 199 |
| 93. Fajreligu hufumetoj (Popola kanto) . . . . .    | 200 |

*XXI. Pola-kaŝuba.*

|                                                   |     |
|---------------------------------------------------|-----|
| 94. Dediĉo al Kraszewski (El Derdowski) . . . . . | 201 |
|---------------------------------------------------|-----|

*XXII. Portugala.*

|                                               |     |
|-----------------------------------------------|-----|
| 95. Komenco de Luziadoj (El Camôes) . . . . . | 203 |
| 96. Kamelo kaj pulo (Fablo) . . . . .         | 205 |

*XXIII. Provenca.*

|                                     |     |
|-------------------------------------|-----|
| 97. Mia koro (El Aubanel) . . . . . | 206 |
|-------------------------------------|-----|

*XXIV. Rumana.*

|                                      |     |
|--------------------------------------|-----|
| 98. Rodika (El Alecsandri) . . . . . | 208 |
|--------------------------------------|-----|

*XXV. Rusa.*

|                                         |     |
|-----------------------------------------|-----|
| 99. Finita laboro (El Puŝkin) . . . . . | 209 |
| 100. Principoj (El Tolstoj) . . . . .   | 210 |
| 101. Ama sento (Popola kanto) . . . . . | 211 |

*XXVI. Serba-kroata.*

|                                                    |     |
|----------------------------------------------------|-----|
| 102. Morto de patrino (Heroa popolkanto) . . . . . | 213 |
| 103. Kvar fontoj (El Preradović) . . . . .         | 217 |

*XXVII. Slovaka.*

|                                      |     |
|--------------------------------------|-----|
| 104. Konsolo (El Vajansky) . . . . . | 218 |
|--------------------------------------|-----|

*XXVIII. Slovena.*

|                                                  |     |
|--------------------------------------------------|-----|
| 105. Komenco de Serenado (El Preŝeren) . . . . . | 219 |
| 106. Tri amatinoj (Popola kanto) . . . . .       | 220 |

*XXIX. Sveda.*


|                                    |     |
|------------------------------------|-----|
| 107. Ondoĵ (El Nikander) . . . . . | 221 |
|------------------------------------|-----|


*XXX. Ukraina.*


|                                                 |     |
|-------------------------------------------------|-----|
| 108. La sorto (El Ŝevĉenko) . . . . .           | 222 |
| 109. Homoj nomas min (Popola kanto) . . . . .   | 223 |
| 110. El hejm' fordonis (Popola kanto) . . . . . | 224 |













Biblioteka Główna UMK



300047524973